

Amo, tuso kaj forpaso

Homoj kaj kovimo



Finalistaj noveloj de la
Interkultura Novelo-Konkurso

AMO, TUSO KAJ FORPASO



Amo, tuso kaj forpaso

Homoj kaj kovimo

*Finalistaj noveloj de la
Interkultura Novelo-Konkurso*

Eldonejo: KAVA-PECH
Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice
www.kava-pech.cz/esperanto

© Les Éditions KAVA-PECH, 2022

ISBN 978-80-88326-31-1

Claudia Larochelle bonvenigas vin!

Vi eble legis la librojn *Amo en la tempoj de ĥolero* de Gabriel García Márquez, *La Granda Gripo* de Freddy Vinet, *Lecionoj de pandemio* de George A. Soper aŭ *La Altiro de la steloj* de Emma Donoghue. Ĉi tiuj verkoj estis inspiritaj de la grandaj pandemioj, ili daŭre estas eldonataj kaj trovas sian publikon – kio okazos ree kaj ree – meritaj reprezentantoj de la grandaj malsanoj, bedaŭrinde tro ofte mortigaj, kiuj tuŝis niajn modernajn civilizaciojn.

Certe, do, venontaj generacioj aŭdos, dank' al literaturo, pri la KOVIM-19-pandemio kun ĝiaj mil variantoj, kiuj influis la fruajn 2020-ajn jarojn kaj kiuj ankoraŭ ne estas tute nuligitaj en la momento, kiam mi skribas tiujn ĉi kelkajn liniojn. Mi ofte pensas ke, samkiel niaj prauloj rakontis al ni pri ĥolero, tuberkulozo, hispana gripo kaj ĉiuj aliaj grandaj detruaj epidemioj, ankaŭ tiu ĉi aktuala pandemio eniros historion. Kiel korelverŝo – la maniero, per kiu, niaj talentoj superas la malbonon malgraŭ la tragedioj – la vortoj restos eternaj por illustri la okazaĵojn kaj dolorojn kaŭzitajn de tiaj malsanoj.

Kio vere okazis? Tio estas la demando, kiu reeĥas en la senkomparaj rakontoj de tiu ĉi kolekto. En la hejmoj, stratoj, malsanulejoj, antaŭ la ekranoj, la homaro daŭre vivas, amas, estas timema aŭ kuraĝa, malgaja aŭ ĝoja. Malgraŭ KOVIM-19. Ĉar tiel devas esti.

Legante tiujn ĉi rakontojn de la finalistoj de la Interkultura Novelo-Konkurso, vi povos vojaĝi tra la mondo kaj eniri la intimecon de brazila almozulo, de ĉina kuracisto, de bulgara avino, de barata anesteza teknikisto kaj multe pli.

Ĉu vi legas ĉi tiujn novelojn en la 2020-aj aŭ 2120-aj jaroj, ĉu ili estos malkovritaj en la postaj jardekoj aŭ eĉ jarcentoj, ili estas neforviŝeblaj spuroj, kiuj povos rakonti pri la meandroj de epoko, kiun la aŭtoroj konis kaj travivis, tiel sorbante siajn rakontojn kaj fikciojn je

forto kaj digno. Ĝi estas, mi kredas, tre eta konsolo, sed almenaŭ iliaj rakontoj restos por ĉiam okulfrapa lumo, kaj tion neniu povos forpreni de ili.

Kun mia tuta admiro,

Claudia Larochelle,
la honora prezidanto de la Interkultura Novelo-Konkurso

Tradukis Stela Besenyei-Merger

Francisko Lorrain salutas vin!

Dekduo da homoj, el kvin kontinentoj, kunlaboris por taksi la novelojn proponitajn al la Interkultura Novelo-Konkurso, uzante Esperanton kiel ponto-lingvon por tion fari. Estis komence sesdek naŭ noveloj por taksi. Ili estis kompreneble divers-kvalitaj, sed tio indikas, ke la konkurso instigis al skribado esperantistojn kun plej malsamaj spertoj kaj lingvokonoj – kion mi opinias granda sukceso! Pluraj el la ricevitaj tekstoj estis vere altnivelaj. La interŝanĝoj inter la ĵurianoj, el pluraj mondopartoj, montris interesan diversecon de aliroj al la tasko. Vi trovos en ĉi tiu novelaro la plej bonajn novelojn proponitajn al la ĵurio: dudek unu novelojn el ĉiuj kontinentoj. Akompanas ilin ok nekonkurasantaj noveloj, kiel permesite de la regularo de la konkurso.

Longan vivon al INK!

*Francisko Lorrain,
la prezidanto de la Interkultura Novelo-Konkurso*

Fernando Maia invitas vin!

En 2020, la homaro devis fatale alfronti monds kalan trudizoliĝon pro la pandemio de KOVIM-19. Precipe tiam, kiam diversaj el ni perdis amatojn pro malfacile komprenebla malsano, resti izolita estis aparte timige. Nehazarde, la reto estis uzata por transvenki la barojn de izoliteco kaj – laŭ la ebloj de niaj nunaj teknologiaj rimedoj – la tuta mondo povis almenaŭ virtuale resti konektita kaj trovi en tio ian komforton.

En tiu situacio, ne nur lingvoj sed ankaŭ kulturoj ludis interesajn rolojn. Kompreneble homoj, kiuj ne parolis la saman lingvon, ne facile ligiĝis en tiu virtuala mondo, sed ankaŭ tiuj, kiuj parolis saman lingvon, povis malkovri kulturajn diferencojn, ĉefe – sed ne nur – se ili venas de malsamaj geografiaj regionoj.

Tio eĉ pli evidentiĝis inter parolantoj de Esperanto. La lingvon Esperanto nuntempe parolas homoj en pli ol 130 landoj, kiuj tamen funkcias kiel unu granda senbarila komunumo, kaj – malsame al la angla – Esperanto ne trudas iujn apartajn kulturojn kiel gvidilon por la uzo de la lingvo, kiu evoluas en vere monda internacia amplekso.

Pro tio, Universala Esperanto-Asocio speciale fieras aŭspicii la Interkulturan Novelo-Konkurson, kiu aperis en tiu pandemia momento kiel unu plia perlo por ligi homojn kaj montri la riĉecon de nia kultura diverseco kaj de la homa kreemo. Efektive, la unua ideo de la konkurso venis de la temo de la 105-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun oni devis en 2020 nuligi pro la pandemio, ligita ankaŭ al la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj: “Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo”. Poste, ĝi evoluis al tio, “Kiel KOVIM-19 ŝanĝis nin”.

Estis sendube unika sperto tion malkovri pere de ĉiu peco, kiu al la konkurso kandidatiĝis. Rakontoj el diversaj mondopartoj kaj en diversaj lingvoj. Granda estis la laboro de la organizaj instancoj de la konkurso, kiuj meritas apartan dankon kaj gratulon, ĉar la rezulto, samtempe

impona kaj leĝera, spegulas tion. Tial mi invitas ĉiujn ĝui la legadon de la elektitaj verkoj de la 1-a INK – kaj, se vi estas verkema, partoprenu en la estontaj eldonoj, ĉar INK alvenis en nia mondo por resti – ligante ĉiujn nin per tio, kio faras nin homoj: kulturo.

*Fernando Maia,
la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio*

La unua kaŝita kazo

de Stela Besenyei-Merger

Hungario

Klara ĉirkaŭrigardas en la tramo, kaj havas la impreson, ke neniu seriozas pri tio, kio okazas en la mondo. Ĉu ili ne legas eksterlandajn novaĵojn? Ĉu ili pensas, ke ili neniel involviĝos en tiu ĉi monda okazaĵo? Aŭ ĉu temas pri ignoremo kaj ĝuado de la vivo, ĝis ĉio haltas? Ĉiukaze informoj ne abundas. La najbaraj landoj jam parolas pri la unuaj kazoj; ĉi tie oni agas same kiel la viruso iel plene povus eviti ilin.

Ŝi travojaĝas la grandan urbon por ekhavi informojn. Ankoraŭ kelkaj haltejoj en la metroo kaj fine ŝanĝo al buso. Ŝi sentas sin strange. Ŝi malkomfortas pasigi tiom da tempo en diversaj veturiloj, ekde kiam ŝi komencis sekvi la novaĵojn pri fora viruso, kiu tamen proksimas. Ŝi sidas distance de ĉiu kaj observas la vizaĝojn. Ŝi vidas nenian zorgon. Homoj eniras, eliras, ili aspektas kiel la plej trankvilaj homoj dum tiu ĉi merkredo. Maskon surhavas neniu.

Ĝis nun Klara legis la novaĵojn en eksterlandaj amaskomunikiloj, demandis amikojn en foraj landoj pri siaj spertoj. Ŝi provis kompreni, kio okazas, kaj kion tio signifos por ŝi. Ŝi estas nun serĉanta laboron. Se la afero vere tiom seriozas, tiam estos aparte malfacile trovi laboron en sia fako. Homoj ĝojos, se ili ne perdos siajn postenojn, aŭ povos tiel ŝanĝi siajn agadkampojn, ke estu relative facila transiro. La grizaj pensoj kontrastas la sunbrilan veteron ekstere.

Klara finfine atingas la domon de la amikino. Ili revidas unu la alian post longa tempo. Petra loĝas for de la ĉefurbo kaj ne vizitas ofte. Ili sidas en la salono de la domo de ŝiaj gepatroj kaj digestas la tagmanĝon. Klara malkuraĝe decidas levi la temon de la viruso, pri kiu oni oficiale scias ankoraŭ nenion. Ŝi nepre volas demandi la patrinon de Petra, ĉar ŝi estas ĝenerala kuracisto. Se iu, nepre ŝi devas scii pli ol la ĝenerala popolo.

La patrino revenas en la ĉambron kun kafo, kaj Klara heziteme demandas ŝin: kiel tio povas esti, ke neniu kazo aperis, kiam oni raportas

la unuajn malsanulojn de ĉiu lando ĉirkaŭ ni? Ĉu vere ankoraŭ neniu malsaniĝis en nia lando?

La patrino kolerete respondas: kompreneble jam estis la unua kazo, oni atendas anonci tion, kiam ne estos hungaro! Klara gapas. Ho, damne, tial! Kiam eblos eksterlandanon kulpigi pro la alveno de la viruso, tiam oni diros ion ajn pri ĝi.

La patrino rakontas plu. Ŝi scias, ke la unua konfirmita malsanulo estas virino, kiu vizitis sian koramikon en norda Italio. Li laboras en fabriko tie. En enaj cirkloj oni jam scias, ke ŝi reportis la viruson. Ĉiu kuracisto ricevis cent maskojn kaj aldonan skatolon da gantoj, sed nenion alian. Teorie, homoj devas resti hejme, sed kiam ŝi vizitas ilin, do, kian protektilon ŝi surhavu? Oni apenaŭ diras al ili ion ajn. La situacio estas timiga por la kuracistoj mem. Oni komprenas la seriozan atakon al la pulmoj, sed ne plu.

Kelkajn tagojn poste, la novaĵoj komencos raporti pri travojaĝantaj usonaj studentoj, kiuj pluiris al Prago, kaj poste pri iranaj studentoj ĉe budapeŝta universitato. Ŝajnigante kvazaŭ hungaroj ne vojaĝus, kaj ili ne povintus kunporti la viruson de eksterlando. Kvankam precize tio okazis. Kiel en ĉiu alia lando. Sed la ĝenerala publiko kompreneble ne ekscios tion.

Klara dankas pro la informoj, malrapide pretiĝas hejmen. Ŝia stomako peziĝas, ĉar ŝi ricevis konfirmon pri tio, kion ŝi jam pli-malpli sciis. Kaj kion fari nun? Prenu maskojn, gantojn, purigu la ĉarojn en la vendejo antaŭ tuŝi ilin. Ne iru al lokoj, kie ne nepras, (baldaŭ, ĉiu devos fari tiel), – konsilas la patrino. Kaj tiel estis. Revenante, ŝi aĉetas sian unuan maskon kaj surmetas ĝin, akompanata je surprizaj rigardoj. Ŝi nuligas planojn kun amikoj. Post du semajnoj, ĉiu aŭdas la novaĵon: restu hejme.

La komenco de KOVIM-19

de Valentina Panova

Bulgario

elbulgarigis Raia Androvska

Simona foliumis la paĝojn de la kajero, en kiuj ŝi notis la aĉetitajn donacojn por siaj nepoj. Tion ŝi faris unufoje jare, ekde kiam la demokratio ekestis “varme ŝirmita” en la lando. La entreprenoj malaperis. Homoj perdis siajn laborpostenojn. Ĉu la junuloj pravis aŭ ne, ili ofte ripetadis al siaj gepatroj: “Ĉi tie ne eblas vivi...” kaj foriris... eksterlanden.

La infanoj kreskis kaj ŝi devis zorgi, ĉu la donacoj konvenis kaj ne ripetigis. Ŝi malfermis la dek trian paĝon. Tio signifis por ŝi dek tri jarojn da sufero. Multobligitaj per horoj... ŝi ne volus kalkuli. Pensadi, kiel ili loĝas tie.

La sekvan tagon ŝi aranĝis la donacojn en la infan-ĉambro. Nu, estis pli por aĉeti. Kun ĉiu aĉetaĵo ŝi sentis sin pli proksima al ili. Ŝiaj pensoj jam vojaĝis. Ŝi imagis pri kio ili interparolos. Ĉio ĉi pentrigis sur ŝia vizaĝo, kaj de tempo al tempo verŝigis iu larmo.

Hieraŭ vespere, ili parolis “lastfoje” per Skajpo. Ili diris unu la alian “Ĝis baldaŭ!”, kaj ŝajnis al ŝi kuŝi sur lanuga nuboj kontenta pro la fakto, ke ŝi sukcese ĝisatendis la baldaŭan renkontiĝon.

La taksio haltis ĉe la flughaveno kaj la ŝoforo la duan fojon diris: “Kvazaŭ vi metis ŝtonojn en la valizojn!”, sed malgraŭ la riproĉo, li ridetis kun bondeziro: “Bonŝancan vojaĝon kaj amuziĝu kun la infanoj!”

Kvin minutojn antaŭ la flugo, murdiga voĉo anoncis de la altparoliloj: “Ĉiuj flugoj estas nuligitaj ĝis nedefinita tempo.” La mondo estas kaptita de la vivdanĝera KOVIM-19. La flugiloj de Simona disfaliĝis. “La infanoj atendas min!” kaj ŝia granda figuro ŝajne ŝrumpiĝis.

Neevitebla surteriĝo

de Tamagotchi de Chasteigner

Kanado

elfrancigis Trefleo Mercier

Paĉjo, rakontu al mi mian historion!

En ordo, mia katido. Via panjo kaj mi laboris por la sama flugkompanio. Ni konis unu la alian pervide, kaj iun tagon, okaze de halto en Frankfurto – tio estas en Germanio, katido mia – ni konatiĝis. Poste ni renkontiĝadis ofte, kaj fine ni enamiĝis. Ni decidis aĉeti belan domon kaj antaŭplanis belan ĉambron por la tempo, kiam vi alvenos, efektive, iun tagon. Ni sopiris koni vin. Poste de unu tago al la alia, estis pandemio pro viruso. Ni ambaŭ fariĝis senlaboraj. Iom poste, ni perdis niajn dungojn. Ni sentis maltrankviliĝon pri la estonteco. Eĉ la nuntempo fariĝis peza: kiel ni povos pagi la domon? Kaj estis tiu momento, kiam ni decidis ne havi vin.

La faruno

de Ĵenja Amis

Kanado

“Ili ja estis ĉi tie antaŭe! Kien oni diable metis ilin?” La temperaturmezurilo de mia patrino rompiĝis, kaj mi ankaŭ ne povas trovi la mian. Mi bezonas aĉeti novan en la apoteko. Kial ili konstante rearanĝas aferojn tie ĉi, damne? Sur la loko, kie antaŭe estis temperaturmezuriloj, estas nun tavoloj da tus-bombonoj. Traserĉinte la tutan vendejon, mi fine venas por peti helpon. “Ho, ili ne plu estas, jam de pluraj tagoj.” la vendisto respondas, kvazaŭ tio estus memevidenta afero. Mi konstatas ankaŭ, ke la damnaj tus-bombonoj estas en la loko, kie antaŭe estis alkoholo kaj peroksido. La bombonoj estas metitaj por kaŝi la “truojn” sur la bretoj. Mi ne memoris malplenajn bretojn ekde mia frua infanaĝo, dum Perestrojko. Mi ricevas Fejsbuk-mesaĝeton de amikino – ŝi scias, en kiu vendejo “aperis” faruno. Mi ankaŭ amuziĝas de la vorto “aperis”. Tiajn esprimojn oni ankaŭ uzis dum Perestrojko. Jen aperis necesejpapero. Jen salama kolbaso. Jen ĉampano. Amuzas min, ke nun oni uzas tiun vorton ankaŭ ĉi tie. Kvazaŭ faruno povus nature manifestiĝi kaj – *blup!* – aperi en la vendejo. Sed mi ne bezonas farunon. Mi bezonas temperaturmezurilon, jen ĉio. Mi ŝerce pensas pri la ruzaĵo aĉeti farunon kaj meti afiŝeton en Fejsbuko por interŝanĝi ĝin por temperaturmezurilo poste. Tiu penso amuzas min, dum mi revenas hejmen. Mi enigas la ŝlosilon al la pordo – mia poŝtelefono sonoras. Estas mia panjo. “Ĉu vi povus eble aĉeti por mi iom da faruno...?”

La longa amrendevuo

de Kejti Neilson

Usono

Mi kombis mian hararon atente, rigardante ĝin en la spegulo. “Nu, mi supozas, ke mi metu ĝin supren, do ĝi ne tuŝu la maskon, ĉu?” mi murmuris al mi mem. Mi kuntenis la harojn, enmetis harbendon, kaj aranĝadis ĝis finfine la hararo sufiĉe plaĉis al mi. Mi ellasis la banĉambbron, kaj prenis mian poŝtelefonon enmanen. “Mi estas survoje!” mi tajpis al la viro, kiun mi renkontos. Kun rideto mi enpoŝigis la poŝtelefonon. Miajn manojn, kiuj estis sekaj kaj lacaj pro la senĉesa lavado dum la monatoj antaŭaj, mi eklavis. Post sekigo mi surmetis la maskon. La oreloj protestis, la vangoj plendis, sed la masko restis sekure sur la vizaĝo dum mi paŝis el la domo. La stratoj, kutime plenaj, malplenis.

Ĉe la parko estis kelkaj grupoj da homoj, ĉiuj en la grupoj du metrojn for unu de la alia. Viro estis sola sur benko. Mi alproksimiĝis. “Frederiko?” La viro ekstaris kaj turniĝis. “Margo!” li diris. Malgraŭ la kaŝita buŝo sub la masko, la okuloj de la viro krispiĝis kaj lia plaĉo estis tiel evidenta. Mi etendis la manon, kaj ekdiris “Mi feliĉas renkonti vin...” kiam li subite riverencis, prenante mian manon ĝis ĝuste apud sia vizaĝo, kaj mi aŭdis la laŭtegan sonon de kiso. La simulata adoreto surprizis min tiom multe, ke mi, dum momento, ne sciis kion fari.

Sed tiam mi ekridis. Mi ekridegis. Mi ne povis haltigi la ridadon, kaj pro ĝi mi faldis min kaj perdis mian kapablon spiri. Mi etendis brakon al la benko, kaj la mirigata viro helpis min sidi. “Pardonu, belulino, mi ne intencis mortigi vin hodiaŭ.” La resto de la rido elvenis, kaj restis nur granda rideto sur mia vizaĝo. “Nu, mi ne intencas morti hodiaŭ.”

“Do vi travivos mian atakon, ĉu?” li diris, kun ludema rideto en la voĉo.

“Certe.” mi respondis.

Dum longega tempo ni sidis sur tiu benko kaj kunparolis. Ĉiuj aliaj grupoj foriris kaj mi rimarkis, ke la suno nun malleviĝis, kaj la ĉielo malheliĝis super ni. Kvietaj momentoj okazis inter ni.

“Ĉu estus malbone se mi petus kisi vin?” mi demandis. Post la demando mi subite sentis, ke mi devus sentigi lin sekura. “Mi ne faras ĉi tion ofte! Mi ne vidis iujn dum monatoj! Mi laboras de hejme ekde marto, kiam la pandemio ekis, kaj eĉ miaj necesitaĵoj estas liveritaj ekde tiam, kaj mi...” Li interrompis. “Ege plaĉus al mi kisi vin.” Ni samtempe demetis niajn maskojn, la linioj de premado montritaj sur ambaŭ niaj vizaĝoj. Ni ekkisis kaj la kiso de la agrabla viro en la mezo de tia tempo gustis kiel la espero.

Mi ne havas horloĝon

de Paulo Sergio Viana

Brazilo

Fantomoj estas nevideblaj, ankaŭ virusoj. Kaj ambaŭ hantas. La urbo estas preskaŭ senhoma, ĉiuj rifuĝas en siajn domojn. Malpli da aŭtoj surstrate. Pandemio. Kvaranteno.

Ĉiu urbo havas sian kvanton da mizeruloj, kiuj dependas de almozoj por vivi. Ili petadas sur trotuaroj, apud semaforoj, ĉe enirejoj de bankoficejoj. Nuntempe la urbo estas preskaŭ senhoma, almenaŭ en publikaj lokoj. De kiu do almozpeti? Homoj malsatas. Almozuloj estas homoj, havas stomakon kaj malsataĉas. Silente ili vagas tra la urbo kaj dormas sub markezoj. Ie kaj ie oni vidas ankaŭ infanojn vagantajn kiel hundoj. Malsataj infanoj.

Ĵurnaloj, televidstacioj kaj radiostacioj proponas, ke oni donacu nutraĵojn. Oni dismetas tabletojn kun aŝiĝoj: “Lasu ĉi tie vian nutrodonacon”.

Estas la deka vespere. Senbrua, iom malvarma vespero, aŭtuno jam regas. Apenaŭ zumas en la hejmo de Karlo la televidaparato. Lastaj noticoj susuriĝas en la tagofino: la viruso plivastigas sian invadon, pli da homoj mortas tute solaj, en intensflegaj hospitaloj. Kelkaj mortas antaŭ ol ili atingis taŭgan flegadon. Televidĵurnaloj iom monotone listigas statistikajn ciferojn.

Karlo enuas. Ĉiam la samaj noticoj. Deprime. Preferinde enlitiĝi. Li varmigas sian kutiman laktotason kaj verŝas ĉokoladpulvoron. Je la unua gluto sonas la doma tintilo. Karlo ekmiras, estas jam kelkaj minutoj post la deka. Kiu sonorigas?

Karlo rigardas tra la fenestro. Malantaŭ la ĝardeneta ferkadro ĉifonulo vokas lin: “Sinjoro, lasu min paroli al vi.”

“Ĉu danĝere?” Karlo pensas. Li tamen malfermas la pordon, iom impulsige, kaj paŝas al la homo.

“Sinjoro, pardonu min, sed mi malsatas. Ĉu vi povus helpi min? Io ajn manĝebla taŭgas. Aŭ monero.

– Amiko, estas jam malfrue! Post la deka! Oni timas malfermi la pordon je ĉi tia horo!

– Ĉu jam la deka? Ve, mi ne konscias pri la horo... Pardonu min, sinjoro, mi ne havas horloĝon. Vi pravas, estas jam malfrue... Jam ne indas ĝeni homojn je ĉi tia horo... Nun mi komprenas, kial ĉe aliaj domoj, kie mi sonorigis, neniu respondis. Pardonu... Mi foriras..."

Lia voĉo peze treniĝas. Li paŝas for, iom malfirme. Eble li estas ebrieta, li ŝanceliĝas laŭlonge de la trotuaro. Blovas malvarma venteto, folioj de kaŝtanoj melankolie murmuradas.

Karlo miras, ke tiel facile la almozulo rezignas pri sia almozo. Sed fakte estas tro malfrue, li devus veni antaŭe. Tamen li senpense flustras: "Momenton!" Sed la almozulo jam iras kelkajn metrojn for. Li ne aŭdas. La murmurado de la foliaro rivalas kun la hezita voĉo de Karlo.

Li revenas en la domon, ŝlosas la pordon, malŝaltas la televidon kaj la lumon. Lia ĉokoladlaktajo jam malvarmiĝis, li ne plu emas trinki. Li enlitiĝas, sed bezonas nekutime longan tempon por endormiĝi. Certe pro tio, ke mankas al li varmeta ĉokoladlaktajo en la stomako. "Ĉio en la vivo dependas de kutimoj", estas lia lasta penso hodiaŭ.

Enuigaj tagoj

de James Bridge

Kanado

Frida vento blovis tra la malplena urba strato, kie sola marŝis juna virino okupita per telefona babilado. “Panjo, mi ĵuras, nepre nenio okazas ĉi tie. Mia urbo estas tiel izolita, ke ankoraŭ ne aperis eĉ unu kazo.”

De la alia flanko de la telefonvoko zumis la voĉo de maljunulino: “Kara Andromeda, vi tre bone scias, ke la elirmalpermeso ekzistas por la sano de la tuta loĝantaro, kial vi devas tiel timigi min?”

Andromeda ekiris iom pli rapide kaj rigardis dekstren kaj maldekstren antaŭ ol transiri la straton, sed efektive ne necesis, ĉar neniu alia videblis ie ajn. Ŝi ĝenite respondis: “Panjo, mi laboras en superbazaro, do endas al mi labori. Malgraŭ tio, mi ne povas permesi al mi rifuzi pli da mono lastatempem.”

La malforta voĉo ĉe la alia flanko de la telefono murmuris responde: “Mi esperas, ke vi ne hejmeniras perbuse?”

Andromeda iom fermis la jakon kontraŭ la frida vento kaj pli firme tenis la pezan aĉetsakon. Ŝi ĝemetis: “Mi nenien iras perbuse, panjo, ĉar oni nuligis ĉiajn eventojn kaj tial indas nenien iri.” Andromeda ekvidis la antaŭajn lampojn de proksimiĝanta aŭto kaj paŝis en la enirejon de fermita, senluma vendejo. Andromeda rigardis la aŭton preteriri, kaj demandis la patriron: “Ĉu vi sufiĉe bone travivas la kvarantenon en Toronto? Oni diras, ke la nombro da kazoj pligrandiĝas ĉiutage.”

Panjo tuj ekzumis el la saĝtelefono: “Ho, ĉielo, mia kara, vi estu dankema, ke vi ne troviĝas ĉi tie, ĉar la malsanulejoj superpleniĝas. Hieraŭ mi vidis raporton, ke iu el la kuracistoj kolapsis kaj mortis pro tro da laboro.”

Andromeda malsuprenmetis la pezan aĉetsakon kaj genuiĝis por eltiri kelkajn aferojn, dirante: “Jes, ankaŭ mi vidis tiun raporton. Ŝajne, ne sufiĉas flegistoj kaj kuracistoj por prizorgi la pacientojn.”

Panjo aŭdeble ĝemis ĉe la alia flanko de la babilado: “Estas terure ĉi tie, kara. Ĉiu vojaĝo al la superbazaro estas timiga afero, kaj ĉiutage mi atentegas la novaĵojn por trovi eĉ guton da espero. Ĉu estas tiel por vi?”

Trovinte tion, kion ŝi serĉis en la aĉetsako, Andromeda stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Ŝi apogis sin ĉe la muro de la vendeja enirejo, iom ridante. “Fakte, estas tiel panjo! Vi neniam kredus, sed de kelkaj monatoj iu ŝteliras en la urbo kaj nokte aŝiŝas tranĉaĵojn de porksandviĉa viando al la vitraj fenestroj de vendejoj. Estas ege ridiga skandalo!”

Laŭta ridado ekaŭdiĝis de la saĝtelefono, kaj panjo balbutis: “Tio estas tute nekredebla! Se nur io tia okazus ĉe mi!”

Andromeda refoje ĉirkaŭrigardis kaj ekadiaŭis la panjon: “Ĝojigas min scii, ke vi estas sana, panjo, sed mi ĵus hejmenvenis kaj necesas iom ripozi post longa tago. Ĝis la, panjo!” Ankaŭ panjo adiaŭis: “Ĝis la, Andanjo, kaj vi nepre tenu vin for de la nokta fikolbasulo!”

Andromeda refoje ĝisis, enpoŝigis la saĝtelefonon, kaj ŝire malfermis la plastan pakajeton da salamo. Ŝi pensis en si: “Necesas fari ĉi tion rapide antaŭ ol alvenos plia aŭto...”

Kafo

de Ĵenja Amis

Kanado

Mi estas laca.

Kaj mi estas dormema.

Mi volas kafon.

Damne, mi ne rajtas havi kafon.

Iri al la hospitalo je la sesa matene kaj ne havi kafon estas torturo.

Mi ne tiom pensas pri la operacio mem, kiom pri la kafo.

Mi surmetas la jakon. Ĝi odoras kiel kafo... kafo, kafo, kafo.

Mi ne sciis antaŭe, ke mia jako odoras kiel kafo.

Ankaŭ mia haŭto odoras kiel kafo, sed kafo de hieraŭ, ne de hodiaŭ.

Ĉar damne, mi ne povas havi kafon hodiaŭ...

Diable, kial tiom da homoj en la metroo trinkas kafon?

Por pasi al la ĥirurgejo ni devas trairi la hospitalan kafejon.

La sono de la espreso-maŝino dolorigas ĉiujn miajn sentojn.

Fakte, la kafo ne estas la sola afero, kiu mankas.

Mankas ankaŭ manĝaĵo. Ĉar mi ne rajtas manĝi pro tiu damna operacio.

Mia kapo doloras. Iom da akvo helpus... sed mi ne rajtas trinki eĉ akvon.

Mi enuas jam preskaŭ ses horojn en tiu senkolora hospitala atendejo.

Ses... horoj... sen.. kafo... imagu... tion...

La stulta masko jukas mian nazon.

Mi volas esti jam sub narkozo por simple ne senti malsaton... kaj la kafomankon.

Nu finfine! Mia vico. Mi surmetas malbelajn operaciajn vestaĵojn.

Helflava robo, kiu fiksiĝas per du rubandetoj ĉe la dorso.

La plata ĉapeto por la haroj estas hida.

La bluaj monstraĵoj, kiujn mi devas meti sur la piedojn, estas preskaŭ insultaj.

Jen la ruligilo, sur kiu mi devas kuŝi.

Kial mi ne simple povas marŝi ĝis la operaciejo? Mi ja tute povas.
Mi sentas min senpovigita. Senkafigita kaj senpovigita.
La flegisto, kiu ruligas min al la operaciejo, parolas pri sia vojaĝo al
Portugalio.

Antaŭ monato... antaŭ jarcento...

Mi volas, ke li silentu.

La flegistino demandas, ĉu mi fartas bone. Ha-ha, certe, certege!

Mi plendas pri la kapdoloro... kaj la kafomanko.

Ŝi ŝercas, ke oni aldonos la kafon kun anestezo dumoperacie.

Tio amuzas min.

La papag-kolora ĉapeto de la ĥirurgo estas eĉ pli hida ol la mia.

Ĝi supozeble devas distri min. Sed ĝi dolorigas miajn okulojn.

Oni ŝanĝas mian bluan maskon por la anesteza masko, kiu iras sur
mian buŝon kaj nazon.

Mi devas kalkuli ĝis dek.

Unu, du, tri...

Mi vekigās postoperacie.

Mia gorĝo doloregas.

Nu, almenaŭ la masko estas for. Mi povas spiri.

Mi ankoraŭ ne vidas min, ĉar mi kuŝas en la rulilo.

Mi imagas, kiel aspektas la monstreca cikatro sur mia kolo.

Mi jam komencas strategiumi, kiel kaŝi ĝin.

Dio mia, mi estas tiom vanta...

Mi vere ne povas pensi pri io alia...

Tio, kaj kafo...

Mi volas tusi. Sed mi ne povas, ĉar tio povas damaĝi mian gorĝon.

“Jes, pli da sendolorigiloj, mi petas. Dankon.”

Nu finfine, en la hospitala ĉambro.

Mi estas sola momente, sed trans la kurteno estas spaco por alia paciento.

Ke alia homo ne venu, ke alia homo ne venu...

Mia edzo verŝajne nun trinkas kafon en la hospitala kafejo.

Feliĉulo.

La solaj kafejoj malfermitaj kovime estas en la hospitaloj, ĉu vi sciiis?

Mi tekstas al li.

“Portu kafon. Grandan. La plej grandan. La plej plej grandan.”

La fenestro

de Seth Carter

Usono

La malvarma oktobra vento blovis kontraŭ mia dorso dum mi staris antaŭ la granda fenestro ĉe la tera etaĝo de la malsanulejo. La malvarmo tremigis min kaj mian familion, do ni kunproksimiĝis por konservi nin varmaj. Ni alvenis al la malsanulejo antaŭ kelkaj horoj, sed neniam eniris ĝin pro la pandemiaj reguloj – kaj anstataŭ kunesti nian patrinon, ni nur povis rigardi ŝin tra la vitro.

Unufoje ĉiujn tridek minutojn, flegistino eniris la ĉambron por kontroli la vivsignojn de mia panjo. Ni nur povis spekti, dum la flegistino kontrolis ŝian pulson, kaj laŭeble plej bone komfortigis la panjon. Dum unu semajno, ni atendis ekster tiu fenestro, kaj rigardis kiel ŝiaj vivsignoj pli kaj pli malfortiĝis kun ĉiu tago. Aliaj familianoj alvenis por viziti, kaj iris hejmen post siaj vizitoj, sed ni daŭre staris malgraŭ la blovanta vento, kiu pli kaj pli fortiĝis. Mia patro estis la sola el ni rajtigita eniri la malsanulejon, kaj eĉ li nur povis resti ene dum unu horo.

La suno leviĝis, kaj ni leviĝis kun ĝi, irante al la sama fenestro ĉiumatene por daŭrigi la gvatadon de la pasinta vespero. Kiam ni alvenis al la fenestro, la flegistino malfermis la kurtenojn, por ke ni povu rigardi nian panjon denove tiel, kiel en la pasintaj tagoj. Ni ja vidis ŝin. Ŝi ne aspektis kiel la panjo, kiun mi konis. Fakte, mi apenaŭ rekonis ŝin, ĉar ŝia korpo estis tiel velkinta, ke la haŭto ŝajnis esti streĉita super la malmulta muskolaro, kiu restis sur la korpo. Ŝi jam ŝajnis esti kadavro.

Dum vizito ĉe mia avino sonoris la poŝtelefono de mia patro. Estis la tempo. Estis la fino.

Ni iris kiel eble plej rapide al la malsanulejo, kaj denove staris antaŭ tiu fenestro por rigardi nian panjon por la lasta fojo. Pro la situacio ni finfine rajtis eniri la malsanulejon dum tridek minutoj por diri niajn finajn adiaŭojn, sed ni devis eniri po du. Unue, mia patro kaj avino

eniris. Poste, mia frato kaj bofratino. Finfine, mia edzino kaj mi povis eniri la ĉambron. Ni eniris, kaj ĉio, kion mi povis aŭdi estis ŝia spirado. Aŭdiĝis muziko kviete ludanta de la televidilo en la ĉambro, sed mi apenaŭ rimarkis ĝin, kiam mi staris apud mia patrino. Ŝia spirado estis laŭta, streĉita, kaj mallonga, kaj mi nombris la sekundojn inter ĉiu enspiro: unu... du... tri... kvar... kvin... ses... sep... ok...

Verdire, mi forgesis la nombron, kiam mi rigardis ŝin. Mi forgesis ĉion, kio estis okazanta ĉirkaŭe, kiam mi rigardis ŝin. Mi estis senvorta dum kelkaj momentoj, tiam mi povis nur peti pardonon pri ĉiu malbona afero, kiun mi iam ajn faris al ŝi, kiam mi estis infano. Dum tiu momento, mi ja estis kiel infano, provanta ne plori antaŭ mia panjo, ĉar mi ne volis, ke ŝi vidu la larmojn aŭ aŭdu la tremon de mia voĉo. Mi staris apud mia panjo, ŝia mano en mia, dum mi diris mian finan adiaŭon.

Tiam mi klinis min por kisi ŝian vangon, rektiĝis, kaj eliris la ĉambron por reveni al la fenestro, kaj daŭrigi la gvaton.

La hundeto

de Paulo Sergio Viana
Brazilo

Je la tria horo posttagmeze, la patrino prenis la dekjaran Peĉjon je la mano, kaj ili piediris dum unu horo sub forta suno ĝis la hospitalo. Tie ili devis atendi en vico, sur la trotuaro, ĝis ili povis en grupeto eniri ĉambron, kie ili longe atendis. Alvenis fine flegistino, kiu legis sur pape-ro pri la sanstato de la parencoj. Vizitantoj ne rajtis persone veni apud la liton de siaj familianoj por ĉeeste vidi kaj alparoli ilin. Ili apenaŭ ricevis informojn legitajn de la flegistino:

“S-ro Roberto Malak: li statas same kiel hieraŭ, en severa stato. Liaj pulmoj estas okdek procentojn damaĝitaj. Li spiras per aparato. Li dormas sub efiko de medikamentoj. S-ino Vera Belina: ŝi iomete pliboniĝis, de hieraŭ ŝi ne prezentas febron. Ŝi estas mense konfuza. Fraŭlino Berta Lima Souza...”

Kaj la raporto longe daŭris, monotona kaj senemocia. Peĉjo nenion komprenis. Li petis veni kun sia patrino, ĉar li sopiris avinjon. Li volis vidi kaj alparoli ŝin. Sed ĉiutage oni ripetis al li, ke ne estas permesata alproksimiĝo al la malsanuloj. Peĉjo ne komprenis.

Ĉiutage okazis la sama litania raportado de flegistino. Kiam ŝi legis la nomon de avinjo, li eksaltis el la seĝo. Vane. Ĉiam tiuj misteraj frazoj, kiuj por Peĉjo nenion signifis. Li nur deĉifris ĉi tiun esprimon: “Severa sanstato”.

En la tria tago, kiam Peĉjo alvenis al la hospitala pordo kun la patri-no, li rimarkis, ke hundeto kuŝas apud la pordo, sur la trotuaro, inter la viciĝintaj homoj. Kaj ankaŭ en la kvara tago, en la kvina, en la sesa. Ĝi ĉiam kuŝis sur la sama loko, proksime al la enirejo. Neniu atentis pri ĝi, same kiel neniu atentis pri Peĉjo.

Ĉirkaŭ la deka tago la patrino ne alvokis Peĉjon. Kiam alvenis la tria horo posttagmeze, li demandis:

“Ĉu ni ne iros al la hospitalo, panjo?”

– Ne, Peĉjo, hodiaŭ ni ne iros tien.”

Peĉjo nenion demandis. La sekvan tagon, la patrino denove neglektis la viziton. Peĉjo ne komprenis, sed prenis decidon. Li iros sola! Kaj tion li faris, kaj post unuhora paŝado li alvenis al la hospitala pordo. La hundeto kuŝis en la sama loko. Peĉjo enviciĝis, envenis la atendoĉambro kaj atendis la raportantan flegistinon. Ŝi longe raportis pri multaj pacientoj, sed kvankam li atendis ĝis la lasta raporto, li ne aŭdis la nomon de avinjo. Peĉjo konfuzite eliris el tiu malfeliĉa ĉambro. Kiam li revenis sur la trotuaron, antaŭ la hospitala enirejo lin kaptis ĝojiga surprizo. Sur rulseĝo blankhara, maldika maljunulo estis transportata en taksion. Peĉjo komprenis, ke li resaniĝis de la sama malsano kiel tiu de avinjo. Sur la trotuaro, la hundeto kun neesprimeble vigla ĝojo saltis sur la genuojn de la maljuna viro, kaj fervore lekis lin kaj bojetis gaje kaj entuziasme. La hundeto atendis sian amaton dum pluraj tagoj, ĉe la enirejo. La maljunulo same karesis lin vigle kaj emociite, kaj pluraj homoj ĉirkaŭe miris kaj ridis. Ambaŭ eniris taksion kaj forveturis.

Peĉjo penseme revenis hejmen. Li estis feliĉa pro la hundeto. La ĵus viditan scenon li nepre raportos al la patrino.

Beno aŭ malbeno

de Nicole Else

Aŭstralio

Helen kaj Sofi estas junaj virinoj, kiuj loĝas en Sidnejo. Ili ambaŭ estas 30-jaraĝaj kaj ne havas vivpartneron kaj do vivas solaj en malgrandaj apartamentoj. Ili ambaŭ laboras en restoracio, sed ne en la sama. Ili ne konas unu la alian. Iliaj vivoj estas bone organizitaj, kaj ambaŭ estas ne perfekte feliĉaj, tamen ankaŭ ne vere malfeliĉaj. Helen deziras renkonti belegan viron, sed ĝis nun ŝiaj amrilatoj ne estis longdaŭraj. Ankaŭ Sofi ŝatus trovi vivpartneron, sed ŝi ne tiom senpacienca kiel Helen. Sofi sopiras pri honesta, fidinda viro. Beleco ne tiom gravas al ŝi.

Ambaŭ virinoj estas sanaj kaj ankoraŭ ne spertis gravajn sanproblemojn. Ili estas junaj kaj ne vere timas malsaniĝi. Sed jen ekestas viruso, kiu povos mortigi multajn homojn. La registaro decidas devigi homojn resti hejme kaj eliri kiel eble malplej ofte nur pro gravaj kialoj.

Helen kaj Sofi ambaŭ perdas siajn laborpostenojn. Ĉu ili same reagos? Helen tuj pensas, ke ŝi ankoraŭ ne montris al siaj amikinoj sian novaĉetintan robon. Ŝi intencis renkonti kelkajn amikinojn dum la semajnfino kaj nun ŝi tion ne povos fari. Kiom ĝene! Sofi tuj pensas, kiel bone, mi povos surhavi miajn komfortajn noktovestaĵojn dum la tuta tago. Mi ne plu devos cerbumi, kion mi surmetos.

Helen demandas sin: “Kion mi faros hejme? Mi terure enuos.” Sofi diras al si mem: “Finfine mi povos legi la multajn librojn, kiujn mi aĉetis, sed ankoraŭ ne sukcesis legi.”

Helen decidas spekti televidon, sed sufiĉe rapide ŝi perdas intereson. Feliĉe ekzistas telefonoj. “Mi tuj telefonu al amikino.” kaj dum du horoj ili babiladas. “La vetero estas iom malvarma nun, ĉu ne?” “Jes estas ja vintro. Nur dek ses gradoj. Vere frostas. Mi ne plu povas surmeti mian T-ĉemizon kun mallongaj manikoj.” Kaj jen tiel ili babiladas pri malgravaj temoj kaj la tempo forpasas.

Dume Sofi ĝuas tre trankvilan tempon legante bonan romanon. Tamen la telefono sonoras kaj interrompas ŝian legadon. “Diable, mi respondu. Kiu telefonas? Ho ne, nur estis vendisto, kiu volas vendi sun-energiajn panelojn. Ree al la legado.”

La postan semajnon okazis la naskiĝtago de Helen. “Ho ve, mi volas grandan feston kiel kutime. Mi volas amuziĝi.” “Ni ja povos gratuli vin per *Zoom*.” diris kelkaj geamikoj. “Jes, sed tio tute ne estas sama.”

Ankaŭ Sofi havis naskiĝtagon. Sed ŝi feliĉis, ke ĉi-foje ŝi ne devos babili kun la enuigaj familianoj. “Mi povos fari tion, kion mi vere volas. Mi ne devos provi esti ĝentila kun la aĉa onklino, kiun mi ĉiam devas inviti por ne malkontentigi mian patron.”

Tempo pasas. Post kelkaj semajnoj la registaro permesas al homoj renkontiĝi kun 2–3 amikoj. Grandaj grupoj ankoraŭ estas malpermesataj. Helen ege ĝojas. Ŝi tuj organizas renkontiĝon kun amikino. Aliflanke Sofi konscias, ke ŝi vere bezonis tiun trankvilan periodon hejme, kiam ŝi povis multe legi kaj pasigi tempon enrete por trovi informojn pri la temoj, kiuj tre interesas ŝin.

Divenu, kion Sofi faris krom legi librojn. Ŝi decidis lerni Esperanton. Ŝi diligente sekvis retajn kursojn kaj ekbabilis kun kelkaj personoj. Unu el ili estis ĉarma, sprita junulo, kun kiu ŝi komunikis unue skribe kaj poste per Skajpo. Baldaŭ ili povos renkontiĝi. Kio okazos? Nu, tio estas alia historio.

Amo kaj EKMO

de Keyhan Sayadpour Zanjani

Irano

Svelta, alta, bela, kaj ĉiam bone ŝminkita. Sendube, Elif estis la plej alloga anesteza teknikistino, laboranta en nia operacia ĉambro. Ŝi ĉiam portis vestojn kun allogaj koloroj. Mi neniam forgesos tiun matenon, kiam mi vidis ŝin en la korto de nia hospitalo, kun helruĝaj pantalono kaj mantelo. Ŝi ne kredis al ŝtrumpoj. Kvazaŭ ŝtrumpoj ne ekzistus aŭ ne utilis. Ŝiaj piedoj ĉiam estis nudaj, ĉu laboreje, ĉu ekstere. Ŝi estis ankaŭ tre sperta pri siaj taskoj. Malofte okazis problemo, kiam ŝi anestezis pacienton.

Ŝi iĝis edzino de Ilkay, eleganta viro, kiu posedis vendejon de poŝtelefonoj en la urbocentro. Ŝi tre ĝojis pro tiu geedziĝo, kaj vere amis Ilkay-on. Ankaŭ Ilkay sentis grandan kontenton: kaj bela edzino kaj multe da vendo. La hospital-kolegoj mendis siajn deziratajn poŝtelefonojn pere de Elif kaj Ilkay. Elif kunportis aĉetaĵojn al la hospitalo kaj donis al la aĉetantoj. Verŝajne mi estis la nura kolego, kiu ne aĉetis poŝtelefonon tiel.

Elif decidis studi pri kor-pulma aparato kaj fariĝi ĝia teknikisto. La aparato anstataŭigas homajn koran kaj pulman funkciojn portempe. La sango alvenas de la korpo al la aparato per speciala pumpilo kaj tubo, kaj post ricevado de sufiĉe da oksigeno tra la membranoj, ĝi reiras tra tubo al la korpo de la paciento. Dum kor-operacioj ĝi funkcias anstataŭ la koro de la paciento, kiam estas bezonate haltigi la batojn de la koro kaj operacii ĝin. Alia uzo de tiu sistemo estas por pacientoj, kiuj havas portempajn kor- aŭ pulm-problemojn, kiam oni anstataŭe uzas aparaton nomatan Ekster-Korpa Membrana Oksigen-provizilo (*EKMO*). Tre similas la funkcioj de ambaŭ aparatoj, kaj ĝenerale kontrolas ilin la sama teknikisto.

La studado daŭris du jarojn kaj Elif fariĝis pump-teknikistino. Ne estis vaka posteno por ŝi en nia hospitalo. Do ŝi eklaboris en alia hospitalo specialiĝinta pri pulmaj malsanoj.

Okazis la pandemio; tempesto, kiu detruis multajn animojn en nia lando. La hospitalo de Elif fariĝis la ĉefa centro por kovimuloj. Elif fariĝis respondeca teknikisto pri EKMO por kovimuloj. Ĝi ĉefe estis uzata por homoj serioze trafitaj de la viruso kun severa pulmo-malsano. Elif ĉefe flegis tiujn pacientojn, do ŝi estis en granda risko de infektiĝo malgraŭ ĉiuj protektiloj. Evidente ŝiaj proksimuloj estis en la sama situacio.

“Ilkay estas serioze malsana pro kovimo. Li estas sub EKMO. Preskaŭ nur Elif zorgas pri li, tage kaj nokte. Ni timas, ke ankaŭ ŝi malsaniĝos. Tamen, ŝi deziras tion fari.” diris al mi nia anesteza teknikistino kaj amikino de Elif. Mi respondis: “Kia katastrofo! Li estas relative juna. Kiom da tempo li estas sub tiu aparato?” Ŝi respondis: “Estas du semajnoj. Oni diras, ke la ŝanco reveni estas tro malgranda. Vi pravas. Li estas nur 36-jaraĝa.” Ĉu Elif transdonis la viruson, ĉu Ilkay infektiĝis pro la tumulto de klientoj en la vendejo urbo-centra, mi ne scias. Tamen, la viruso serioze malbeligis ilian vivon.

Semajnoj pasis post semajnoj. Kiam lunde, kiel kutime mi iris operacii, mi demandis mian koleginon pri la farto de Ilkay. La respondo estis la sama, li estis ankoraŭ ligita al la aparato kun nefunkciantaj pulmoj. Tamen, mirakle venis bonaj respondoj post ok semajnoj. La funkciado de la pulmoj de Ilkay komencis reveni. Necesis pluaj kvar semajnoj por liberiĝi de EKMO kaj ankaŭ aliaj pluaj semajnoj por reveni al la hejmo kaj normala vivo. Kvankam Ilkay neniam reakiris sian antaŭan sanon, li ŝuldas sian vivon al la amo kaj EKMO de Elif.

La sekreta recepto

de James Bridge

Kanado Dua premio

Antonio kaj Maria sidas flank-al-flanke ĉe malgranda tablo en la kuir-ejo, dum griloj ĉirpas ekstere. Frida, vespera aero trablovas la fenestrojn kaj portas la odoron de boletanta tomata saŭco de larĝa pato sur la bakforno, kaj la sono de bolanta akvo en potoj flustras en la silento. Surplafona lampo lumigas la kuirejon, sed preter la eta ĉambro, la resto de la domo dormas en mallumo.

Juna Maria klinas sin sur la ŝultro de la patro kaj suspiras malĝoje. Antonio reciproke klinas sin al ŝi. La duopo vagas en la propraj pensoj dum kelkaj minutoj, ĝis kiam Antonio diras: “La pastaĵoj estas pretaj.” Maria lasas lin stariĝi kaj klinas sin antaŭen sur la tablo. Antonio iras al la bakforno, levas la poton, kaj verŝas ĝin en atendantan kribrilon en la lavopelvo. Li ripete skuas la kribrilon por forfluigi la akvon, verŝas la pastaĵojn en la larĝan paton kun la saŭco, fermas ĝin per kovrilo, kaj malŝaltas la brulilon.

Antonio daŭre staras ĉe la bakforno kaj rigardadas tra la malferma fenestro al la foraj steloj malantaŭ la branĉoj de la alta citronujo en la gazono. Li murmuris: “Via avo amegis tiun citronujon. Mi ankoraŭ ne scias, kiel li kreskigis ĝin tiel granda en ĉi tiu norda klimato.” Maria kliniĝante sur la tablo iom turnas la kapon flanken kaj respondas: “Franko ĝercis, ke li donacus dek du botelojn da *limonĉelo* al mi, post kiam mi diplomigis de mezlernejo.” Antonio kapjesas konsente. “Ni estis plukontaj la citronojn ĉi-somere.” Li volas ion pli rakonti, sed ĉesas kaj nur krucas la brakojn kaj kulpe rigardadas la citronujon. Maria levas sin de la tablo, residiĝante en la seĝon, kaj faldas la manojn en la sino. Ŝi fiksrigardas la larĝan paton sur la bakforno kaj diras konfese: “Li volis instrui al mi la sekretan recepton de la tomata saŭco. Ĉu li iam kunhavigis la recepton al vi?” Antonio turnas sin por rigardi la filinon kaj apogas sin sur la bakforno. Li mansvingas al la malgranda

tablo meze de la kuirejo, kaj deklaras kun iom da rido: “Nun nur la tablo scias liajn sekretojn.”

Maria klinas sin antaŭen, puŝas la orelon sur la surfacon de la tablo, kaj fermas la okulojn. Tia ŝi atendas, kvazaŭ la makulita ligno flustretus al ŝi la sekreton de la saŭco. Antonio rimarkas: “Franko iam diris al mi, ke la sekreta ingredienco estas laŭrofolio.” Maria daŭre tenas la orelon al la tablo kaj kviete respondas: “Li mensogis.” Antonio iom ridas kaj ĵetas la manojn aeren dirante: “Nu bone, kara ĉiosciulo, mi supozas, ke la tablo sciigos al vi la veron?” Maria suspiras kaj relevas sin de la tablo. Ŝi kapneas kaj diras: “Li profitis laŭrofoliojn nur en viandohavaj saŭcoj, sed li diris al mi, ke la sekreto estas en tio, ke li nepre neniam metas cepojn en tomatan saŭcon.”

La duopo ignoras unu la alian, kaj ambaŭ studas la larĝan paton, en kiu la pastaĵoj absorbas la saŭcon. Fine Antonio diras: “Tiom da saŭco en la pato estas la lasta el la frostigujo.” Maria stariĝas, portas kelkajn telerojn de la breto, kaj transdonas iun al la patro. Ŝi malfermas la paton, kaj densa nubo de bonodora vaporo fantomumas de ĝi. Antonio prenas kelkajn forkojn el la tirkesto, transdonas iun al Maria, kaj per la alia servas al si pezan porcion. Maria servas al si pli malgrandan porcion. Residiĝante flank-al-flanke ĉe la tablo, Antonio gratas iom da pliaĝinta fromaĝo sur ambaŭ telerojn. Li aspektas manĝonta, sed forkmontras al Maria: “Franko ĉiam kuiris ĉi tiun saŭcon honore de geedziĝoj kaj postfunebraj renkontiĝoj.”

Maria faligas la forkon, esploras, kaj kovras la vizaĝon. Ŝi balbutas: “Neniu kuiris pro lia morto.” Antonio klinas sin al la filino kaj ĉirkaŭbrakumas ŝin, konsolante: “Li estis donema, plaĉus al li scii, ke li ankoraŭ donas eĉ nun.” Maria daŭre ploras pro la kara avo: “Li mortis sola en la malsanulejo, kaj ni ne rajtis eĉ teni lian manon!” Ŝi skuetas en la brakoj de la patro, kaj krietas: “Ĉe la fino, li eĉ ne povis paroli pro la spirigilo, kaj ni neniam adiaŭis!”

Antonio tenas ŝin preme en la malgranda kuirejo, kaj la duopo sidas kune, kvazaŭ preĝante ĉe tablo, kiu ne kapablas ellasi la sekretan recepton de la lasta tomata saŭco de la grandaĝulo, kies odoro forŝvebas tra la malfermita fenestro preter la citronujon, el kies citronoj neniam plu fariĝus alia botelo da *limonĉelo*.

Domkato

de Anne Frances Calceta

Filipinoj

La vivo de domkato ofte ne estas okazplena. Mia vivo ne estas aparta. Ĉiutage, mi saltas al la tablo apud la fenestro kaj mi rigardas la mondon. Kutime, multaj homoj promenas kaj multaj aŭtoj pasas sur la strato antaŭ mia domo.

Tamen, la pasintaj semajnoj estis strangaj. Fakte, io misas. Io ŝanĝiĝis.

Ĉiu kato, kiu havas domon, havas homon. Kaj mi ne estas aparta. Tial, ni komencu per mia homo.

Subite, mia homo ŝajnas havi pli da semajnfinoj. Ĉu ĉiutage estas semajnfino nun? Mia kutima tagmeza dormeto interrompiĝas per neatendita, sed bonvena kareso. Mia homo ofte estas ekster la domo tiam, sed ŝi estas ĉi tie nun. Ŝi restas en nia domo la tutan tagon.

Nuntempe, kiam ŝi eliras la domon, ŝi ne surmetas lipruĝon. Ĝi estas tre stranga. Mia homo estas bela virino kun komplika ŝminka rutino. Ŝi havas grandan aron da ŝminkoj. Nun, ŝi kovras sian vizaĝon per blua masko. Kiel ŝi allogos koramikon, se neniu povas vidi ŝian belan rideton?

La sekva afero, kiun mi volas mencii, estas mia elvido de la fenestro. Antaŭe, ĝi estis tre interesa! Mi vidis ĉiujn homojn marŝi kien ajn ili bezonis iri. Nun, ĝi estas tiel enuiga! Mi vidas tiom malmulte da homoj.

Fine, mi mencias la amason da skatoloj en mia domo. Estas grandaj skatoloj, malgrandaj skatoloj, kaj skatoloj tiel grandaj kiel katoj. Mi pensas, ke mia homo tre ŝatas interretajn liverojn.

La skatoloj estis pakumoj por io. Sed nun ili estas miaj teritorioj! Mi tre ŝatas skatolojn!

Kiam mi mencias tiujn ŝanĝojn al vi, mi ekmemoras, ke la skatoloj estas la solaj bonaj aferoj, kiuj venis de la afero nomata "pandemio". Ĉio alia estas stranga aŭ malbona.

Mia homo ne ofte spektis televidon, sed nun ŝi sidas sur la sofo samtempe ĉiunokte por spekti la novaĵojn. Dum tiuj tempoj mi saltas sur la sofon kaj eksidas apud ŝi.

“La pandemio malboniĝas.” ŝi diras al mi. “Ĉu la mondo finiĝos baldaŭ?”

Ŝi maltrankviliĝas kaj mi volas trankviligi ŝin. Mi responde miaŭus, sed ŝi ne komprenas min.

Mi ne tute komprenas. Kio estas tiu afero, nomata “pandemio”? Tamen, mi certe scias, ke io malbona okazas. Kio estas “viruso”? Mi ne vidis ĝin en la novaĵoj kaj mi nur aŭdis ĝin menciita de la novaĵprezentisto. Mi scias, ke ĝi estas granda malamiko, kun kiu la homoj batalas.

Sed mi ne povas vidi ĝin. Neniu povas vidi ĝin. Kvankam tio estas nevidebla, multaj mortis pro tio. La situacio estas timiga.

Estis en tiu momento, kiam mi komprenis, kial mia homo maltrankviliĝas.

Tamen post spektado de la novaĵoj ŝi reiras al sia tablo kaj tajpas per sia komputilo. Ŝi devas plu labori. Ŝi devas pagi lupagon por nia domo. Ŝi devas aĉeti manĝaĵoj kaj por si mem kaj por mi. Dum la tuta tago ŝi estas antaŭ sia komputilo. Tio ne estas bona por ŝia dorso.

Se mi nur kapablus paroli anstataŭ miaŭi, mi volus diri al ŝi, ke la mondo revenos al normaleco.

Sed mi ne certas, ĉu aferoj pliboniĝos. Morgaŭ estas necerta. Mi estas nur kato kaj mi ne povas antaŭdiri la estontecon. Sed se mi povus paroli, mi mensogus kaj dirus al ŝi, ke aferoj pliboniĝos, kvankam mi ne certas. Se la mondo vere finiĝos, mi komprenas, kial ŝi sentas sin malbone. Nun ŝi bezonas kredi mensogon, kiu donos esperon.

Foje dum ŝi tajpas ŝi profunde suspiras. Jen mia signalo por salti sur ŝiaj femuroj kaj ronroni. Mi povas fari tion, kion kato povas fari.

La vivo de domkato ofte ne estas okazplena. Mi ne povas fari multajn aferojn, sed mi daŭrigos. Ankaŭ mia homo daŭrigos.

Foje oni ne bezonas fari ion specialan.

Ni devas fari tion, kion ni povas por subteni unu la alian dum tiaj tempoj.

La ŝiro

de Maria Rosaria Spanò

Italio

Jen mi ĉi tie.

Jen mi ĉi tie. Ankoraŭ. Jen mi ĉi tie. Denove.

Ordinara mateno. Eksterordinara tempo. Ripetiĝanta ŝablono. Kutima pandemitempa tago. Kiam la vetero – kaptita en eterna printempkomenco – ne varias, la kalendaro ne vere utilas. En kiu monato ni estas? Mi ne scias, mi ne plu memoras. Fakte, memdefende, mi ne plu pensas pri la tempofluo. Mi antaŭeniras, paŝon post paŝo, tagon post tago.

Mi ĝuas mian sekuran, privilegiitan vivkondiĉon, kio nepridiskuteblas: dehejma laboro, tre kontentiga vivnivelo. Do, tute ne estas kialo plendi aŭ eĉ senti sin malkomforte. Tion mi klopodas vane klarigi al mia origina familio, kiu ekde ĉiam konsideras min kompatinda. Sed ne, mi havas preskaŭ senriskan vivon, mi estas pli bonŝanca ol aliaj, ni agnosku tion. Mi vivas en blendita kiraso. Mi strebas iĝi aŭtomato. Ellitiĝi, labori, manĝi, labori, manĝi, enlitiĝi. Kaj tiel dekomence, la postan tagon. Jes, certe, mi legas, ankaŭ, sed mi ne plu memoras, kion mi legas, tio verŝajne ne estas tiom bezonata por supervivi, kaj mi verkas, sed estas amaso da rozkoloraj malveraĵoj, kiujn mi surpaperigas por plaĉi al aliaj, por ne malstabiligi la rilatojn kun miaj familianoj kaj por trankviligi ilin, ke jes, mi fartas bone, kaj ke mi estas lumjarojn for de perturbaj aŭ obsedaj pensoj. Fakte mi ne volas pensi, mi ne plu pensas. Unu taskon post la alia, unu retkunsidon post la alia.

Jen mi, ĝuste dum unu el tiuj senutilaj virtualaj kunvenoj. Laŭ kelkaj, ili helpus ne perdi homan kontakton, sed simple mi ne plu eltenas sonojn, bruojn, voĉojn, nebezonatajn babiladojn facile anstataŭigeblajn per mallonga retmesaĝa interŝanĝo. Eble tio estas nur mia problemo: aliaj tiom ĝuas retajn renkontiĝojn, ke ili eĉ sukcesas kunmanĝi, kundrinki, kunfesti. Mi ne. Mi eĉ ne plu eltenas rigardi mian

moviĝantan bildon videe, tiun bildon, kiu neniam respondas je mia reala aspekto.

Ĝuste dum tiaj kunsidoj mia menso meminiacie ekpromenas laŭ mallumaj flankaj stratetoj – serpentumaj, glitigaj – anstataŭ resti konstante ĉe la ĉefa strato, tiu rekta vojo, kie miaj paŝoj skandiĝas laŭ la ritmo de atendoj de aliaj pri mi, de ripetiĝantaj taskoj, tiu vojo de privilegiita homo, kiu sume ne rajtas malbonfarti – objektivite, rigardu ĉirkaŭ vin, vi havas nenion priplendindan.

Dum mia distriĝinta menso eksekvas unu el tiuj stratetoj, aŭ almenaŭ dum ĝi klopodas tiel emancipiĝi de la tiraneco de la ĉefa strato, mi deturnas la rigardon de la ekrano kaj direktas ĝin al la teraso.

Abrupte mi aŭdas ferocajn birdokriojn kaj furiozajn flugilfrapojn falantajn de iu punkto super la fenestro apud mi. Tuj poste nigra fulmo trairas mian vidkampon.

Ĉi-jare, tute nekutime, mi vidis plurajn korvojn sur la teraso. Ili fascinas min. Ekde kiam mi legis kelkajn elvokivajn, sonĝetosajn, malkvietigajn poemojn pri korvoj, tiuj birdoj havas por mi kvazaŭ supernaturan karakterizon. Strange, ke mi vidis tiom multe da ili ĉi tie, lastatempe.

Tiu korvo tamen kunportas ion kun si, ion kion mi volonte preferus ne identigi. Ne estas multe da konjekteblo: ĝi kuntrenas la inertan korpeton de senpluma birdido.

Mia koro ekbatas pli energie. Mi neniam vidis ion tian antaŭe.

Kiel sub magneta forto mi bruske ekstaras por pli bone rigardi, kaj la korvo – jes ja, mi scias, kiom evoluinta estas ĝia cerbo – tuj komprenas kaj forflugas, momente sen sia predo. Ĝi haltas sur apuda kornico.

Ie mi legis, ke korvoj tre malofte atakas nestojn de aliaj birdoj. Sed ne ĉi-foje. Ĉi-foje ne temas pri kutimaj cirkonstancoj. Tiu feroca krido, tiu furioza flugilfrapado. La vaĉantoj de la nesto – kolomboj, tre probable – kontraŭ atakanto, la korvo, verŝajne mem respondeca pri sia nesto. Primitiva instinkto de supervivado. La nura imperativo, kiun ĉiuj sekvis, estas la plenumo de la praa promeso pri specidaŭrigo, kiu ne konas kompromison.

Kaj ĉio ĉi manifestiĝis apud mi, antaŭ miaj okuloj plenaj je tedo kaj angoro pro la artefarita vivo, kiun mi trenas ekde pasintjare.

Mi skuas min. La fona zumo de la sensenca reta blablaumado denove aŭdiĝas. Mia sangofluo forte senseblas.

Dum momento, nur dum unu momento, ŝiro trastrekis la unukoloran, ripetiĝantan pandemian tempofluon, kaj tra ĝi enrompiĝis io alia. Enigmo, la sama enigmo, kiu malliberigas min per angoraj pensoj, kiu intensigas la sangofluon en miaj vejnoj, kaj kiu dekretis, ke la korvo, senscia ambasadoro pri io forglitiĝema, nekaptebla racie, en tiu ĉi ŝaj-nordinara mateno, enkarnigu ion universalan, praan.

Kaj jen, danke al tiu efemera konscilumero, mi ekvidis la fragilan ĉeneron en la plano de la mondo, kiu samtempe kontraste kaj fulme malkaŝis ĝiajn konturojn, ĝian intrigon, la sencoplenan freskon, kiu tamen tuj disfalis, ĉar miaj okuloj ankoraŭ ne estas sufiĉe klarvidaj.

Sur la teraso restis nenio: la korvo kaj ĝiaj idoj supervivos, hodiaŭ.

Antaŭ la truo de kuniklo

de Midori Mamija

Japanio

Iun tagon venis al mi invito al mirlando. “Ni okazigu tetrinkadon!” La invitinto estis redaktoro de ĵurnala kompanio. Du jarojn antaŭe, ŝi vizitis min por proponi al mi kontribui noveletojn al nova gazeto, kiun ŝi ekdirektoris. La ĉeftemo de la gazeto estis lokaj vojaĝoj. Mi akceptis la proponon tamen sub la kondiĉo, ke mi verkos ne fantaziajn rakontojn, sed prozojn el miaj spertoj de vojaĝetoj. Ŝi konsentis kaj baldaŭ la gazeto estis lanĉita. La vivo de tiu gazeto estis mallonga, tamen kaj ŝi kaj la legantoj ĝuis miajn etajn prozojn dum la jaroj.

Tiam, mi tute senesperigis pri fikciaj rakontoj – aparte pri fantaziaj, kiajn mi verkadis – kredeble pro la morto de mia amiko. Ankaŭ li estis novelisto kaj daŭrigis verkadon eĉ sur la lito de malsanulejo. Lia lasta mesaĝo al mi estis: “Mi nenion povas manĝi, sed anstataŭe legas novelon, en kiu aperas multaj manĝaĵoj.” Mi ne respondis al li, ĉar mi ne trovis vortojn por respondi.

Mortoj de miaj amikoj ĉiam batis min sub la teron. Sed lia morto silente trapikis mian koron. La afero estingis mian fajron pri rakontoj, kiuj iam faris mian koron sune arda. Mi kaŝis, ke mi estis preskaŭ mortinto kiel rakontisto, kaj laboris kvazaŭ aŭtomato en kampoj de rizo kaj vintre frumatene en fiŝ-bazaro. Tiuj okupiĝoj ŝajne donis al mi ekskuzon, kial mi neglektis mian verkistan agadon.

La redaktoro de nova gazeto tiutempe aperis antaŭ mi. Ŝi diris, ke leginte mian romanon, ŝi tuj volis proponi, ke mi kontribuu al ŝia gazeto. Ŝi amis fantaziajn novelojn, de kiuj mi forkuris. Kaj ŝi ofte parolis pri sia filo, kun kiu ŝi malfacile pasigis tempon eĉ dimanĉe pro la okupiĝo. Mi verkis prozon, en kiu aperis figuro de mia patrino, por la sekva numero.

Jarojn poste, ŝia kompanio subite decidis ĉesigi la serion de la gazeto. Antaŭ la anonco, venis al mi ŝia letero. Ŝi unue pardonpetis pri la ĉeso

kaj varme skribis, ke ŝi elkore esperas, ke mi daŭre verkos rakontojn. “Certe ni iam revenu al la fantazia mondo!” ŝi diris. Kaj en la lasta linio, ŝi malkaŝis sian deziron organizi libro-klubon de ŝi kaj mi.

Mi delonge organizadis etan kunvenon de mia libro-klubo. Ĉiumonate la membroj kolektiĝis en ĉambro de la kafejo “Feliĉo” kaj diskutis pri la libro, kiun la klubo elektis kiel temon de tiu monato. Opinioj aperis iufoje kun ridoj, aliffoje kun seriozaj mienoj. Babilado kun teo, kafo kaj kukoj. De post kiam mi parolis pri la kunvenoj, la redaktoro ofte rakontis pri sia aspiro pri libro-klubo. Ŝi jam delonge ne havis tempon simple amuzi sin per libroj. “Ni organizu ĝin en mia urbo!” ŝi ripetis ĉiam, kiam ni ĝisrevidis.

Vintre, subite venis al mi retmesaĝo de ŝi. Ĝi estis invito al mirlando. Ŝi diris, ke ŝi planas organizi libro-klubon pri fantaziaj noveloj, kaj volas inviti min kiel specialan gaston. “Krome, ni invitu ĉirkaŭ dek gastojn. La loko estas brokant-librejo. La temo de nia unuafoja rondo estas certe ‘Alico en mirlando’! Do, ni okazigu tetrinkadon tie. Mi kuiras temanĝaĵojn. Mia filo diras, ke li deziras vidi vin. La dato estas post du monatoj, nome februaro 2020.”

En februaro, telefonvokis min la mastro de la brokant-librejo. “Ĉu vi aŭdis pri kronviruso?” tremis lia voĉo. “Estas diversaj, tro diversaj opinioj.” li diris. “Iuj diras ke ĝi ne gravas, sed aliaj diras, ke ni nepre restu hejme. Honeste dirite, mi preskaŭ pensis, ke venas la fino de la mondo.”

Tiutempe, la plej multaj homoj en Japanujo ankoraŭ ne opiniis la influon de kronviruso tiel serioza. En televido, iuj eĉ diris, ke la viruso ne gravas al japanoj, ĉar ili kutime lavas siajn manojn.

Tial mi ne havis kuraĝon nuligi la “tetrinkadon”, kiun la redaktoro finfine volis efektiviĝi. Dume, mi parte kredis, ke ŝia aspiro pri fantazia mondo vekos mian aspiron. Dum la mastro konfuziĝis, la redaktoro kredis la optimisman opinion de Monda Organizaĵo pri Sano, kaj mi, preparinte por prezido, ne sukcesis trovi respondon.

Dimanĉe vespere okazis la tetrinkado. La ĉeestantoj babilis, trinkis teon kaj manĝis kukojn kaj kukumajn sandviĉojn faritajn de la redaktoro, tamen ĉiam kun maskoj, krom kiam ili manĝis aŭ trinkis senvorte. Ŝi venis kun sia filo. Mi kvazaŭ vidis, ke ŝi brile ridetis sub la masko.

Antaŭ ol venis mi kaj la aliaj ĉeestantoj, ŝi kaj la mastro ornamis la librejon per ludkartoj kaj per bildoj de kuniklo kaj Alico. Mi kaŝe komprenis, ke ŝi organizis tiun tetrinkadon fakte plejparte por mi. “Kio mi estas?” Se mi demandus min, mi ne povus respondi. Mi vidis, ke mi en iama tago enfalas en profundan truon, sekvante kuniklon, sed nun mi ankoraŭ staras ĉe la truo senmove.

“Kiam okazos la sekva rondo?” unu ĉeestanto demandis min je la fino de la tetrinkado. Mi respondis: “Eble ni ne povos havi okazon dum unu jaro...” “Unu jaro?” Li faris surprizan mienon. “Almenaŭ kelkaj monatoj, konsidere pri la viruso...” La ĉeestantoj silentis. La redaktoro aldone diris: “Li devas labori en kamparo ĝis plantado. Do, ni revidos post la sezono.” Ĉiuj konsentis, sed ŝajne kontraŭvole.

Apenaŭ la tetrinkado finiĝis, ekpluvis abrupte duŝe. Ŝi veturigis min al la stacidomo per sia aŭto. En la aŭto ŝia filo vigle parolis al mi kaj diris, ke li legis mian romanon. “Mi atendas revidi vian fantazian mondon!” li diris kun rideto sub la masko, kiam ni alvenis al la stacidomo.

Tra la fenestro

de Eveline Ménard

Kanado

el francigis Trefleo Mercier

Tra la fenestro mi ĵetas mian izoligitan rigardon.

Unua vitro

Mi suferas, mia mondo disfalas. De unu tago al la alia, mi perdas ĉion: certecojn, perspektivojn pri la estonto, la pordo fermiĝas kaj mi frapas mian nazon kontraŭ ĝin. Tra la fenestro, mi vidas nur la mallumon de nekomprenemo, la nebulon de malĝojo. Kio mi estis – kiel artistino, kiel civitanino, kiel persono – ŝanĝiĝis, mia ligo kun la aliaj malaperis. Estis hieraŭ kaj estas hodiaŭ. Tamen la eĥo anoncis ĝin al ni. La eĥo de Ĉinio, de Italio, de Hispanio aŭ de Francio. Multe tro da forpaso ĉiutage, sed ni estis tiel for...

Sed ni estis tiel proksimaj...

Post kelkaj semajnoj, tio ja estis alveninta al ni! Kaj ankaŭ la limigaj rimedoj: ne plu aliro al la scenejo, al amikoj, al la familio...

Mi, mi vidas nur min, tro okupatan pri la mastrumado de la ĥaoso, de la perdo de mia laboro, de la necerteco kaj de la maltrankvilo.

Dua vitro

Tra la fenestro, la mallumo densiĝas, la nebulo fariĝas opaka. Mi saltis en la malplenan sen espero surteriĝi. Estas por mi nur la vertiĝo de atendado, la malespero de senpotenco.

Al kio servas ellitiĝi, se estas nenio farota ol atendadi.

Al kio servas vestiĝi, se estas neniu por renkonti.

Al kio servas spiri, se mia aero povas mortigi vin.

Mi fermas la kurtenojn.

Tri a vitro

Inter la kurtenoj, fadeneto de lumo incitas mian okulon. Fadeneto, kiun mi kaptas kiel ŝnuron, kiu portas min eksteren de mi, eksteren de la abismo. Mi relevas mian kapon.

La eĥoj de la mondo memorigas min, ke mi ne estas sola, ke niaj tiom aprezataj vojaĝoj faris el la Tero bulon de renkontoj, ke trairi kilometrojn fariĝis plej facile, ke ne pezas transporti viruson en valizo, sed surpezas multe la sanon de homoj.

Mi komprenas pli bone, ke sen tiuj kolektivaj klopodoj, ni ne povos venki tiun nevideblan aĵon, kiu trafas nin tiel hazarde.

Fragila, mi sentas min kiel kano vipita de la fortaj aŭtunaj ventoj.

Kvara vitro

Tra la fenestro, mi vidas la sunleviĝon.

Tra la fenestro, mi aŭdas birdokanton, branĉon, kiu krakas, la fluaĉdon de la rivero.

Kaj mi eliras, kontemplanta.

Paŝon post paŝo, mi malsovaĝigas la silenton de tiu devigita malakcelo, palpebla, ĉirkaŭprenanta, sed pli minacanta.

De unu pado al la alia, de la rivero al la valo, mi spiras.

De la supro de la monto mi ekvidas ĝermojn de revado, novajn eblojn.

Antaŭ mi, la horizonto senspirige etendiĝas.

Mi sentas la sukcon, kiu fluas en la arboj, la energion de la lumo, la blovon de la vento. Mi estas ĉi tie, nun. Sen nenion scii pri morgaŭ, mi fidus hodiaŭ kaj mi lernas pri hieraŭ.

Kvina vitro

Tra la fenestro, la vetero nubas. Mi estos mia propra sunradio, kiu trairos la nubojn. Mi retrovas la simplajn plezurojn de legado, verkado, muziko.

Mi retrovis la tempon.

Tiun liberigitan spacon mi volas gardi “en la posta mondo”.

Mi rekontaktiĝas pere de intermetita ekrano, retrovas socian distancigitan vivon.

Fizike forigita de la homoj ĉirkaŭ mi, mi proksimiĝas al miaj eksterlandaj amikoj.

Mi atendas retrovi ilin ĉiujn, tio ne malfruos...

Sesa vitro

Tra la fenestro mi vidas mian mondon transformiĝi, mi komprenas la konsekvencon de gesto farita ĉi tie sur vin tie. Interkonektitaj, mi sopiras rekuniĝi kun vi.

Kaj nun mi malfermas la fenestron.

Elbo

de Brandon Sowers

Usono

1

Roberto etendis sian brakon, kaj enmanigis la bulkon pasintnokte lasitan ĉetable. Senpense li voris ĝin, malrapide maĉis, kontrolis siajn sciigojn.

<< *Beldamne farite, bubo! :aplaŭdo: :aplaŭdo: :aplaŭdo: >> Roberto sentis la ekstremojn de sia buŝo sin altiri en rideton, kaj lia memoro revenis al la pasinta nokto.*

Kompleta sentosuperŝuto. La vibro de l' aero plenŝarĝita de muziko. La tento aliĝi al la dancrondo. La tabuosento kiam liaj ŝultraj tuŝoj aliajn, kiam la grupo ĥore kunkriis kantotekstojn, vizaĝ-al-vizaĝe. La skuado de la ligna planko sub la pumpanta korpogregoj. La ŝvitinundo, kio spongigis liajn vestaĵojn. La diversaj belulinoj, kun kiuj li dancis.

Iam li paŭzis sian dancadon, kaj aliĝis al amikoj ĉetable. Unu premis lian ŝultron gratule. "Se mi povus esti ajna persono ĉi tie, mi estus vi! Serioze!" Apude du amikoj ridetis okule-buŝe. Al Roberto mankis respondaj vortoj, sed la ĝojo radiis spegule el lia vizaĝo.

2

La buŝo tenis sian ridetoformon, dum la piedoj drivigis Robertson marborden. La cerbo jam sin ekskuzis silente de la ceteraj korpopartoj, por ŝveli kompane la magrajn nubojn ŝvebtransumantajn marspegulan ĉielon. Tie, ĝi malkovris vojon transdatliman kaj trovis sin denove ĉe la hieraŭa vespero.

Kiam li lastafoje spertis tian karnokunpremon? Ĉu antaŭ du jaroj? Pli?

Memoro aliepoka kraŝigis liajn revojn teren. Revenis alia nokto, longe pasinta, kiam li sentis similan ĝojon, pro dancoenergia, pro kundancado kun bela virino, pro lia kuraĝo eĉ alproksimiĝi al ŝi. La nokton

mem li apenaŭ plu memoris, li povis rigardi ĝin nur flanke: nebulaj formoj, neligitaj momentoj.

Li spektis la scenejon de ekster si mem, kvazaŭ li ĉeestis korpe. Blusa pulso vibrigis l' aeron. Dancantoj plenŝarĝis la malhelan ĉambreton, kaj cigarednebuloj la malmultan spacon inter ili. La odoron de la tabako rivalis nur tiu de la homa ŝvito.

Roberto vidis la pasintan version de si mem iranta al siaj du kompanoj, disdividanta ŝvitantajn ladskatolegojn de akveca biero, la gusto-manko rekompencata per glacia malvarmo.

Pasint-Roberto staris longan tempon apudkompane, tre rekte, rigardante la bandon kaj dancistojn. Roberto sentis nerealigeblan deziron alproksimiĝi al sia pasint-memo, kuraĝigi lin malstreĉiĝi, ĝui la etoson, lasi la muzikon traflui lian korpon.

Finfine Roberto konstatis, ke Pasint-Roberto rigardis pli atente al virino, kiu dancis kun siaj geamikoj. Post minutoj horlongaj, Pasint-Roberto aliris ŝin, alparolis ŝin, kaj ekdancis kun ŝi. Komence iom stumble, sed, post kelka tempo, la ritmo ilin kaptis. Dum kelka tempo ili daŭrigis, kaj Roberto pretervole lasis sian atenton vojaĝi de la paro al la bando. Dum muzikpaŭzo, li provis gvati ilin denove, sensukcese. Li rigardis en la ceteron de la trinkejo, kaj vidis ke Pasint-Roberto pretiĝis eliri kun siaj kompanoj, duonebrie gaja.

Jen ĉio, kion li povis imagi al si pri tiu punkto, negrave kiom forte li provis memori aliajn detalojn. Negrave kiom forte oni provis uzi ĝin kontraŭ li.

Rankor-leviĝo kaŭzis, ke liaj okuloj malsuprenigis lian rigardon, konstatante la ankoraŭ restantan cindrotavolon, kiun liaj piedoj trapaŝas. Kiam vulkano erupciis antaŭ kelkaj monatoj, li imagis, ke temus pri mallonga ĝeno, ke ĉio revenus al la normalo post kelkaj tagoj.

Li rikanis, pensante pri sia iama optimismo. Ne gravas, kiom oni lavas. La cindroj ĉiam revenas.

3

Roberto konstatis la marboliĝon antaŭ ol li eĉ atingis la plaĝon. La ondoj frakasiĝis kun eksterordinara forto, kvazaŭ ili strebis eskapi la maron.

Li enseĝiĝis, prenis sian libron, kaj lasis siajn okulojn trapasi la vortojn, kvankam liaj pensoj restis fiksitaĵoj en la pasinteco. La nokton en la blus-trinkejo li ne povis pripensi, sen ke liaj pensoj ankaŭ revenu al “La Proceso”. La originalan akuzon li negis plenkore, kaj postulis veran enketon. Liaj tiamaj kamaradoj proponis ne trakti la originalan akuzon, kaj bazi “La Proceson” sur aferoj, kiujn ili rifuzis – aŭ ne kapablis – listigi. Restis kiel dorno nur la rakonto pri tiu damna nokto en la blus-trinkejo.

Kiam oni ĵetis denuncon al li pri tiu nokto, ili diris, ke li agis agrese al la dancparulino, li ekdubis sian propran memoron, sian propran memon... Se li kapablus tion fari, eĉ se nur posttrinke, eĉ se nur tiun unikan fojon, kiel li povus plenkore aserti, ke li ne estas esence virinpredisto? Ĉu ne tio en si mem sufiĉu, por ke li akceptu sian fundan kulpecon, la justecon de “La Proceso”, ke li ne taŭgos sen kompleta metamorfozo?

Kiam venis la pandemio, li vidis, ke la socio spertis grandskale, kion li unuope apenaŭ travivis: la malaperon de ĉia stabileco, la nekredemon pri la nuna vero, la baraktemon por reveni al la antaŭa normalo.

Tiam li konstatis, ke restas por li nur tri ebloj. Provi vivi kvazaŭ nenio ŝanĝiĝis; nihilisme rezigni pri daŭra ekzistado; aŭ malkovri signifojn novajn kaj malnovajn por supozeble bazaj konceptoj kiel “homo”, “vivo”, kaj “socio”.

La sirenan kanton de la normalo Roberto sekvis argonaŭte, ĝis li frakasiĝis kontraŭ neviditaj ŝtonoj. Longan tempon li kroĉis sin al floso post sia memo-ŝipo, esperante, ke se li povos nur elteni iom pli longe, certe venos helpo. Sed ju pli la restaĵo dispeciĝis, des pli lia eltenemo ŝrumpiĝis. Estus plej simple lasi la akvon preni lin...

Kiam dispeciĝis la ŝajne lastaj memrestaĵoj, li duonbonvenigis sian mar-ĉirkaŭpremon. Sed, en lia plej kaŝita, lia plej kerna profundo, io ribelis, postulis travivi. Lia korpo kvazaŭ meminiciate eknaĝis, serĉante novan mondon. Fine, li eskapis el la kanto sirena, izoliĝis, insuliĝis. Eĉ nun, dum li sidas ĉemare, luldolĉaj susuroj ankoraŭ kaŝiĝas inter la flusoj, tentante lin reveni al katastrofo.

4

“... ĝis saĝaj trankvilaj vortoj efikos sur vundon neniam tute cikatriĝontan.”

Lia spirofluo ĉesis. Ĉiuj liaj muskoloj tensiiĝis. Li ne povis legi plu.

Roberto konstatis, ke li portis propran vundon necikatriĝintan, ne plu freŝan, jam putrantan: ke li lasis “La Proceson” okazi. Ke li partoprenis sian propran preskaŭ-neniigon.

La atento de Roberto revenis al la maro kaj al la rakontaro. Li sciis nun, el kio konsistos lia venĝo: ke la vivo, kiun li konstruas por si, estos multoble pli plena kaj riĉa ol tiu, kiun li perdis.

Ĉu ne pli bone hejme?

de Jorge Rafael Noguera

Portoriko *Dua premio*

Kiel kutime, Alfredo vekigis je la sesa matene. Neniu devigis lin fari tion nuntempe, kompreneble, sed lia korpo jam al kutimiĝis al la frua rekonsciigo. Li lante elglitis el sia duono de la lito kaj somnole pantoflis kuirejen.

El la ŝranko, li senpripense elprenis du tasojn, sed, ekkonsciiginte pri sia eraro, li remetis unu el ili. Matenmanĝinte, li meandris sencele en la salonon, ne sciante, kion fari nun.

Antaŭ kelkaj tagoj tiu viruso falĉis lian Elinjon. La malsano trafis ŝin neatendite kaj mortigis ŝin rapide. Tre rapide. Tro rapide. Tial, subite, post kvar jardekoj da seninfana, ama geedzeco, da dividado de penoj kaj ĝojoj, da simpla kunestado, li nun solis, vidve, en plene vaka domo.

Onidire la viruso estas aparte mortiga por liaj samaĝuloj, kaj nura tusado kapablas disvastigi ĝin en la aeron. Ĉar li ne volis mem infektiĝi, li faris tujan decidon: li enŝlosiĝu en sia domo, kaj la ekstera mondo restu for. Ĉu ne pli bone hejme, ajnokaze? Kion havas la mondo por doni al li, por feliĉigi lian vivon? Ĝi ja forprenis lian Elinjon, lian solan vivkialon, kaj postlasis al li nur duonmalplenan liton, silentan domon, kaj kruele senfinan vicon da sencelaj tagoj.

Se diri la veron, Alfredo estis deĉiama hejmemulo: li havis nenian problemon sidi en sia fotelo kaj pasigi la tutan tagon legante. Nur Elinjo fojfoje kapablis sukcese elfoteli lin por rendevui amikojn (jam delonge forpasintajn aŭ translokiĝintajn) aŭ por manĝi ĉe najbaraĵa restoracio.

Nun, ke tian instigon viruso forprenis de li, Alfredo havis nenian kialon eliri el sia domo kaj forlasi ties ŝirmadon. Tial, li preparis sin por izolita vivo plena de paco, silento, kaj neniu alia homo.

Feliĉe, sen tio, ke li eĉ devu meti piedon ekster sian domon, li havis ĉion, kion li bezonis por vivi. Elinjo sufiĉe lerte manovris interreton, kaj antaŭvidinte sian forpason, ŝi antaŭmendis por li manĝaĵon

liverotan ĉiusemajne rekte hejmen. Alfredo devis simple malfermi la malantaŭan pordon lunde matene kaj, kvazaŭ magie, tutsemajna provianto estis jam tie. Lia postemeritiga pensio aŭtomate deponiĝis en lian bankokonton, kaj ĉiuj liaj monataj hejmaj elspezoj same aŭtomate depreniĝis de tiu sama konto. Li vere devis zorgi pri nenio, krom kiel alfronti tiun domon malhavantan lian edzinon.

Kiel distraĵo, teĥnologio ne utilis al li: li ne spertis pri komputiloj, poŝtelefonoj aŭ eĉ televidiloj – kaj kial lerni tiaĵojn liaaĝe? Ankaŭ ne utilis aŭskulti radion aŭ legi ĵurnalojn: lia vivo jam sufiĉe tristis, kaj la novaĵoj neniam venigas feliĉon. Tamen, la plej simpla plezuro mergiĝi en atentoraban romanon ja iom mildigis la enuon vegeti la tutan tagon, tagon post tago. Do, li komencis vori la librojn, kiuj plenigis liajn bretarojn, malatentitajn kaj nelegitajn dum jaroj.

Iun tagon, tamen, Alfredo ekkonsciis pri tio, ke li jam legis ĉiun libron en sia kolekto. Kelkaj el ili certe meritis relegadon, kaj tiujn li relegis; sed venis la momento, kiam li eĉ konsideris rapidan viziton al la promendistanca urba biblioteko por restoki siajn bretarojn. Li memoris, ke unu el la deĵorantoj ĉiam rekonis lin, kaj plej volonte helpis lin elekti taŭgajn legindaĵojn. Sed finfine li decidis nee: tio postulus rezignon de la doma sekureco, eventuale danĝeran forlason de tiu ora kaĝo, kiu tenis lin sana samgrade, kiel ĝi tenis lin sola.

Tiuj tagoj en memizoliĝo semajniĝis, kaj la semajnoj baldaŭ monatiĝis. Ĉiu tago identis al la aliaj, kaj estis jam nenombrebla sinsekvo el ili. Kiam tiu telero frakasiĝis, dum li lavis la vazaron? Ĉu la pasintan semajnon? Ĉu la pasintan monaton? Ne gravas. La tagnoktoj spaliris senfine, senkomplete, sen-Elinje, cele al finfina sakstrato nomita Morto, kiu tamen ne venis, tamen ne venis.

Memoroj pri Elinjo sieĝis Alfredon tra la tuta domo, iamaj banalaĵoj, kiuj subite graviĝis pro ŝia foresto: kiel ŝi emis dismeti multpecajn puzlojn sur la salonan tablon (sed neniam fakte kompletigis ilin); kiel ŝi senpripense kantetis mallaŭte, dum ŝi senpolvigis la meblojn; kiel ŝi sidis ĉe la skribotablo dum horoj por verki leterojn al siaj amikoj kaj parencoj. Elinjo ĉieis, maleste; la ĉambroj plenis de ŝi, vake.

Preskaŭ jaro pasis, ekde kiam Alfredo decidis protekti sin kaj prifajfi la ceteran mondon, kaj la decido videble pezis sur lin. Liaj okuloj ka-

viĝis en lia nerazita vizaĝo, lia haŭto senkoloriĝis manke de suno, kaj lia netondita griza hararo pendis el lia kapo, olea kaj glima. Traleginte ĉiujn el siaj libroj jam plurajn fojojn, li ne plu sciis, kion fari por senigi sin je tiu prema, sufoka samtageco, kiu sieĝis lin de tiom longe.

Li komencis demandi sin, ĉu valoras la penon resti ankoraŭ hejme. Ĉu ne pli bone gustumi ian liberon ekstere, inter aliaj homoj, ol daŭre sperti solecon endome, inter la samaj kvar muroj? Kial celi al sekureco ĉiel ajn, timante malsaniĝon, kaj rezigni ĉian homan akompanon kaj konsolon?

Li finfine konkludis, ke li ne plu kapablis elteni sian ermitecon, ke li ne povus resti en sia loĝejo eĉ unu plian tagon, akompanata nur de ree tralegitaj libroj, polkovkovritaj bretaroj, kaj la memoroj de Elinjo hantantaj ĉiun lian paŝon. Ĉu ŝi volus, ke li velku morne en la ombroj, aŭ ke li floru gaje sub la suno?

Findecidiĝinte, Alfredo tuj komencis plani sian baldaŭan liberon. Li unue celos la etan kafejon, kiun li kaj Elinjo frekventis semajnfine (kie la kelnerino ĉiam sidigis ilin apud la fenestron kaj tre afable babilis kun ili), poste li vizitos la urban bibliotekon por akiri freŝajn legaĵojn, kaj poste li iros al tiu najbaraĵa parko, kie ili foje promenis duope post la vespermanĝo.

Alfredo ekscitite malfermis la ĉefpordon, kiu, manke de uzo, knaris reziste.

Kiam li elpaŝis eksteren sur la perono, li tuj enspiris la freŝan aeron kaj ĝuis la varman sunon, kiu logis lin pli foren el la domo, liberecen.

Kiam li atingis la trotuaron, tamen, haltigis lin maskita policano, kiu tiumomente patrolis laŭ la strato. “Ho! Sinjoro! Kien vi iras? Ĉu vi ne aŭdis, ke la registaro hieraŭ dekretis trudizoliĝon pro KOVIM-19?”

“Pardonon, sed kio estas tio?” scivolis Alfredo, surprizite.

“Kiel eblas, ke vi ne aŭdis pri KOVIM-19 kaj la tutmonda pandemio?” skeptike rikanis la policano. “Ĉu vi kaŝiĝis sub ŝtono dum la pasinta monato?”

“Fakte, mi estas hejme, ekde kiam mia edzino mortis pro gripo, antaŭ preskaŭ unu jar...”

“Nu, mi bedaŭras pri tio, sinjoro, sed ĝuste nun vi devas reiri hejmen, kaj resti tie ĝis la registaro decidus, ke estos sekure eliri. Reendomiĝu,

mi petas.” La policano ĝentile, sed neŝancebleble pelis Alfredon reen en la domon, kaj tute malatentante la senesperon en ties okuloj, li aldonis senzorge: “Ĉu ne pli bone hejme?”

Printempo 2020

de Tatjana Auderskaja
Ukrainio

Neforgesebla estis printempo de la jaro 2020. Jam delonge mi ne perceptis la vivon tiel forte kaj freŝe; jam delonge la sensoj ne estis tiom akraj. Okazis granda ŝanĝo en la mondo, abrupte ŝanĝiĝis ĉio, forŝirante la multjaran ŝelon de rutino, de kutima ĉiutageco, kiu kovris mian menson.

Komenciĝis ĉio tute ordinarde: mi venis al kuracisto por enviĉiĝi finfine por la operacio de katarakto, ĉar mia vidpovo rimarkinde ŝrumpis dum la lastaj monatoj. Mi demandis, ĉu ne malhelpos la procezon la pli kaj pli ofte aŭdata novaĵo, kiu minacas la mondon. Iu pandemio. La okulistoj ekmiris: “Ĉu al ni? Kian rilaton ĝi havas? Tute aparta tereno... Ne maltrankviliĝu, farigu la analizojn kaj venu al ni post semajno.” Tio okazis jaŭde; kaj ekde lundo sekvasemajne, oni anoncis severan kvarantenon.

Mi estis ŝokita. Kaj mia unua demando estis: “Kiel povis okazi, ke kuracistoj mem ne sciis pri la venontaj ŝanĝoj? Ĉu ne ili proponas kontraŭmalsanajn rimedojn?” Nian urbon, landon jam dum kelkaj jaroj inundas epidemioj de ftizo, de morbilo... Homoj malsaniĝas, mortas – sed neniu anoncas kvarantenon kaj oni eĉ ne agnoskas, ke estas veraj epidemioj: oni simple parolas pri iuj sporadaj “eksplozoj” de malsanoj kaj okazigas neniujn specialajn ŝanĝojn al la ĉiutaga vivo nia... Pri aidoso, ekzemple, vera tutmonda pandemio, eĉ tute male: oni postulas malkvarantenon, kondamnas kaj malpermesas izoligon de la malsanuloj... Sed jen – abrupta fermo de vendejoj, malpermeso foriri el hejmo... Atmosfero de teroro. Ĉiuj sidas hejme kaj timas. Potencega informa premo: en ĉiuj amaskomunikiloj, oni densigas la streĉitecon kaj temas nur pri kovimo kaj ĝiaj viktimoj. La vivo fakte stagnis (aŭ estis stagnigita?). Oni malpermesis ne nur eliri, sed eĉ, ial tre insiste, sportumi surstrate, en freŝa aero. Malpermesis promeni en parkoj, apud la maro...

Niaj urbaj retkomunikiloj tiam ofte montradis filmeton pri iu aktora familio: ili, kiel aktoroj, devas perfekte posedi sian korpon, ĉiutage provludi por havi eblecon esprimi sentojn kaj sencon de siaj roloj ne nur per vortoj, sed nepre ankaŭ per la tiel nomata “lingvo de korpo”. Kaj jen: teatrojn oni fermis, spektakloj kaj ankaŭ provludoj tie ne okazis – kaj tiu familio decidis sin ekzerci kaj gimnastiki hejme por ne perdi la korpan pretecon kaj esprimivon. Tiu hejma ekzercado estis filmita, kaj la filmeton oni proponis al ni kiel ekzemplon kaj instigilon.

Do, en malgranda tipa loĝejo de multetaĝa domo, kie alto de plafono estas 2,7 metroj, kaj la areo de ĉambroj ĉirkaŭ po dudek kvadrataj metroj, sin trejnas viro kaj virino, kaj kvinjara infano kuras tien-reen, jen aperas, jen eliras el la ĉambro. La virino faras gimnastikon por fleksebleco de la korpo; sed la viro, nature, pli okupiĝas pri fortigaj ekzercoj: jen kun halteroj, jen pri kaŭroj. Kompreneble, li ŝvitas, kaj la kamerao ne ĝenas montri lian humidan korpon: li penegas ja, kaj vi, estimataj spektantoj, faru same! Vidu, li ne lasis sin venki, li daŭrigas sian laboron: jen la ekzemplo por vi!

Kaj tiu filmeto estis la lasta guto, kiu troplenigis la kalikon de mia obeemo kaj kredemo. Mi imagis, *kia* aero estas en tiu malgranda, malalta ĉambro kun fermitaj fenestroj; kiuodoro de ŝvito, kiu koncentriteco de CO₂, kiu manko de oksigeno, intense konsumata dum fizikaj ekzercoj! Strange, dum oni multfoje, preskaŭ ĉiuhore el ĉiuj ekranoj rememorigas pri neceso lavi manojn – *neniam* mi aŭdis pri neceso aerumi ĉambrojn! Sed la infekto ja estas transprenata ĝuste per aero; kaj en fermitaj loĝejoj ajna infekto, ne nur la novaperinta, certe trovos por si fekundan medion! La akumuliĝo de CO₂ kaj manko de O₂ plifebliĝos eĉ sanan organismon, agante ĝuste tra la pulmoj; tiel aperas ideala medio por ekmalsaniĝo. Mem restado senlire en fermitaj loĝejoj, sen moviĝo en freŝa aero, malfortigas kaj malaktivigas imunajn fortojn de l' organismo; des pli en printempo, kiam la tutan vintron ni kutime estas limigitaj en nia eblo moviĝi, spiri freŝan aeron, ktp. La printempo estas la periodo, kiam la naturo renaskiĝas post vintra dormo, reakiras siajn fortojn – kaj same faras homo. Ankaŭ en li, reviviĝas la naturaj impetoj; kaj tiam, li aparte bezonas kunvivi kun la naturo, kundividi ĝiajn fortojn.

Kaj tiam, mi klare komprenis, ke okazas rekta atenco kontraŭ mia vivo kaj sano: oni devigas min ne reakiri miajn fortojn post vintra malfortiĝo, ne resanigi, sed malfortigi mian imunan sistemon, preventi mian kontraŭstaron al ajna malsano.

Sed krom tiu tute fizika, ekzistis ankaŭ la psika premo: ja izoliĝo mem tre maligne influas homojn. Ni ne estas krimuloj – sed tute sen kulpo kaj sen verdikto, ni ĉiuj estis ekzilitaj, sub hejma aresto. Mi ne povas eĉ imagi, kiom da homoj plene aŭ iomete freneziĝis, enfermitaj en siaj hejmoj; kiom da familioj disfalis, devigitaj senĉese vidi unu la alian en limigita spaco, sen eblo resti sola kun si mem, tiel bezonata kondiĉo por psika ekvilibro.

Kaj mi impetis savi min.

Komence, mi promenis nur en urbe, tra ĝiaj parkoj kaj bulvaroj. Stranga vidaĵo estis, kvazaŭ en hororfilmoj: en printempo, kiam “ajna vivo ĝuas la sunon”, en gaja ĉemara urbo – tute malplenaj stratoj. Malplenaj benkoj en parkoj. Nur la vento furiozas, forbalaante ĉiun malpuraĵon, ĉiun “infekton”. Sur la stratoj: nur la suno, la vento kaj mi.

Mi memoras unu arbuston de forsitio en la urba parko: ĝi estis lumigita de suno kaj, flava en flavo, brilis kiel flamanta torĉo. Ĝi estis simbolo de reveninta vivo, de varma kaj plenforta vivoĝojo.

Mi promenis dum diversaj taghoroj, kaj ĉiun el ili ĝuis aparte. Mi bone komprenis tiam Claude Monet kun liaj serioj de Temploj aŭ Nimeoj, pentritaj en diversaj prilumoj. Mi observis, kiel la situo de la suno kaj de apartaj nuboj surĉiele aliigas konatajn pejzaĝojn, kaj ili ĉiam ŝajnas nove allogaj. Ĝuste tiam, mi eksentis tion, kion mi priskribis en la unuaj alineoj: subitan malfermiĝon al impresoj, kiuj denove fariĝis ardaj kaj freŝaj. Eble tion subtenis ankaŭ la guto da adrenalino: ja estis malpermesite promeni, kaj min instigis ankaŭ la gaja kaj defia spitemo.

Post ioma tempo, mi ekentreprenis eĉ pli longajn promenojn. Ne malproksime de mia domo estas longa strato, kiu kondukas al ekster-urba marbordo. Unuflanke de tiu strato, situas nur uzinoj, tiutempe ne funkciaj; kaj aliflanke, nur kadukaj unu- aŭ duetaĝaj dometoj; do, fakte, piedirantoj tie ne abundis. Laŭ la tuta ĝia ĉirkaŭ dekkilometra longo, mi renkontis nur 3–5 homojn; sed kiom da belaj troviĝis tie!

Antaŭ ĉiu uzino situis florbedo; kelkaj estis pompaj, kun kulturitaj floroj; mi admiris tulipojn, narcisojn, iridojn, liliojn kaj fine, superbajn ruĝajn rozojn! Aliaj estis pli simplaj florbedoj kun miozotoj, primoloj, antirinoj; kaj aparte grandaj arbustoj de eglanterio en plenflo. Kaj ĉie en razenoj, lumis flavaj kapituloj de leontodoj.

Ĝenerale, mi sekvis la printempon laŭperiode: mi promenis 2–3-foje semajne, kaj ĉiam ĝuis la sekvan fazon de printempo. Komencis mi, kiam floris ĉerizujoj; ili multis survoje, kaj ilia aromo tiel vigligis kaj ĝojigis koron! Poste, la razenoj fariĝis verdaj, kaj junaj leontodoj kapturnige odoris je mielo! Poste komencis abunde verdiĝi arboj; kaj se antaŭe ili estis blankaj pro la floroj, do post kelka tempo, sur ili aperis teneraj helverdaj folioj, kaj kiam la suno tralumigis ilin, ili fariĝis ore-verdaj, kaj milde tremetis sub vento.

Sekvis la tempo de robinio, kies aromo estas prikantita en poemoj kaj kantoj. Kaj ĉiam estis la suno kaj vento, la plej potencaj fortoj de Naturo. Printempo jubilis!

Finiĝis la strato per strando; kaj la lastan kilometron mi iris jam sursable, laŭ la bordo de la ĉiam apuda maro, la plej granda savanto kaj konsolanto de animo, ujo de trankvilo kaj komprenemo, eterna azilo.

Preskaŭ nerimarkinde ĝia antaŭe senhoma bordo pleniĝis de nudaj korpoj de ripozantoj. Jam indis veni al maro por naĝi. Printempaj floroj forvelkis, razenoj flaviĝis pro sekeco. Venis la somero.

Finiĝis la mirinda printempo de 2020. Sed mi dankas al ĝi, ĉar ĝi freŝigis kaj renovigis mian vivon. Mi plenspiris la printempon!

El pandemia taglibro

de Paulo Sergio Viana

Brazilo

18:00 Vesperigās. Tra la fenestrokadro, mi rigardas la treniĝantan alve-
non de mallumo, sed ankoraŭ duonlumaj strioj vidiĝas super la hori-
zonto. Flavecaj strioj en sufoke varma somera tago. La aero estas peza,
eble pluvos dum la nokto. Mi rigardas la korpon de Beta sur la lito.
Ŝi paliĝis, sed la okulojn, funde de la orbitoj, ĉirkaŭas malhela haŭto.
Ŝi konservas la okulojn fermitaj, sed mi scias, ke ŝi ne dormas. Kiam
ŝi sentas grandan korpan malkomforton, ŝi simple kuŝas senmova kaj
fermas la okulojn. Tio estas ŝia maniero sin defendi. Mi konas preskaŭ
ĉiujn ŝiajn kutimojn, kaj ŝi la miajn, post 41-jara geedza vivo.

De unu semajno, ŝi ricevis sian teston indikantan, ke la kronviruso
kaptis ŝin. Dum la unuaj tagoj, la simptomoj estis banalaj, kiel tiuj de
simpla gripo: kapdoloro, manko de energio, iomete da tuso, la gorĝo
dolora. Hodiaŭ, la okan tagon post la komenco de tiuj simptomoj, ape-
ris febro kaj ŝi jam ne emas manĝi. Ŝi apenaŭ trinkas fruktosukon. Kaj
ŝi kuŝas, kun fermitaj okuloj, eĉ se ŝi ne dormas. Ne bona afero.

19:00 En la apuda ĉambro, mi ŝaltas la televidon por spekti infor-
mojn. Jen aperas la prezidento, kaj li motorciklas tra la avenuoj de la
ĉefurbo, ridema. Mi interpretas tiun rideton kiel rikanon. Li ne portas
maskon, kvankam troviĝas multaj homoj apud li, kiam li haltigas la
motorciklon. Kaj li donas unu plian fulman intervjueton surstrate, di-
rante, ke laŭ la konstitucio de nia lando, estas lia rajto libere iri surstra-
te. En la komenco de la pandemio, li deklaris, ke tiu pandemio estas
troiga, skandala informo de stultaj, pesimismaj ĵurnalistoj. Mi gapas.

Mi revenas al la ĉambro de Beta, ŝi plu kuŝas senmove. Mi metas
termometron sub ŝian akselon, kaj ŝi pasive akceptas ĝin. 38,1 °C. Mi
demandas ŝin, kion ŝi sentas. Ŝi ne emas respondi, sed mi rimarkas, ke
estas al ŝi iom pli malkomforte. Beta neniam inklinis al plendado. Ŝi
povas plori pro emocio, neniam pro korpa doloro. Subite mi memoras

la tagon, kiam ŝi akuŝis nian filon. Je la kulmina momento, ŝi ruĝiĝis, ŝi streĉis sin per fortego, dum preskaŭ unu minuto senspira, ĝis fine la kapo de la knabo aperis inter ŝiaj femuroj. Ŝi ŝvitis, eligis la tutan bebon, profunde spiregis kaj ridetis, rigardante min. Mi miras, ke mi nun memoras tiun scenon, de antaŭ pli ol tridek jaroj.

Mi donas al ŝi amarajn malfebrigajn gutojn, kaj ŝi englutas ilin sengrimace.

19:40 Dum tridek minutoj mi sidis sur la balancoseĝo apud Beta. Mi ne emas vespermanĝi, ĉar ankaŭ ŝi ne akceptas nutraĵojn. Mi insistas, ke ŝi trinku iom da suko. Ŝi pene englutas iomon, subite ŝi malfermas la okulojn, strange brilantajn okulojn, kaj demandas, kioma horo estas. Poste ŝi demandas, kiu monattago estas hodiaŭ. Ŝia rigardo tremetas, ŝia voĉo raŭkas. “Ĉu pluvas?” “Ne, ankoraŭ ne pluvas.” Ŝi rekuŝiĝas, kaj ŝiaj brakoj mole pendas apud la trunko. La febro ŝajne ankoraŭ ne cedis. Mi havas la koron peza. Sed ŝi spiras trankvile. Ni atendu.

Mi reiras al la televido. Nun la kanalo de konstantaj noticoj aktualigas la informon pri norda urbo, kie la malsano sovaĝe atakas, precipe la malriĉajn popolanojn. Ili vivas en amase loĝataj kvartaloj, en domaĉoj, kie kunpremiĝas infanoj kaj plenkreskuloj en etaj ĉambroj. Mizere. La hospitaloj jam ne havas lokojn por pliaj malsanuloj. Homoj atendas ĉe la pordo. En la hospitalo mankas oksigeno kaj jam okazis, ke pacientoj sufokiĝis kaj oni ne liveris al ili spirigan flegadon. Ili mortis pro manko de oksigeno. Kvazaŭ dronintoj sur seka grundo. Terura maniero morti.

Mi foriras por iom gvati Betan. Ŝia frunto estas malseketa. Mi memoras, ke kiam mi ekkonis ŝin kaj enamiĝis al ŝi, plej impresis min ŝia maniero paroli, ĉiam mallaŭte, sed vibre kaj emfaze. Ŝi tiam sulkigis sian frunton en maniero unika.

20:15 Sonas tondro malproksime. La febro iom cedis, nun la termometro montras 37,6 °C. Beta sukcesis trinki duonglason da oranĝosuko. Mi helpis ŝin teni la glason, kaj pro la proksimeco mi rimarkis, ke ŝi jam ne spiras same facile kiel antaŭe. Mi almetas sur ŝian fingron la oksigen-mezurilon: 93. Ŝia normala mezuro ĉiam estis super 95. Mi iomete maltrankviliĝas. Ni vidu la sekvajn. Eble la febro malhelpas la spiradon. Mi frotas ŝin per malseka tolaĵo, sur la bruston, sur la ingve-

nojn, sur la akselojn. Ŝajne tio iom komfortigas ŝin. Per apenaŭ sonanta parolo ŝi dankas. Se eble, ni evitu venigi Betan en hospitalon.

Mi revenas al la televido, kaj sur la ekrano la ministro pri sano deklaras, ke la kulpo pro mortoj pro manko de oksigeno ne estas de la federacia registaro, sed de la urbaj kaj subŝtataj aŭtoritatuloj, kiuj ne antaŭvidis la bezonojn. Krome, ke tiuj pacientoj ne estis ĝuste flegitaj, per la kontraŭvirusaj medikamentoj indikitaj de la ministerio. Stultaĵo, aŭ prefere simpla cinika mensogo.

Mi aŭdas ĝemeton de Beta, kaj mi alkuras. Ŝi dormas, eble ŝi sonĝas. Poste ŝi rakontos al mi, kion ŝi sonĝis. Beta ĉiam abunde sonĝis kolorajn sonĝojn. Ĉi-nokte mi mem ne emas sonĝi. Beta jam ne spiras tute libere.

21:00 Ŝi vekiĝas kaj petas iri al la necesejo. Kun mia apogo ŝi lamas ĝis tien. Beta neniam permesis, ke mi rigardu ŝin, kiam ŝi sidas sur la sanitara pelvo. Hodiaŭ, ŝi ŝajnas indiferenta al tio, unuafoje en la vivo. Mi tamen duonfermas la pordon por faciligi al ŝi la aferon. Tra eta breĉo de la pordo mi atentis, ĉu ŝi bezonas iun plian helpon. Ŝi urinas, sin sekigas kaj pene stariĝas. Kaj ni kune revenas al la lito. Mi ekhavis strangan penson, ke longa intimeco inter paruloj estas delikata konstruo. Ju pli da intimeco, des malpli da vortoj. Multo estas nedirebla, fakte.

Ĉi-momente, la aŭtoritatuloj en nia lando ne zorgas pri la suferoj de la infektitoj. Ili ŝajne zorgas pri sia politika situacio, pri la estontaj balotadoj en la lando. La deklaroj de la ministro pri sano klare montras la obeadon al tia politiko. Kaj la ministerio pri ekonomio senĉese asertas, ke necesas protekti la financan situacion de la loĝantaro. Sekve, oni permesu, ke la homoj libere moviĝu por gajni monon. Socia izoliĝo estas malsaĝaĵo, laŭ ilia strategio.

Mi rigardas al Beta kaj min demandas: kiel la viruso kaptis ŝin?

22:00 Denove la termometro montras pli ol 38 °C, kaj Beta ŝvitas. Mi klopodas konsoli min per la penso, ke ŝvito estas reago de la korpo por sin malvarmigi per natura bano. Tiu penso tute ne faciligas la aferon por mi. La oksigen-mezurilo montras 91.

De la apuda ĉambro obtuze alvenas la voĉo de ĵurnalisto, kiu citas la vortojn de sinjoro prezidento direktitajn al la televidspektantoj: “Ĉu vi kuraĝas akcepti tiun vakcinon de komunista lando, faritan haste kaj

senkontrole? Ĉu vi certas, ke ĝi ne transformos viajn genojn? Ĉu eble ĝi povas transformi vin en aligatoron?”

Ĉi-momente, mi emas sakri, sed mi ne faras tion. Beta neniam ŝatis, ke oni sakru hejme.

23:00 La febro obstine haltas je 38 °C. Beta ĝemetas, sed mi ne sukcesas, ke ŝi klare diru, kion ŝi sentas. La oksigen-mezurilo montras 89. Mi klopodas ne panikiĝi, sed tio ne estas facila. Mi stupore rigardas al Beta, mi jam ne rekonas mian edzinon. Alia persono kuŝas antaŭ mi. Mi tuŝas ŝian frunton per mia manplato, senutile. Mi ne havas, al kiu paroli, kun kiu konsiliĝi. Venas al mi la bizara ideo, ke vi rajtus telefoni al sinjoro prezidento kaj demandi: “Sinjoro, mi bezonas helpon, Beta sinkas kaj mi dubas, ĉu la hospitalo en mia urbo havas vakon por unu plia kovimulo. Ĉu vi povus ordoni, ke oni akceptigu ŝin en la luksa hospitalo en la ĉefurbo, kiu flegas vin, kiam vi malsaniĝas?”

Jam ne eblas atendi. Mi telefonas al la ambulanca servo. Ĝi estos disponebla nur post unu horo. Sed la afero urĝas, jam ne eblas prokrasti la danĝeran iron al hospitalo, kie certe la viruso svarmas. Mi vokas taksion, sed la taksiisto hezitas. Mi promesas pagi duoble por la veturo.

23:45 Fine, unu taksiisto konsentis transporti mian edzinon kaj min al la hospitalo. Malfacile mi trenas ŝin en la aŭton. La ŝoforo time rigardas nin. Ni ekveturas, kaj el la radio de la taksio zumas aĉa muziko. Subite, oni interrompas la programon por ĵurnalisma informo: “La ministerio pri sano fiere informas, ke nia lando komencos post kelkaj tagoj la vakcinadon kontraŭ la nova kronviruso. La unua prioritato estos homoj pli ol 98-jaraĝaj.”

Nu, mi pensas: jen alvenis la komunista vakcino.

Preskaŭ noktomeze ni alvenas al la hospitala pordo. Mi devas pagi la trioblon al la taksiisto. Alvenas homo kun rulseĝo por konduki Betan. Unuan fojon en la vivo, mi vidas Betan sur rulseĝo. Sonas tondro, ekfalas la unuaj gutoj de antaŭvidita pluvo. Espereble, ĝi mildigos la varmegon en ĉi tiu somera nokto.

La brakumklubo

de Martin Rue

Britio *Tria premio*

“Ĉu vi scias, kial vi estas ĉi tie?” demandis la detektivo, viro kun ŝtona, kolera vizaĝo kaj senpacienca sinteno.

Estis sufiĉe frue ke ankoraŭ ne tagiĝis, kiam subite Zam estis vekita kaj prenita de sia domo. Li tamen ja sciis, kial li ĉi-matene troviĝis en malvarma, timiga intervjujo.

“Jes, mi scias.” diris Zam. “Pro mia avino.”

“Jes, tion mi jam aŭdis. Al mia kolego vi plurfoje menciis vian avinon, sed kion vi faris, estas via problemo. Kial vi kulpigas ŝin?” demandis la detektivo.

En 2041, la mondo estas preskaŭ nerekonebla, precipe al tiuj, kiuj aĝas pli ol dudek. Pro la pandemio, paŝon post paŝo, ĉiuj landoj kreis ondojn da striktegaj sociaj reguloj, kaj homoj tutmonde multe ŝanĝiĝis dum la lastaj du jardekoj.

Laŭdire, la viruso ankoraŭ ekzistas, sed neniu certe scias. Ekzistas malgranda sed rapide kreskanta grupo de homoj, kiuj ekkredas, ke la vera viruso estas nur en la menso.

Homoj en 2041 vivas tre zorgeme kun senĉesa timego, ke eble ili estos la venontaj homoj, kiujn oni forprenos de la domo frumatene.

La reguloj estas klaregaj. Homoj entute ne rajtas proksimiĝi. Ne estas esceptoj. Junuloj vere luktas pro la plena manko de kontakto inter homoj, amikoj, familianoj.

Lastatempe, preskaŭ ĉiuj registaroj havebligis novan sistemon por oficiale peti rajton esti kune por gravediĝi. Pasis jardeko antaŭ ol oni povis kaj klare rimarki la tutmankon de infanoj kaj ekvidi la venontan krizon. Oni efektive diras, ke perdiĝis kelkaj generacioj.

“Mi ne kulpigas ŝin. Male! Mi dezirus, ke mi povu danki ŝin.” respondis Zam.

“Kial vi parolas tiel? Vi ja scias, kio estos la puno. La situacio jam serioziĝis.” asertis la dua intervjuisto. “Estas tre probable, ke oni malliberigos vin longan tempon pro ĉio ĉi, ĉu vi scias?”

“Jes, mi komprenas la leĝon!” senhezite respondis Zam, kun kolera tono.

“Sed rigardu ĉirkaŭen! Neniu povas esti proksima. Neniu eĉ volas esti. La emo esti kune forŝrumpis, kaj homoj nun forte kredas, ke aliaj homoj povus senintence mortigi ilin nur pro proksimeco. Ni robotiĝis. Amo estas nur rakonto, pri kiu legas la junuloj nur en libroj!” emocie daŭrigis Zam.

“Vi konas la regulojn; tiuj reguloj, kiujn vi senĉese rompis. Vi ne rajtas esti heroo, kaj heroo neniam povus savi nin per via infaneca klubo. Ne provu kulpigi iun ajn alian krom vin mem.” akre diris la detektivo.

Zam amis viziti sian avinon. Ŝi estis tre ĉarma kaj saĝa virino. Dum ĉiu vizito ŝi faris por li la plej bonan teon kun iom da sukero. Malgraŭ la granda risko de puno, se oni troviĝus kun sukero, ŝi ĉiam iel kapablis akiri iom da por ĝojigi lin.

“Oni fojfoje devas flekseti la regulojn por travivi la nunan vivon.” ŝi ofte diris al li.

Dum la unuaj jaroj de la pandemio sukero iĝis entute malpermesita pro la ligo trovita inter ĝi kaj la kovim-mortintoj. Eĉ en la lastaj tagoj ŝi rufizis malkaŝi sian sekreton. Dum la funebro, homoj ŝercis, ke eble ŝi havis konatojn kun tre gravaj postenoj.

Plej plaĉis al Zam la rakontoj pri la malnova mondo. Li tro junis tiam por klare memori, kia estis la vivo, sed lia avino neniam maltrafis ŝancon rakonti al li pri la tielnomata “ora epoko”. Gravegis por ŝi, ke li imagu, kia la mondo denove povus esti, kaj ke li kresku kun la espero kaj la emo krei mondon, en kiu homoj povus vidi la senmaskan rideton de unu la alia antaŭ ol la ŝanco forpasus.

Pro ŝia influo, Zam kreskiĝis kiel strangulo inter siaj amikoj. Li neniam trovis alian homon, kiu eĉ povus imagi, ke la nuna mondo povus ŝanĝiĝi en ian ajn version de la ora epoko.

Post ŝia morto, Zam alprenis ŝian deziron kiel sia propra celo, klopodante helpi la mondon trovi la gravecon de homa kontakto kaj de nia vera heimco.

Laŭcele, li kreis la sekretan brakumklubon. En la brakumklubo, homoj povis vidi la vizaĝojn unu de la alia, esti proksimaj, kaj brakumi unu la alian. Ĉiuj tri agoj portis grandan punon, do la klubo estis tut-sekreto inter la membroj.

Zam tre sekrete kaj zorgeme estris la klubon. Li pene kontrolis ĉiun homon, kiu sendis aliĝpeton kaj nur akceptis tiujn, kiujn li povis fidi.

Zam celis kreskigi la klubon ĝis granda nombro de membreco, kaj planis subite publikigi ĝin al la mondo, kiel socia bombo.

Li kredis, ke per granda kaj ŝoka malkaŝo, la klubo montrus al la mondo kaj alian eblan vojon, kaj ke ondoj da homoj jam elektis trovi la bezonatan homan kontakton malgraŭ la riskoj.

De tempo al tempo, oni ekaŭdis pri la brakumklubo, sed la mensa salto ekkredi, ke klubo tia ja povus ekzisti en 2041, estis tro granda.

La plejmulto de homoj kredis simple, ke la brakumklubo estis nenio pli ol rakonto por sentigi homojn pli bonhumoraj dum malfacilaj momentoj.

“Infaneca?” diris Zam, kvazaŭ la demando elsaltis ne nur el lia buŝo, sed el lia tuta korpo.

“Se estas infaneca la bezono esti homo, la deziro esti kune kaj vidi ne nur la okul-rideton, sed la veran, plenvizaĝan rideton de niaj avinoj, antaŭ ol perdiĝus la ŝanco, tiam tute klaras, ke dolore mankas al nia mondo infaneco!” replikis Zam.

“Kial vi ne povas vidi, ke per ĉio ĉi ni restos robotoj. Kial vi ne povas vidi, ke la mondo haltas?” Zam aldone demandis, atendante nenian respondon.

“Pro tio, ke vi ne neas la akuzojn, mi jam povas certigi al vi, ke la juĝisto donos al vi pli ol dudek jarojn.” diris la detektivo, tenante sian senŝanĝan, senemocian malvarmecon.

“Ni restigos vin ĉi tie en la policejo ĝis morgaŭ, kaj frumatene la juĝisto traktos vian kazon.” aldonis la detektivo.

“Morgaŭ?” demandis Zam kun surprizo. “Ĉu kutime ne restas pli da tempo inter la akuzo kaj la apero en la juĝejo?”

“Kutime, sed via kazo estas unu el la plej gravaj, kaj konsistas el apartaj akuzoj kontraŭ vi laŭ la nombro de klubmembroj. Pro tio, via kazo estas tre grava.” klarigis la detektivo.

Zam provis ne reagi.

Li rimarkis, ke kiel li sentis sin, ne temis pri bedaŭro, sed nur timo; timo, ke li ne vidus siajn familianojn nek siajn amikojn, ĝis ili ĉiuj maljuniĝos kaj eble jam forgesos pri li.

Tamen, pripensante la perdotan liberecon, Zam konstatis, ke la mondo sen espero estas nur alia speco de malliberejo. Li provis konsoli sin per tiu penso ĝis la venontaga tribunalo.

“Ĉiuj stariĝu.” petis fona voĉo.

Portante tipan nigran robon, en la juĝejon malrapide promenis la juĝisto kaj sidiĝis je la ĉefa benko.

“Ĉiuj sidiĝu.”

La juĝisto aspektis serioza kaj profesia viro; maljuna, malalta, kun mallaŭta, sed fortika voĉo.

“Estimataj membroj de la ĵurio, mi devas informi vin, ke post mia tralego de la kazo ĉi-matene, mi...”

“Aj!” kriis Zam.

Apud la mano de la juĝisto estis taso da teo, kiun li faligis, dum li parolis. Tuj apud la juĝisto sidis Zam, kiun frapis la varmega teo, malsekigante kaj bruletigante lin.

“Ho mia dio! Pardonu min! Ĉu ĝi vundis vin?” demandis la juĝisto per nekutime zorgema tono.

“Ni haltu, por ke la kuracisto povu kontroli vin, kaj por ke vi povu sekiĝi. Estimataj membroj de la ĵurio: ni rekomencu post dudek minutoj.”

Nenian problemon trovis la kuracisto, kaj li do sendis Zam al la banĉambro por sekigi la vestaĵojn per la mansekigilo.

Zam eniris la banĉambrom, demetis sian pantalonon kaj provis elpreni iom da likvo el la ŝtofo.

Dum li forte premis la ŝtofon, dolĉan odoron li ekrimarkis.

“Tio estas tre strange.” pensis Zam. “Ne povus esti, ke la trinkaĵo enhavas sukeron... Sukero estas strikte malpermesita, kaj li estas juĝisto!”

Sed la kuriozemo iĝis tro granda, kaj Zam ne povis rezisti. Li metis sian fingron en la buŝon por eltrovi.

“Ŭaŭ! Mi ne povas kredi! Estis sukero en la teo!” senvole elbuŝiĝis de Zam.

Lia ŝoka konstato restis, ĝis aŭdeblis la sono de tralavo de unu el la necesejoj. Zam kredis, ke li estis la sola homo en la banĉambro, sed kreskigante eĉ pli sian ŝokon, eliris el budo la juĝisto.

Zam restis apud la mansekigilo, dum la juĝisto iris al la lavabo por lavi la manojn.

“Ĉu vi sekigis vian pantalonon?” diris la juĝisto, sen rigardi Zam.

“Jes, ĉio enordas.” respondis Zam, ankaŭ evitinte rektan rigardon. La tutan tempon Zam nur povis pripensi, ĉu la juĝisto aŭdis tion, kion li senvole diris.

“Mi vidos vin en la juĝejo post momento.” diris la juĝisto, dum li alproksimiĝis al la pordo. Je la pordo li haltis kelkajn sekundojn kaj aldonis:

“Jes, ĝi estis sukero, sed oni fojfoje devas flekseti la regulojn por travivi la nunan vivon.”

Zam tuj frostiĝis, provante kompreni tion, kio ĵus okazis.

La diraĵon li tuj rekonis. La nura alia homo, kiu iam ajn diris tion al li, estis lia avino, kiu ankaŭ kontraŭleĝe atingis sukeron. “Ĉu povus esti, ke ili konis unu la alian?” scivolis Zam. Demandoj kuris ĉirkaŭ lia cerbo cent kilometrojn hore, sed nenio havis sencon.

“Estimataj membroj de la ĵurio, unue mi volas rebonvenigi vin, kaj danki vin pro via komprenemo. Due, mi devas rekomenci de kie mi estis antaŭ ol okazis la incidento.” diris la juĝisto.

“Dum mia tralego de la kazo ĉi-matene, kelkaj gravaj problemoj evidentiĝis rilate al tio, kiel la policistoj kondukis. Gravegas, ke kazoj ĉi tiaj estu kondukitaj tute ĝuste, kaj en tiu ĉi kazo mi trovas, ke la respondeculoj ne atingis la bezonatan ĝustecon. Pro tio, la kazo kontraŭ sinjoro Zam ne povas progresi en tiu ĉi juĝejo. Mi denove dankas vin pro via ĉeesto, kaj laŭleĝe sinjoro Zam nun rajtas reveni hejmen libera. Bonan tagon.”

“Ĉiuj stariĝu.” denove petis fona voĉo, dum eliris la juĝisto.

La vizaĝoj de ĉiuj en la juĝejo montris nur konfuzon, precipe tiuj de la policistoj. Subite kaj neatendite ĉio ŝanĝiĝis por Zam. Li estis libera viro. La punoj, la perdo de la libereco, la timo, ĉio malaperis en tiu momento.

“Tute tio ne havas sencon.” pensis Zam. “Mi ja komencis kaj estris la klubon, kaj la policistoj ja povis pruvi tion.”

“Ĉu li konis mian avinon? Ĉu vere ŝi havis altrangajn konatulojn? Ĉu li vere trovis problemojn pri mia kazo? Aŭ ĉu li konsentas kun mi, kaj faligis la teon sur min por komprenigi al mi, ke li volas, ke mi daŭrigu?” mense demandis Zam.

Li ne sciis, kion pensi, ĝis li alvenis hejmen.

Tie atendis lin sciigo de la aliĝpetsistemo de la brakumklubo. Li malfermis la sciigon kaj komencis legi ĝin.

“Via avino fieregas. Mi sopiras ŝian teon preskaŭ tiom, kiom mi sopiras ŝin. Mia promeso al ŝi restos nerompita, kaj pro tio vi havas nenion zorgindan.”

La tricenttrideksepa tago

de Sten Johansson

Svedio Tria premio

Ŝi ekskursas kun la filo al strando. La edzo kiel kutime forestas ie. La filo aĝas ok aŭ dek aŭ eble nur ses jarojn kaj ludas en la akvo. Post kelka tempo, ŝi ne plu vidas lin kaj vokas al li: “Andreas!” Tio ne estas la filo, sed la nepo. Ŝi ektimas pri li kaj vokas denove kaj vekigiĝas en griza krepusko.

Ŝi restas kuŝi enlite dum la pulso retransviliĝas. Ŝi sentas la ĉambbron sekura, kutima. Ja obskura, sed ŝi rekonas la aeron, la senton en ĝi. Kioma horo estas? Ŝi ne vidas legi la horloĝon kaj ne volas eklumigi por ne ĝeni...

Stultaĵo! La edzo ja estas for jam de jaroj, kaj la filo delonge plenkreskis, do kiun ŝi ĝenus? Kial ŝi konfuzis sian filon kun la sesjara nepo, kiun ŝi ne povis renkonti de... kiom da monatoj? Ĉu li jam iĝis sepjara? Ne, li festas siajn datrevenojn printempe. Kiu tago estas nun? Kiu monato? Ja ne povas esti somero, kiel en la sonĝo.

De eksterdome aŭdiĝas sono, kiun ŝi klare rekonas: la malsonora skrapado de neĝpluga kamiono, kiu forigas neĝon de la strato. Jes ja, hieraŭ vespere komenciĝis intensa neĝado. Ĉu ĝi eĉ daŭris dumnokte? Aŭ ĉu plu estas vespero? Ne, nun ŝi plene vekigiĝas. Estas la komenco de februaro kaj laŭ la griza tagiĝo jam la naŭa horo matene. Aŭ eble nur la oka, ĉar la neĝo igas ĉion iomete pli hela.

Ŝi eklumigas la lampon, kiu jam de jaroj povas ĝeni nur ŝin mem. Dudek antaŭ la oka. Kiu semajntago estas? Ŝi havas nenion, al kio al-kroĉi la tagojn. Ĉio ĉiam samas. Tamen, se estas jaŭdo... Ŝajnas al ŝi, ke devas esti jaŭdo. Pasis eterno de la antaŭa jaŭdo. La horloĝo ne helpas; ŝi devas ellitiĝi por rigardi la telefonon, kiun donis al ŝi la filo. Se almenaŭ ne elĉerpiĝis ĝia baterio.

Ŝi ŝovas la nudajn piedojn en la pantoflojn, kiuj kuŝas sublite, kaj kaptas la rulapogilon apude. Poste ŝi paŝetas rulante ĝin al la vestibla

komodo, sur kiu ĉiam kuŝas la nova telefono, ĉar tie iam staris la malnova fiksa aparato. Ĵaŭdo, la deknua de februaro. Prave. Do, hodiaŭ ŝi povos peti la filon butikumi por ŝi, kiam li faros la aĉetojn por sia propra familio: la bofilino, la nepo kaj la beba nepino. La filo ne volas vendrede kunpuŝiĝi kun aliaj, kiuj butikumas antaŭ la semajnfino. Laŭ li, ne ĉiuj tenas distancon. Jen kial li preferas ĵaŭdojn. Post la matenmanĝo ŝi notos aĉetliston, kaj iam antaŭ la tagmezo ŝi provos telefoni al li por sciigi ĝin.

Ŝi iras ĝis la fenestro de la dormoĉambro kaj malfermetas la latkurtenon. Jes ja, jen neĝo sur la korta ludejo kaj sur la tegmento de la aŭtejo. Dum momento, ŝi sidigas sur la benketo de la rulapogilo kaj gvatas malsupren. Unu sola nigra silueto de homo rapidas diagonale tra la korto. Videblas lumo en preskaŭ duono el la fenestroj de la kontraŭa domego. Laŭdire multaj nun laboras hejme, kaj en la televido oni ĉiam admonas, ke ĉiuj, kiuj povas, plu faru tion. Kiajn laborojn la homoj do havas nuntempe, kiujn eblas plenumi hejme?

Ŝia filo estas unu el tiuj, kiuj jam de dek monatoj plej ofte laboras hejme, per komputilo. Ŝajne li pasigas la tagojn en kunvenoj, se eblas tiel diri, kvankam oni efektive ne venas kunen. Sed la bofilino devus plu iri al sia laborejo, se ne estus pro la bebo. Ne eblus flegi malsanulojn komputile.

Matenmanĝinte, ŝi prenas duan tason da kafo kaj denove ekpensas pri la nepino. En la pasinta printempo la graveda bofilino plu deĵoris en la hospitalo, kaj ili ĉiuj tre timis, ke ŝi infektiĝos. Sed bonŝance ŝi evitis la viruson, kaj somere naskiĝis la eta Sabina. En aŭgusto kaj septembro, ili kelkfoje rendezuis en la apuda parko por montri la bebon al la avino, je dumetra distanco. Sed ekde la aŭtuno, venis nur fotoj kaj filmetoj per la telefono. La nepino kreskas kaj verŝajne ne plu estos bebo, kiam ŝi rajtos unuafoje teni ŝin en la brakoj. Se tio iam okazos.

Ankaŭ la nepo Andreas kompreneble kreskas kaj jam de duonjaro frekventas lernejon. Ŝi dubas, ĉu la knabeto vere maturas por tio. Sed supozeble en tiu unua jaro, oni multe ludas. Ŝi demandis lin telefone, sed li ne havas paciencon rakonti ion al la avino. Kiam ŝi mem estis infano, oni komencis nur sepjara, kaj la instruado estis sufiĉe strikta. Hodiaŭ sendube estas alie. La nunaj infanoj ja ne timas la plenkreskulojn.

Ŝi prenas slipon kaj notas aĉetendajn aferojn. Jen kaj jen ŝi stariĝas kaj puŝas la rulapogilon por kontroli, kiom restas en la fridujo kaj ŝrankoj. La filo ĉiam klopodas trudi al ŝi kelkajn pretajn pladojn frostigitajn, varmigeblajn per la mikroondujo, por ke ŝi ne bezonu kuiri. Kion ŝi do faru dum la tagoj? Eblus televidi, kaj iam ŝi ŝatis tion, sed la nuntempaj programoj estas tro bruaj, malkvietaj, nekomprenoblaj.

Deka kaj duono. Ŝi telefonas al la filo por laŭtlegi al li sian aĉetliston.

“Saluton, panjo, ĉu ĉio en ordo? Aĉetlisto? Tekstmesaĝu ĝin; mi estas en *Zoom*-kunveno. Mi alportos ĉion vespere. Ĝis!”

Tekstmesaĝi. Per la nova telefono. Premi la klavetojn sur ĝia ekrano. Iam li klarigis al ŝi, kiel eblas paroli en la telefonon tiel, ke estiĝas teksto, sed ŝi jam forgesis, kiel ŝalti tiun funkcion. Kaj kiam ŝi tiufoje provis, la telefono ne bone komprenis ŝian dialekton, do rezultis stranga aĉetlisto. Ovoj kaj butero fariĝis avo kun botelo. Nu, nenio urĝigas ŝin. Ŝi surmetas la okulvitrojn kaj komencas fingropinte palp-klavi laŭ la manskribita slipo.

Kiam la listo finfine estas preta kaj sendita, sen tro da mistajpoj, ŝi plu tenas la telefonon enmane, foliumante la fotojn de la genepoj ricevitaĵojn dum la pasinta jaro. Kiom ili kreskas! Kiam ŝi denove renkontos la familion de la filo, ŝi estos tute fremda maljunulino por la du infanoj. Se ŝi ĝisvivos tion.

Estas tempo kuiri tagmanĝon. Veran apetiton ŝi ne sentas. Se ŝi povus eliri por promeni en la parko, eble la manĝemo kreskus, sed en ĉi tiu neĝo ŝi ne kuraĝas provi tion. Povas esti nevideblaj glacimakuloj sub la neĝo. Kaj eĉ sen tio, la neĝo sur la trotuaroj estus tro stumbliga, kaj la rulapogilo fiksiĝus en ĝi.

Ĉiuokaze ŝi ne permesas al si malzorgi la manĝojn, do ŝi esploras la enhavon de la fridujo. Ĉu omleto kun ŝinko kaj fromaĝo? Ŝi ne emas. Restas iom da peklita haringo kaj acidkremo. Tio eble ne estas manĝo por neĝa tago de februaro, sed kiu do kritikos ŝin? Krome, ŝi bolkuiros terpomon kaj ovon – se ŝi kalkulos la minutojn, eblas fari tion en unu sama kaserolo. Jen tute sufiĉa tagmanĝo. Eĉ la bofilino ne rajtus plendi, kaj cetere neniu vidos ŝin.

Postmanĝe, ŝi lavas la vazojn kaj kuŝiĝas surliten kun la romano sendita por kristnaska donaco de ŝia filino en la ĉefurbo. La filino, kiu

denove disiĝis de sia koramiko, laŭ telefona raporto antaŭ monato. Kompreneble, en ŝia aĝo la elekto ne plu estas tre riĉa. La bonuloj jam estas prenitaj. Sed kiam ŝi diris tion, la filino nur ridis. Nu, ŝi almenaŭ plu uzas la telefonon por interparoli, ne nur por teksti kaj fotografi kaj perdiĝi en la ŝajne senfina ĝangalo nomata “la reto”.

Ŝi vekiga surlite kun la sento, ke ŝi denove sonĝis pri la filo aŭ nepo, sed detalojn ŝi ne povas revoki. La libro kuŝas ĉe ŝia flanko, fermita, sen legosigno. Cetere ŝi ne memoras, kion ŝi legis antaŭ ol endormiĝi. La romano temas pri la ĉiutaga vivo de virino en la 1930-aj jaroj. Ial la filino pensis, ke tio interesus ŝin, kvankam ŝi ja naskiĝis postmilito. Nu, tio tute ne gravas. Sed fariĝas pli kaj pli malfacile memorteni la intrigojn de la nuntempaj romanoj. Ŝi ne certas kial. Eble temas pri nova modo en la literaturo. Krome la libroj pli kaj pli dikiĝas. Tio ne faciligas digesti ilin.

Kvarono post la tria. Kion fari dum la posttagmezo, atendante, ke la filo liveros ŝiajn varojn? Eblus baki kukon, sed neniu alvenus manĝi ĝin kun ŝi. Bedaŭrinde ŝi neniam lertis pri manlaboroj kiel trikado aŭ kroĉetado, alie ŝi povus krei vestaĵetojn por la nepino. Sed la nuntempaj gepatroj ĉiuokaze ne aprezas tiaĵojn. Ili preferas aĉeti malmultekostajn vestaĵojn kudritajn de junaj azianinoj. Ŝi memoras, ke ankaŭ la bofilino mem nenion trikis por la naskota nepo, kiam ŝi atendis lin antaŭ sep jaroj. Nu, kompreneble, ŝi ja laboris en la hospitalo kaj estis laca reveninte hejmen.

El ekstere aŭdiĝas gaja kriado de infanoj, kaj ŝi stariĝas kaj puŝas la rulapogilon al la fenestro. Malsupre sur la eta teraltaĵo de la korto, kelkaj infanoj en buntaj kombineoj glitas per plastaj sledetoj sur la nova neĝo. Por ili, la neĝo estis longe dezirata kaj certe neniu obstaklo por eliri, eĉ male. Du virinoj en dikaj jakoj staras apude, rigardante la infanojn kaj tretante surloke por teni la piedojn varmaj. La apudaj ludiloj kovritaj de neĝo atendas la printempon, aŭ eble nur degelveteron.

Ŝi decidus kuiru kafon. Fakte, kafumi sola ne estas tre plezure, sed kion fari? Ŝi sidiĝas en la salono kun sia taso da kafo kaj ŝaltas la televidilon, ŝanĝas kanalon kelkfoje. Nenio interesas ŝin aŭ vekas ŝian scivolemon. Ŝajnas al ŝi, ke ju pli da elektoj, des pli ili similas unu la alian. Ŝi remalŝaltas ĝin.

En kelkaj jaroj, ŝi vojaĝis kun amikino al Kanarioj ĉi-sezone. Unuafoje, tio okazis, dum ankoraŭ vivis la edzo, kiu tamen ne volis flugi al la varmo. Li preferis fiŝadi sur arbara lago, tra truo borita en la glacio. Poste, kiam ambaŭ amikinoj vidviniĝis, fariĝis tradicio vojaĝi. Nun jam la duan jaron tio ne eblas, kaj cetere ŝiaj kruroj ne plu sufiĉe stabilas por tia aventuro. Ĉu ŝi telefonu al la amikino por babili? Ne, tio fariĝus nur reciproka plendado pri ĝenaj malsanetoj, kaj pri la timata malsanego. Kaj poste ŝi sentus sin eĉ pli sola ol antaŭ la interparolo. Se ili povus plani ion kune, eble ekskurseton, sed nenio ja fareblas, kaj ili eĉ ne rajtas renkontiĝi.

Morgaŭ, ŝi purigos la apartamenton. Verdire ekzistas neniu malpurajo por forigi, sed se ŝi ne purigus, ja povus kolektiĝi polvo en la anguloj, kaj ŝi sentus, ke la ĉambroj ne estas puraj. Sed ne indas komenci pri tio jam hodiaŭ. Necesas iom ekonomii pri la taskoj. La filo proponis al ŝi akiri diversajn apojn por ludoj kaj ŝatokupoj, sed tio ŝajnas al ŝi sensenca. La amikino brodas, sed al kio do utilas ĉiuj ŝiaj brodaĵoj? La infanoj certe nur forĵetos ilin, kiam ilia patrino estos for.

Finfine aŭdiĝas la ĉeporda signalo. Ŝi gvatas tra la porda lenso, kaj jen videblas la filo. Ŝi malŝlosas kaj malfermas. La sako kun varoj staras apud la pordo, kaj la filo atendas en la lifto-pordo, kelkajn metrojn for.

“Saluton, panjo! Ĉu ĉio en ordo?”

“Jes, ĉio estas kiel kutime. Kaj vi? Ĉu la infanoj bonfartas? Kaj Amanda?”

“Ni ĉiuj estas sanaj. Sed mi devas kuri. La aŭto staras iom malbone.”

“Ĉu vi trovis ĉion? Kiom kostis?”

“Mi pensas, ke ĉion. La kvitanco kuŝas en la sako. Ĝis!”

Li lasas la pordon fermiĝi, kaj la lifto sinkas suben kun li. Ŝi portas la sakon enen, fermas kaj ŝlosas la pordon. En la kuirejo, ŝi surmetas la okulvitrojn, prenas la kvitancon kaj la telefonon kaj kiel kutime sendas al li la sumon per la pago-apo, kiun li akiris por ŝi. Poste, ŝi dum kelka tempo elpakas kaj metas la diversajn varojn en siajn ĝustajn lokojn. Nenio ŝajne mankas. Li elektis nenecese grandan pecon da fromaĝo, sed ĝi ja bone konserviĝos en la fridujo.

Vespere, ŝi preparas teon kaj sandviĉon, kiujn ŝi ĝuas antaŭ la televidaj novaĵoj. La viruso plenigas duonon de la elsendo. Jam pli ol cent

milionoj en la mondo infektiĝis. Cent milionoj! Ne eblas imagi tiom da homoj. Kaj du komo tri milionoj mortis, minimume. Kredeble pli multaj, ĉar ne ĉie oni same zorge raportas. Ĉi-lande hodiaŭ estas la tricenttrideksepa tago de la pandemio. Sed oni jam vakcinas loĝantojn en la maljunulejoj, kiuj plej vundeblas. Se ŝi loĝus en maljunulejo, ŝi jam povus esti vakcinita. Nu, ili estas nur por la plej malfortaj kaj malsanaj. Ŝi ja estas sana kaj vigla, krom tio, ke la kruroj ne tute fidindas. Cetere, se ŝi loĝus en tia ejo, ŝi eble jam antaŭlonge mortus pro la viruso.

Post la veterprognozo, kiu antaŭdiras pluan froston, ŝi malŝaltas la televidilon kaj iras lavi la tetason. Kion ŝi nun faru, ĝis estos tempo enlitiĝi? Kaj kiel ŝi povos endormiĝi, kiam ŝi jam dormis posttagmeze? Eble per helpo de la romano, ŝi tamen ekdormos. Ĉiuokaze, morgaŭ estos vendredo. Tiam ŝi purigos la apartamenton. Tio daŭros almenaŭ du horojn, eble tri, de la tricenttridekoka tago.

Ne estas maskoj por hundoj

de Bashandy Tadros

Egiptio

Nokte, en la stratoj de Haram, la piramidoj ne havas ombrojn. En la longaj stratoj, taksioj atendas elirantajn ebrulojn apud la noktokluboj. Almozuloj esperas, ke ventrodancistoj kaj sekslaboristoj donacos monerojn al ili. Oloroj de parfumoj, de alkoholo kaj de benzino miksiĝas en la freŝa nokta venteto. Ĝus antaŭ la sunleviĝo, alvokoj al preĝo rompas la ŝtofonaĵon de la nokto, kaj anoncas ŝanĝon. Apud la moskeo, kolora lumo aperas tra la pezaj kurtenoj.

Kiam la laca sekslaboristino aŭdas la alvokon, ŝi surmetas la burkon, kiu kovras ŝiajn kontuzojn, kaj malaperigas la tolaĵojn en malhela plasta sako. Ŝi diras al Maged: “Mi devas iri nun, ĝis baldaŭ.” Li donas monon al ŝi kaj demandas: “Ĉu vi ĝuis?” Ŝi hezitas, sed diras: “Certe, vi estas dolĉa.” Ŝi ridetas al lia hundo kaj rapide eliras, kaj eniras taksion. Ŝi prenas kontraŭdolorilon kaj dormas en sia ĉambro dum la tago, ekster la okuloj de la homaro, ĝis la nokto reaperos.

Matene, la samaj stratoj plenas je homoj, aŭtoj, maltrankvileco, ĝeno, kaj kolero. Inter la ŝtormo de homoj, Nadja malpacience provas trovi malplenan vojon per sia aŭto. Post horo, ŝi fermas siajn okulojn kaj atendas la doloron de nadloj penetrantaj ŝiajn vangojn.

La malnova kanzono

Bruna tinkturo kaŝas la grizan hararon de Nadja. Kutime ŝi surmetas plurajn tavolojn da ŝminko. Ŝi ankaŭ surmetas orajn brakĉenon kaj kolĉenon. Ŝi havas malnature dikajn lipojn, kaj grandajn mamojn. Ŝi surmetas multekostan parfumon, kiun ŝi kaŝas en sia sako *Louis Vuitton*. Ŝi aspektas frustrita, ŝiaj brovoj proksimiĝas pro kolero, ŝi malofte ridetas, kaj ŝi neniam ploras krom pro katastrofo.

Sunsubire, Nadja rigardas siajn vangojn ĉe la ekranon kaj ekzamenas kiom glataj ili aspektas. Per la ŝminko ŝi ruĝigas siajn lipojn. Ŝi estas

ekironta, sed ŝi aŭdas lian voĉon dirante: “Panjo!” Tuj ŝi maltrankviliĝas kaj rapidas al lia ĉambro. Ŝi ne volas eniri, ĉar la odoraĉo de la diversaj fumoj povus malbonodorigi ŝian hararon. Karim diras: “Mi bezonas monon!” Rapide ŝi malfermas sian sakon kaj metas ducent egiptajn funtojn sur la tableton. Li diras: “Ne sufiĉas!” Post mallonga disputo, kolere ŝi metas pli da mono en lian manon.

Nadja salutas la hundon, kaj parolas kun Maged. Ili iras promeni kune kaj iliaj vortoj teksiĝas kune el elementoj de iliaj vivoj. Aŭ samecojn aperus nature aŭ ili rekreas siajn romanojn, kaj la strato mallongiĝas sub iliaj paŝoj. “Kiel vi fartas? Kaj kiel Karim fartas?” demandas Maged.

“Mi bonfartas, kaj... ni ŝanĝu la temon, bonvole. Ĉu vi aŭdis pri la pandemio, eble la lando fermiĝos?” Nadja demandas.

“Mi ne kredas. Ni ĝuu hodiaŭon.

– Kompreneble. Mi lacas nun. Ĝis morgaŭ.”

“*La citronujoj estas velkintaj sur siaj teroj...*” per la iPodo Nadja aŭskultas la malnovan kanzonon. La lumo de la cigaredo estas nurnura en la balkono. Ŝi metas siajn ŝvelintajn piedojn sur la kuseneton, kaj la nokto rekomenciĝas. Ŝia filo malfermas la pordon kaj promenas malregule en ŝia ĉambro.

Nadja demandas: “Kiam?”

– Mi ĉesos, kiam mi ĉesos.

– Almenaŭ, ĉu vi prenis viajn kuracilojn?

– Ha, jes, mi prenos ilin nun.”

Malfermu

La novaĵoj alvenas, ĉiu estas devigita porti maskon, la lando fermiĝas. La hundo bojas, ĉar Maged maltrankviliĝas. “Kimo silentu!” Maged ordonas al la hundo, kiam li estas telefonvokanta la bestokuraciston. Post mallonga kaj malkomforta diskuto, la bestokuracisto konkludas moke: “Ne zorgu, ne estas maskoj por hundoj.” Maged rigardas la longan langon de la hundo. La buŝo de Kimo estas ĝia ilo de varmregulado, eble bestoj estas sekuraj, pensas li.

La socia distanco ne permesas veran konversacion. La fina solvo estas, ke Nadja promenas sur la trotuaro de unu flanko, kaj ke Maged

promenas sur la alia trotuaro. Inter ili troviĝas kvar linioj da aŭtoj. Ili parolas per poŝtelefono. Ili ekpromenas je la sunbrilo, ĉar aŭtoj malofte rompas la demalproksiman konversacion. Ambaŭ ne deziras fizikan kontakton, sed kio okazas en la distanco inter najbaroj aŭ amikoj? Kio estas la socia aŭ malsocia distanco, ofte pripensas Maged dumvoje sur la longa strato?

Ĉu vi havas kovimon?

“Panjo!” Karim vokas Nadjan, kaj ŝi revenas tenante la termometron. Time, ŝi legas la temperaturon, sed ŝia masko malaperigis ŝian malfermitan buŝon. “Kiom? Kaj kial viaj manoj tremas?” Karim demandas. “40,2 °C.” “Ne zorgu! Estas la inflamo de miaj vejnoj!”

Ŝi vidas lian piedon, la inflamon, la duone malfermitan tirkeston kaj la injektilojn. Tamen post laboratorio-esploroj, ŝi konsentas, ke ne temas pri kovimo. Karim ne povas movi sian piedon pro la doloro. Li ekpetas sian patrinon aĉeti heroinon por li. Kolere, ŝi malakceptas kaj reparolas pri la danĝeroj de drogoj, kaj pri liaj malsukcesaj provoj de ĉesado. “Silentu, panjo! Mia korpo doloras, viaj vortoj eĉ pli doloras! Efektive, post HIV nenio gravas!” Lia amikino telefonvokas lin kaj li iĝas afabla homo denove. Nadja eliras malrapide, ŝi nur deziras rememori sian junan afablan filon, antaŭ ol la demono de drogdependo posedis lin.

Kie estas homoj?

Maged vekiĝis malfrue. Ĉiumatene la voĉaĉo de la ŝejko vekas lin. Hodiaŭ li scias, ke la ŝejko estas en la malsanulejo pro KOVIM-19. Ofte Maged esperis, ke la ŝejko malsaniĝus, ĉar li neniam ŝatis lian voĉon. Sed li ne atendis, ke li pli preferus la voĉaĉon ol la novan malamikon. Surprize, nek Kimo vekis lin.

La ĝena tago hejme malrapide mortigas liajn sentojn, sed la telefonvoko de la sekslaboristino haltigas la ĝenon. Malgraŭ la pandemio, ŝi volas veni; ŝi bezonas monon. Klientoj aŭ malsaniĝis aŭ timis aŭ pentis pro la pandemio. Maged invitas ŝin nokte.

Samtempe Nadja kolere ĵetas sian poŝtelefonon. La belec-kliniko fermiĝis kaj ŝi bezonas daŭrigi la botokson. Post la morto de sia edzo,

kaj kun sia filo, kiu malrapide malaperas, ŝia nura celo fariĝis konservi la memoron de la juna kaj bela Nadja. La ĝemoj de Karim pensigas ŝin, kiam venos la sekva katastrofo.

Nokte, la strato malplenas kaj silentas. Tra la fenestro, Maged atendas la sekslaboristinon. Poste li ĝeniĝas pro la atendo.

Maged telefonvokas siajn gefilojn, sed neniu respondas. Li volis telefonvoki sian eksedzinon, sed li certis, ke ŝi ne respondos. La sonorilo savas lin el memoraĉoj. Li surmetas maskon kaj preparas koverton. Ŝia vizaĝo ruĝiĝas, kiam li donas al ŝi la koverton. La sekslaboristino bezonas monon, sed ŝi ne volas akcepti. Ŝi diras al Maged: “Mi bezonas laboron, ne monon. Mi ne estas...” ŝi forturniĝas antaŭ ol ekplori.

Nova voĉo alvokas al preĝo, kiam Nadja rimarkas, ke Maged kaj Kimo malaperis. Ĉagrene, ŝi revenas hejmen. Ĉar la nuntempo estas ĝena kaj malplena, ŝi ekskribas pri la negrava pasinto. En la ruĝa skriblibro ŝi skribas: *“Post ses monatoj, li eklaboris en golfaj landoj. Mi provis loĝi tie, sed la vivmaniero ne plaĉis al mi. Mi volis aborti sed li, mia familio, lia familio kaj religiuloj malkonsentis. Infero ĉirkaŭis min. Post promesoj de helpo, mi forlasis la ideon.”*

La voĉaĉo revekas ŝin, ŝi ĝeniĝas kaj feliĉetas samtempe. Ŝi atendas ĝis la ŝveliĝanta vizaĝo normaliĝas, kaj rapide foriras, dum la unuaj sunradioj sur la strato aperas. Maged promenas sole. Ŝi ne bezonis demandi, li tuj diras: “KOVIM-19 prenis Kimon.” Ŝi volas transiri la straton kaj brakumi lin, sed la tempo de brakumoj finiĝis. Li povas vidi ŝian ploradon inter la aŭtoj. Li diras al ŝi:

“Miaj gefiloj telefonvokis min, kaj mi prenos la vakcinon post semajno.

- Mi ne prenos ĝin, mi timas pro la malfavoraj efikoj. Kiel vi fartas?
- Nur Kimo ne juĝis min... Pardonu min, mi ne povas pli paroli.”

Li ne klarigas, ke ŝia filo nomis Kimon: “malpureco”. La religia filo scias, ke lia patro devas vivi laŭ la religiaj reguloj. Tamen li certas, ke ŝi ne surpriziĝus. Ofte Nadja diris, ke ŝia filo estis kiel parazito, li uzis ŝian korpon, ŝi tiam ĉesis esti Nadja, kaj la termino “patrino” venenis ŝian vivon. Patrino signifas dignitan sklavulon al la parazito. Li uzis ŝian monon, aĝon, kaj homecon. Kvankam la malsanulo terurigas ŝin,

ŝi ĉiam esperas, ke li resaniĝos, ĉar la bonaj momentoj kun ŝia juna filo estas memorindaj.

Amikiloj

Nadja revenas hejme, kaj la taglibro fariĝas la sola kunulo. Karim krias kaj ripetas la saman peton. Vidi lian doloron estas netolereble al ŝi, sed la patrino remalakceptas kaj foriras al la taglibro kaj daŭrigas la skribadon: *“Mi revenis kaj la revo de edziĝo fariĝis telefonvokoj kaj mallongaj vizitoj somere. Jaron post jaro, mono kreskis, deziroj kaj bezonoj kreskis, sed amo... mi ne scias. Kiam li mortis, mi ne sciis, ĉu mi amis lin aŭ ne, eble mi ne havis sufiĉe da tempo.”* Ŝi surpriziĝas, ŝia vivo estas unu paĝon longa, kia malplena sencela vivo, ŝi pensas. La amikino de Karim sendas mesaĝon al ŝi. La ombro de rideto aperas, ŝi nek povis kontroli sian korpon, nek povis havi propran edziĝon, nek povis savi Karimon, sed almenaŭ, ŝi sukcesis kaŝi la HIV-on de Karim, kaj ŝajnigis, ke ŝi estas la malbona persono, kiu kontraŭstaris lian edziĝon. Malgraŭ la afableco de lia amikino.

Maged aperas en la rompita ekrano de la poŝtelefono. Larmoj aspektas vitrecaj sur la ekrano, Maged rediras la saman akran rakonton: *“Kiam mi ektrompis, mi pretis aŭ malgajni mian edzinon aŭ la alian virinon. Sed kiam ŝi malkovris la rilaton, kaj mi laboregis akordigi ŝin, samtempe la alia virino forlasis min, kiam ŝi komprenis, ke mi pli zorgis pri mia edzino ol ŝi. Nur Kimo subtenis min...”* kaj li ekploras.

Nadja aŭdas teruran krion el la ĉambro de Karim. Li ekrompas la televidilon, la fenestrojn, la komputilon, kaj ĵetas aliajn objektojn. Li postulas heroinon tuj. Li ne povas moviĝi pro la doloro, kaj ne havas energion pro la varmumo. Nadja ne povas kontroli lin, kiel kutime. Sed ŝi decidas helpi lin. Antaŭe ŝi provis religiulojn, kuracistojn, malsanulejojn, policon, malliberejon, sed nenio povis ĉesi la volon de la malsano. Nun ŝi nur deziras pacon. Ŝi scias, ke kuraciloj ne povas haltigi la doloron. Ŝi akceptas finfine.

Estu kun mi

“Ĉu vi povas veni kun mi?” al Maged ŝi demandas. La viro, kiu nek povis diri ne al la alia virino, nek kuraĝis fini la amrilaton aŭ la edziĝon

kun ŝi, la viro, kiu priskribis sian amrilaton kiel aŭton sen bremsilo. Li atendis la katastrofon, sed ne povis elekti, kiun doloron toleri. Li sciis, ke li dolorigus aŭ la alian virinon aŭ la edzinon plus sin mem. Surprize, li malakceptas. La jaroj en la sama kvartalo, kaj la amikeco ne transiras la muron de timo. “Adiaŭ.” estas la lasta vorto inter ili en tiu malvarma nokto.

En malhela, malkonata loko, la drogkomerciston Nadja atendas, timante. La aŭtopneŭo krevis pro rompitaĵoj de alkoholo sur la strataĉo. Ŝi memoras, ke ŝi ne fiksas la rezervan pneŭon. Dum la nokto aperas viro: li estas maldika kaj havas malhelajn cirklojn ĉirkaŭ la okuloj. Lia longa hararo moviĝas kun liaj paŝoj. Post la ĉifrita saluto, ŝi donas al li la monon, kaj prenas la drogon. Sed ŝi demandas lin pri aŭtomekanikisto. Li respondas: “Ĉi tie, ne estas mekaniĉistoj, kaj *Uber* ne povas alveni. Venu kun mi sur la motorciklo, mi kondukos vin al sekura konata loko, kie vi povos alvoki taksion.”

Sidante malantaŭ la drogkomercisto, Nadja brakumas lian talion. Laodoro de la leda jako, la parfumo kaj la rapida vento estas la plej plezura sperto, kiun ŝi havis ekde la komenco de la pandemio. Momente, ŝi reestiĝas la bela juna Nadja. Li promesas protekti ŝian aŭton. Eble, li nur ŝtelas vivojn, ŝi pensas.

“Mi amas vin!” Karim ridas, kaj rapide malaperas en sian ĉambron. Post paca nokto, la amikino de Karim telefonvokas Nadjan, ĉar ŝi maltrankviliĝas. Karim kutime sendas mesaĝon al ŝi matene. Nadja paŝas al lia ĉambro. Ŝi trovas la injektilon en lia blua brako, kaj longan linion de sango sur la lito. Post la ŝoko, ŝi telefonvokas Magedon. Rapide, li kaj la kuracisto eniras la ĉambron. Inter krietoj kaj duonvortoj, ŝi priskribas la historion. La kuracisto anoncas, ke Karim mortis. Malgraŭ tio, ke ŝi sciis, la anonco malkompate puŝas la novaĵon el sia interna realo al la netuŝebla vero. La tuta vivo de Karim pasas kiel ŝtormo antaŭ ŝi.

Ekster la ĉambro, Maged demandas la kuraciston: “Bonvolu, ĉu vi povas skribi, ke li mortis pro KOVIM-19?”

Amo en la tempoj de kovimo

de Jorge Rafael Nogueras

Portoriko *Unua premio*

Marto 2020 estis tre malbona monato. Unue, mia koramiko kaj mi rompis nian plurjaran rilaton; poste, mia kato eskapis el la fenestro kaj neniam revenis (Ho, Miŝu...! Kien vi...?); kaj fine, iu juna helpanto en vendejo nomis min “sinjorino” anstataŭ “fraŭlino” la unuan fojon en mia vivo.

Ho, kaj kompreneble: la pandemio komenciĝis mialande, kaj ni ĉiuj devis subite enhejmiĝi kaj kvaranteni dum pli ol jaro.

Sed mi ne anticipu aferojn: tiam neniu el ni sciis, kiom longe ni devos resti hejme, kiam oni ekhavas vakcinon (se tio eĉ eblus!), kaj ĉu aŭ ne Miŝu iam revenos hejmen. (Nu, estis precipe mi, kiu scivolis pri tiu lasta.) Ajnokaze, aferoj iĝis pli kaj pli malhelaj, kaj estis nenia kialo esperi pri io ajn.

Des pli, ke mi havis grandajn somerajn planojn, kiuj devis tuj esti forĵetitaj kaj oferitaj je la altaro de la ĉieasta, ĉiopova kaj ĉioruiniga dio KOVIM-19. NASK en Raleigh? *Goodbye!* UK en Montrealo? *Adieu!* IJK en Nederlando? *<Kiel ajn oni diras “Ĝis” en la nederlanda>!*

Kompreneble, oni provis plenigi la truojn postlasitajn de tiomaj Esperantaj renkontiĝoj per streĉaj retaj kongresoj, kie oni simple fiksrigardadas komputilekranon dum horoj, provante identigi homojn ene de etaj kvadratoj, kaj ripetante: “BONVOLE MALMUTIGU VIN!” kelkajn fojojn ĉiutage. Mankis al mi la brakumoj de miaj amikoj, la babiladoj en la koridoroj, eĉ la odoro de neduŝitaj esperantistoj.

Eta punkto de lumo inter ĉio ĉi estis Klaŭs. Ni konatiĝis tiun someron pere de *Amikumu* (laŭ kiu li estis nur dudek kilometrojn for de mi): ĉar mi kontrolas la apon ofte por ekscii pri novaj esperantistoj en mia urbo, iun tagon mi rimarkis lian senbildan profilon enrete kaj mi skribis al li mallongan tekst-mesaĝon. Li – nekredible! – *tuj respondis!*

(Ho, jen ververa *Amikumu*-a miraklo! Benata estu ties kreinto, Sankta Ĉak-Smito!)

La unuaj mesaĝoj estis la kliŝaj deĉiamaj unuaj demandoj inter esperantistoj: “De kiam vi parolas Esperanton?” “Kiel vi lernis ĝin?” “Ne, ne ‘kiAl’, sed ‘kiEl’... sed nu, bone, diru al mi ankaŭ kiAl”, ktp., ktp. Sed, eble pro la kvaranteno kaj la absoluta manko de io alia por fari, ni sendis mesaĝojn unu al la alia preskaŭ ĉiutage. Mi parolis pri mia antaŭ-kovima vivo; pri tio, kion mi faras por ne freneziĝi sola kaj senkata en mia domo; kaj kion mi plej antaŭĝuas fari, kiam ni finfine povos elkaverniĝi.

Li estis tre afabla, amikema kaj ŝercema, pro kio mi tuj ekŝatis lin, sed mi rimarkis, ke mi kutimis multe pli ol li paroli pri mia privata vivo. Mi ekkonsciis pri tio, ke eĉ post tri monatoj da preskaŭ ĉiutaga mesaĝado, mi sciis tre malmulte pri li. Nu, mi sciis, ke li estas dudek kilometrojn for de mi; ke li loĝas ĉe siaj gepatroj (ne tre malofte afero nuntempe ĉe junuloj niaĝaj), kaj ke li parolas – nu, almenaŭ skribas! – Esperanton tre bone. Kiam ajn mi provis ekscii ion pli pri li, li ŝerce ŝanĝis la temon alidirekten, tiel lerte, ke mi tuj eĉ forgesis pri tio, kion mi demandis.

Duboj komencis roniĝi mian cerbon, tamen: “Ĉu li havas koramikinon – tre pacienca koramikinon – kiu ne ĝeniĝas, kiam ŝia kunulo mesaĝas alian virinon la tutan tagon? Ĉu li ja loĝas ĉe siaj gepatroj, sed eble nur pro tio, ke li murdis ilin kaj faris ledajn meblojn el ilia haŭto? Ĉu li fakte estas maljuna, malbela idisto, kiu ruze lernis Esperanton nur por enamigi kaj poste senluziigi senkulpajn esperantistinojn?”

Ĉu mi diris: “enamigi”? Ho. Jes, mi supozas, ke tiel estas, ĉu ne? Diable.

Nu, ajnokaze, mi decidis, ke eble mi almenaŭ certiĝu, ke ja ne temas pri MALjuna, MALbela idisto – junan, belan idiston mi almenaŭ povus iel provi eks-idistigi! Do, post kelkmonata mesaĝado pere de *Amikumu*, iun tagon mi rekte demandis Klaŭson, ĉu ni povus babilu Skajpe.

Aŭ *Zoom-e*. Eĉ *Jitsi-e*! Lia unua reago estis – malreago. Li simple ne respondis dum kelkaj tagoj, kaj mi vidis ĉiujn miajn timojn realiĝi; mi sentis min dupo, fakte, la plej granda dupo, kiu iam ajn dupis! (“Dupis”? “Dupiĝis”? Zamĉjo scias!)

Tamen, post tri tagoj, li ja respondis, kaj sendis al mi sian Skajp-uzantnomon. Hura! Mi ne estas dupo! Nu, almenaŭ ne ĉi-rilate! Mi tuj vokis lin, kaj je mia miro, li tuj respondis (kvankam la kamerao estis malŝaltita, kaj ne estis ajna profiltbildo).

“Saluton, Elen!” li diris la unua per perfekta, klara Esperanto (kiu, honeste dirite, iomete hontigis la mian).

“Saluton, Klaŭs! Kiel vi fartas?” mi respondis, provante elparoli ĉiun vorton kiel eble plej ĝuste por imponi lin. “Ĉu via kamerao paneis...?” mi demandis, duon-ŝerce, duon-instige.

“Nu... ne... mi simple ne ŝaltis ĝin. Ĉu gravas?”

“Mi ne dirus, ke ĝi *gravas*... sed, vidu, mi ŝaltis la mian!”

“Jes, mi ja vidis! Kaj mi estas tre feliĉa, ke vi ŝaltis ĝin, fakte...” li diris, kun ioma embaraso, kiu baldaŭ iĝis ankaŭ mia.

Feliĉe, post kelkaj minutoj ni revenis al nia kutima senĝena babila-do. “Eble mi konfesu,” mi diris, ŝajnigante honteman voĉon, “ke post kiam dum kelkaj tagoj vi ne respondis al mia peto babili Skajpe, mi iom timis, ke vi estas malica idisto celanta delogi kaj devojigi aldonitajn esperantistinojn kiel mi”.

Li respondis mistere, kun kvazaŭ aŭdebla okulsigno: “Nu, kiel vi scias, ke mi fakte ne estas tia? *Ni parolez Ido!*”

“Ho, ve! Ĉu vi fakte scipovas ĝin!?”

“Ha, ha! Ne, ne, tute ne. Fakte, tiu frazo tuj igus min mensogulo, ĉar mi povus nenion kroman diri en Ido!”

Je tio, ni ambaŭ ridegis, kaj la konversacio poste fluis glate, kiel ĉiam – eĉ se, verdire, la fakto, ke li ne ŝaltis sian kameraon, iom piketis min. Kial, tamen? Kial lia aspekto gravu? Kial li ŝuldas al mi belan vizaĝon? Aŭ ajnan vizaĝon? Mi do decidis ne plu insisti: nia rilato tre gravis al mi, kaj se li ne volis, ke mi vidu lin – ajnakiale – mi respektu tion.

La monatoj pasis, kaj la rilato intensiĝis. Ni parolis voĉe ĉiun nokton antaŭ ol endormiĝi, ĉiun matenon tuj post kiam ni vekigis, kaj foje eĉ dum ni tagmanĝis (ĉiu en sia domo, kompreneble) – nur por ŝajnigi, ke ni estas kunaj, kaj ke ne estas tutmonda pandemio kiu disigas nin.

Finfine, oni komencis vakcini homojn, kaj mi faris mian plejblon trovi lokon, kie oni konsentus vakcini min (ĉar dekomence, miaaĝuloj devis atendi sian vicon). Por rapidigi la aferon, tamen, antaŭ kelkaj se-

majnoj mi volontulis ĉe kliniko, kiu disdonas la vakcinon kaj jam je la fino de la deĵortago, la gloraj imunigaj ĥemiaĵoj produktitaj de *Johnson & Johnson* fluis en miaj vejnoj. Kia feliĉo! (Nu, la sekvan vesperon mi sentis iom *malpli* da feliĉo – sed tamen!) La tago de mia liberigo jam alproksimiĝas! Kaj – kial ne? – la tago, kiam mi finfine povos renkonti Klaŭson vizaĝ-al-vizaĝe!

Mi elkovis planon: mi ruze faros demandojn al Klaŭs, kiuj malkaŝos sufiĉe da informo por ekscii kie li loĝas. Lian familinomon mi jam scias (kvankam tio ne multe helpas, kiam ĝi estas tiel ofta kiel la lia); mi ankaŭ informiĝis pri la plej proksima filio de la urba biblioteko, kaj – jen eltrovo genia! – la nomojn de liaj gepatroj. Danke al ĉio ĉi, Guglo, kaj mia nesatigebla scivolemo kaj neelĉerpebla libera tempo, mi finfine eltrovis lian adreson.

Kaj nun, jen mi hodiaŭ, finfine imuna kontraŭ la viruso, preta eliri en la mondon, kun eta slipo kiu havas adreson. Mi enmetis ĝin en mian telefonon kaj petis ĝin direkti min Klaŭsen.

Mi alvenis al mia celo post eterna, senfina kaj longega duonhora stirado. (Kial estas tiom da trafiko!? Ĉu ne ankoraŭ estas pandemio tutmonda? Restu hejme, homoj!) La domo de ekstere aspektis sufiĉe normala, kvankam tute ne tia, kia mi imagis ĝin dum la pasinta jaro. Ne gravas!

Mi alpaŝis la pordon kaj, antaŭ ol mi povus perdi la kuraĝon, mi frapis laŭte.

Post iomaj sekundoj, virino malfermis la pordon iomete. “Jes?”

“Bonan vesperon, sinjorino! Mi estas Elen. Ĉu... Ĉu Klaŭs estas hejme?”

La virino miris iomete, sed pli larĝe malfermis la pordon. “Vi estas Elen? Ho! Nu, jes, kompreneble, Klaŭs estas hejme! Ĉu... li scias, ke vi venos hodiaŭ...?”

“Ne! Temas pri surprizo! Ĉu tio estas en ordo?”

“Jes, jes, kompreneble! Envenu! Klaŭs!” ŝi vokis malantaŭ si, enlasante min en la salonon. “Vi havas gaston!”

Kaj jen la momento, kiun mi delonge atendis. Ĉiun timon, kiun mi jam delonge forpuŝis kaj nuligis, revenis en mian menson kaj igis min atendi rigide, kvazaŭ mi sidus sur pinglo-kuseno.

En la salonon venis dekdujara knabo. “Gasto? Kiu gasto?”

Mia koro plonĝis ĝis la fundo de mia stomako. Jen io, kion mi neniam eĉ konsideris! Kiel eblas, ke tiel juna knabo povus soni tiel virece, kaj paroli Esperanton tiel lerte? Kiel eblas, ke mi enamiĝis al eĉ-ne-adoleskanto?

“Ne por vi, Karlo!” diris ĝenate la patrino, elpelante la knabon per mangesto. “Diru al Klaŭs, ke li venu en la salonon!”

“En ordo, en ordo...” suspektete diris la knabo forirante. “Sed ŝin vi petu surhavi maskon en la domo, ĉu ne?”

“Ne zorgu pri mi: mi jam vakciniĝis!” diris mi ĝojplene, ekkonsciante pri mia eraro, kaj finfine elspirante la unuan fojon, ekde kiam mi eniris la domon.

Post kelkaj sekundoj, alta, bela junulo eniris la ĉambron. “Gasto? Kiu gasto?” li eĥis la vortojn de sia pli juna frato, kaj haltis subite, kiam li vidis min. “E... Elen?”

“Jes! Jen mi! Surprizo!” mi kriis, kaj saltis sur lin por brakumi lin (ni esperantistoj ja estas brakumemuloj).

Ankoraŭ iom ŝtoniĝinta surloke, li brakumis min, kaj demandis: “Sed... kiel eblas...?”

Mi rakontis al li pri mia ruzo, dum la patrino senkulpigis sin kaj lasis nin solaj. “Mi apenaŭ povas kredi, ke mi estas ĉi tie, kaj ke vi estas antaŭ mi! Vi, la sekretemulo! Kial vi tiel zorge kaŝis vian vizaĝon? Vi eĉ ne estas *tiel* malbela...” mi riproĉis lin ŝerc-moke (ĉar mi fakte taksis lin tre ĉarma).

“Mi...” li komencis, embarasite. “Mi sentas, ke mi devas ion malkaŝi al vi, Elen.”

Mi ja delonge intuciis, ke io ne estas en ordo. Mi enspiris, pretigis min, kaj diris: “Nu, malkaŝu do. Vi finfine estas idisto, ĉu...?”

Li duonridetis. “Ne. Eble tio estus pli facila, tamen!” Ankaŭ li enspiris, kaj daŭrigis: “Vidu: por preskaŭ ĉiuj, ĉi tiu pandemio estas mondskua evento – io, kio tute renversis la ĉiutagan vivon kaj malhelpas al homoj fari ĉion, kion ili volas. Tamen, por mi... ĝi estas... maltia!”

Mi mienis konfuzite, kaj li klarigis: “Mi estas agorafobo, Elen. Aŭ, se vi volas esti pli bonlingvisma, eble mi diru, ke mi havas fobion – multe pli ol simpla timo – pri la ekstera mondo.

“La nura penso elpaŝi el la domo tute angorigas min. Mi parolas kun psikiatro de longa tempo, sed eĉ tiam, jam de jaroj mi ne iras eksteren. Mi studis ĉe reta universitato; mi laboras hejme; mia tuta vivo estas ĉi tie. La kvaranteno ne malgrandigis mian mondon: ĝi tute larĝigis ĝin! Ĝi alportis Esperantuojn ĉe min; ĝi igis homojn okazigi retajn eventojn preskaŭ ĉiun tagon tra la tuta mondo; ĝi ebligis al mi la unuan fojon ĉeesti Universalan Kongreson kaj IJK-on... Jen io, kion mi neniam pensis, ke mi iam povus fari! Kaj ĝi... ĝi venigis vin en mian vivon...”

Mi tenis lian manon kaj diris milde: “Ne ĉio malbonas pri KOVIM-19, mi supozas... Sed, kial kaŝi vian vizaĝon? Kial tiom da sekretemo?”

“Mi ne volis... iĝi pli reala por vi, Elen. Estis jam sufiĉe malfacile por mi babili kun vi ĉiun tagon, sciante, ke mi neniam povos esti por vi fakta kunulo. Mi pensis, ke eble kaŝante min malantaŭ ekrano, kaj restante senvizaĝa avataro, mi povus resti iom nereala, kaj niaj sentoj povus resti... nu, virtualaj.”

“Pri tio, tamen, mi kredas, ke ni ambaŭ fiaskis sufiĉe memevidente.” mi diris tenere, tenante nun ambaŭ el liaj manoj.

“Jes, verŝajne jes.” li ridetis al mi. “Do... kio nun...?”

Mi rigardis en liajn okulojn. “Nu, mi ne scias, kio okazos pri la viruso, kaj mi ne scias, ĉu post la pandemio Esperantujo revenos en la realan vivon, ĉu oni ne plu okazigos internaciajn eventojn rete, ĉu homoj laciĝos je *Zoom*-renkontiĝoj kaj retaj prelegoj... Sed... almenaŭ *mi* iros nenien...”

Li ridetis al mi malsekokule.

“Krom se vi idistiĝos, kompreneble...” mi aldonis admone.

“*Ni parolez Ido!*” li kriis kun granda rideto, kaj ni fandiĝis en rea brakumo.

Trudizoliĝo

de Yin Jiaxin

Ĉinio

elĉinigiĝis LinguaForce

1

Dum la vintro fine de 2020, la nova viruso frapis la urbon Ĝjangdu en Ĉinio. Tia situacio estis alarma. Por malhelpi la disvastiĝon de la malsano, la registaro decidis enŝlosi la urbon: ĉiuj devis resti hejme, dum sociaj laboristoj kaj bonvoluloj zorgis pri provizado de necesaj kaj urĝaj servoj al la loĝantoj.

Tagon post tago, la nombro de infektitoj kreskis kaj la medicina personaro estis pli ol superŝutita. Mi akceptis novajn malsanulojn ĉiutage, kaj mia edzino, kiu estas flegistino, estis tiom okupata, ke ŝi eĉ ne havis tempon por iomete ekspiri. Oni bezonis pli ol dudek minutojn por surmeti la tri tavolojn de protektaj vestaĵoj, kaj saman tempon por forigi ilin. Demetitaj, ili ne plu estis reuzeblaj. Por ŝpari tempon, eviti iri al necesejo kaj ne malŝpari protektajn vestaĵojn, ni klopodis ne trinki akvon antaŭ aŭ post la servo. En la medicina personaro, kelkaj eĉ uzis vindotukojn. Laŭleĝe, la koncernita medicina personaro ne rajtis hejmeniri dum la trudizoliĝo. Ili devis loĝi en specifa hotelo tiucele preparita. Ve, mi havis mian trijaran filon kaj mian senilan patron hejme...

Tiun matenon, kvankam mi estis vekiĝinta kaj konsciis, ke taglumas, mi ne sukcesis ellitiĝi: palpebroj pezis, membroj senfortiĝis, tuta korpo doloris. Mi tusadis denove. Mi strebis kaŝi mian tuson, timante veki mian edzinon, kiu dormis en la apuda lito. Ŝi vere multe bezonis ripozi. Mi fakte jam tuis la antaŭan tagon, sen ke tio vere maltrankviligu min. Mi trinkis du glasojn da varmega akvo kaj poste re-enlitiĝis.

Mi havis febron, mia brusto streĉiĝis min. Mi malĝoje komencis suspekti, ke eble min trafis la nova viruso. Iu bonvolulo frapis nian

pordon por alporti matenmanĝon. Tio vekis mian edzinon. Ŝi rimarkis, ke mi ne estis en mia normala stato kaj tuj telefonis al la hospitalo. Nia hospitalo troviĝas ĝuste antaŭ la hotelo. La medicina personaro tuj alvenis. Ili komence metis al mi oksigenan maskon. Tio tuj multe mildigis mian streĉo-senton. Kiam oni elĉambriĝis min sur brankardo, mia edzino estis trude tenita en la hotelĉambro. Ŝi unue devis submetiĝi al RNA-testo.

Alveninte ekster la hotelo sur mia brankardo, mi havis klaran menson kaj reakiris miajn fortojn. Mi volis promeni laŭ la rivero malantaŭ la hotelo. Mi luktis kiel fiŝo ekster akvo, kaj sukcesis eskapi el la brankardo.

La rivero kaj la ponto, kie kutime svarmis ŝipoj kaj preterpasantoj estis nun dezertaj. La tuta ĉirkaŭaĵo aspektis timige trankvila. Grizaj nuboj ŝvebis en la ĉielo, dum vintro-vento skuis mortintajn branĉojn kaj sekan herbon.

Malproksime kelkaj junulinoj paŝis al mi interparolante. Ili haltis apud mi, daŭre pepantaj, kvazaŭ ili ne rimarkis min. Subite, patrolspavo flugis super nin. Ĝi sonigis krimon: “Bonan tagon, junaj sinjorinoj! Ne restu ekstere. Rapide rehejmiĝu! Tuj!” La junulinoj tuj disfuĝis. Mi restis senmova. La spavo daŭrigis sian vojon, kvazaŭ ĝi ne rimarkus min. *Kio okazas? Ĉu mi estas travidebla? Aŭ, ĉu eble mi estas sonĝanta?* Ankoraŭ la maljunulon, kiu kuris al mi, la spavo ne rimarkis.

Ha... Li estas mia patro!

“Patro, kion vi faras ĉi tie?” demandis mi surprizite.

“Mi venis vin adiaŭi.” respondis li kun vizaĝo plena je ĉagreno. “Mi iras rekuniĝi kun via patrino.

– Kio okazas?

– Mi glitis, lavante min.”

Du aĉ-aspektaj viroj nigre vestitaj rapidis al ni. Mia patro tuj diris al mi: “Filo mia, tempon mi ne plu havas. Rapide rehejmiĝu por savi vian filon. Ho, mian amatan nepon...”

Li apenaŭ finis sian frazon, kiam la du monstraj viroj ekkaptis lin. La triopo malaperis fulmtuje. Mi miregis pri tio, kio ĵus okazis. Mi pene postkuris ilin, sed ne sukcesis ilin atingi. Mi tiam ekkonsciis, ke mia korpo estis tiom malpeza, ke tio ebligis al mi flugi.

*Ha, mia filo! Mia patro ĵus aludis prie: kio okazis al mia amata filo?
Mi rapidis al mia apartamento, ekflugante survoje.*

2

Alveninte al la pordo, mi frapis per ĉiuj miaj fortoj, sed vane. En tiu preciza momento pasis en la koridoro du junaj maskitaj flegistinoj, tute nigre vestitaj, kun termometro kaj kajero enmane. Ankaŭ ili ŝajnis ne rimarki min. *Kio fariĝis mi? Ĉu fantomo? Se mi fariĝis fantomo, kial la du nigre vestitaj viroj ne kaptis min? Ĉu tio estas sonĝo?*

La junulinoj frapis la najbaran pordon kaj anoncis al miaj najbaroj, ke laŭ la leĝoj de la registaro, ekde hodiaŭ, ĉiu loĝanto de la domego estos submetita al ĉiutaga san-kontrolo. Kontrolinte ĉies bonfarton unu post la alia, la knabinoj venis al mia hejmo.

“Bonan tagon!” kriis unu el la knabinoj, dum ŝi frapis la pordon. Ne-niu respondis. Ŝi lokis sian orelon ĉe la pordo kaj aŭdis sonon de televi-dilo. Ŝi frapis denove, pli laŭte, kaj kriis: “Bonan tagon! Ĉu iu ĉeestas?”

– Kiu vi estas?” La voĉo de mia filo sonoris aliflanke de la pordo. Tio trankviligis mian nervozan koron.

– “Knabeto, ni estas sociaj laboristoj. Ĉu vi bonvolos malfermi la pordon?”

– Ne. ‘Estas monstroj ekstere. Ne eliru!’ diris al mi avĉjo.

– Lasu nin paroli al via avo, ĉu konsentite?”

– Avĉjo nun dormas, surgrunde.”

Malbona sento trapasis mian menson.

Surprizita, knabino respondis: “Ĉu surgrunde? Kun tiu frosta vetero?”

– Mi metis litkovrilon sur lin.” La fila voĉo sonis fiere, sed mia koro disŝiriĝis.

“Veku vian avon, por ke ni povu diskuti.” konsilis knabino.

“Li ne vekigās. Jam de du tagoj.”

Mi kriegis malespere. Sed la knabinoj ne povis min aŭdi nek vidi. Unu el ili tuj alvokis sian ĉefon, la alia denove kriadis aliflanken de la pordo: “Knabo, malfermu la pordon, ni venas por vin helpi.”

“Definitive ne!” mia filo firme rifuzis kaj ne plu respondis al ili.

Post momento, la komunumestro, la administranto de la domego kaj sukuristoj alvenis surloken. La administranto alvokis Tzoŭ, iun naj-

barinon, kiu estas instruistino en la infanĝardeno. Surmetinte la projektajn vestaĵojn, Tzoŭ frapetis la pordon dirante: “Dabaŭ, estas mi, instruistino Tzoŭ, kiu loĝas en la unua etaĝo. Ĉu vi rekonas mian voĉon?”

Neniu respondis.

Tzoŭ denove frapis la pordon: “Kun la afablaj gesinjoroj, ni forfuĝigis la monstrojn. Dabaŭ estas la plej kuraĝa, ĉu ne? Li ne timas. Venu ĉe mi ludi kun filino, ĉu konsentite?”

La pordo finfine malfermiĝis. Mia filo havis ion en la buŝo. Tzoŭ demandis lin, kion li manĝas. Li etendis sian etan manon kaj montris manĝaĵon por orfiŝoj. *Ho, kompatinda filo mia!* Krom orfiŝ-manĝaĵo, li ne plu havis ion por manĝi.

3

Du aĉaspektaj viroj, same nigre vestitaj kiel tiuj, kiuj forrabis mian patron, malsupreniris de la supra etaĝo. *Kion ili volas? Ĉu eble ili estas min serĉantaj?* Senhezite, mi fulmrapide desupris laŭ la ŝtuparo kaj eskapis el la konstruaĵo. Jen mi, elkuranta ekster la kvartalon. *Sed, kien mi povas iri?*

Mi ne sciis, kien iri. Mi alterne paŝis kaj flugis, sencele. Puraj stratoj, multkoloraj pontoj, amaso da ĉielskrapantoj, larĝa kaj klara rivero fluanta inter du montetoj kovritaj de densaj arbaroj... La urbo estis ja bela, sed nun dezerta kaj minaca. *Sed kiam do finiĝos tiu epidemio? Kiam reviviĝos mia urbo?*

Subite, ambulanco preterpasis min, tre proksime kaj fulmrapide. Du aĉaspektaj viroj nigre vestitaj sidis sur ĝia tegmento, kun grimacaj ridetoj. Mi rigidiĝis pro timo. *Kial mi kapablas ilin vidi? Ĉu vere mi fantomiĝis? Ne, mi ne volas morti. Mi ankoraŭ junas. Mi havas amatan edzinon kaj ĉarman filon. Mi retrovu mian korpon. Sed jes, memevidente, mia korpo devas esti tie, en la hospitalo!*

Ĉerkveturilo estis parkita antaŭ la enirejo de la hospitala konstruaĵo. Enirante la sekcion, kiun mi bone konis, mi sentis strangan etoson. Ĉeestis multe pli da kuracistoj kaj flegistinoj ol antaŭe. Multajn mi ne konis. Ĉiuj tiuj nekonatoj parolis la mandarenan kun provinca akĉento. Mi ne konis la nomojn skribitajn je iliaj uniformoj. Ĉiuj svarmis sen atenti min. Subite, mi renkont-pasis la du aĉaspektajn virojn nigre

vestitajn, perforte trenantaj staĝanton eksteren. La malĝoja kaj pala rigardo de la staĝanto montris, ke li neniel konsentas forlasi ĉi tiun mondon. Mi furiozis. Mi baris ilian vojon kaj freneze batalis kontraŭ tiuj du monstroj por savi la kompatindan staĝanton.

Kiam mi svingis mian pugnon, iu kaptis mian brakon kaj kriis: “S-ro Direktoro, vekigu! Vekigu!”

Mi malfermis la okulojn. Du kuracistoj kaj du flegistinoj staris ĉirkaŭ mia lito. Mi konis du el ili.

“Ĉu vi koŝmaris?”

Mi ne reagis.

“Kiel vi sentas vin? Vi senkonsciigis antaŭ du tagoj.”

Mi respondis kapjese. Kun la oksigena masko sur la vizaĝo mi ne povis paroli kaj mi sentis min ankoraŭ malforta kaj malbonfarta.

La de mi konata flegistino prenis sian telefonon kaj vide-alvokis mian edzinon. Vidante min, mia edzino ekridetis kun larmoplenaj okuloj kaj diris: “Edzo mia, karulo, mi preskaŭ mortis pro timo. Des pli, ke pli frue en la tago mi aŭdis en la novaĵoj, ke kuracisto de nia hospitalo mortis ĉimatene.”

Mi movetis mian kapon, kun larĝegaj okuloj, kvazaŭ estus por demandi: “Pri kiu temas?”

“Estas la staĝanto. Kia dramo, kia malĝojo!” respondis la de mi nekona kuracisto.

Ĉiuj silentis. Larmojn mi eksentis en la okuloj, kaj la tuta ĉambro pleniĝis je ĉagreno.

Mi eksciis, ke fakte mia edzino alvokis ĉiutage por havi novaĵojn pri mi.

Mi volis koni la rezulton de ŝia RNA-testo. Ĉar ni parkere konas unu la alian kaj niaj mensoj estas kunligitaj, ŝi tuj komprenis, pri kio mi pensas, kaj diris al mi, ke la testo estas negativa, sed ke ŝi devas kvarantenumi dum du semajnoj. Mi montris al la ekrano du miajn fingrojn V-formajn.

Tamen mia sonĝo dum mia senkonscio maltrankviligis min. La sekvantan tagon mi multe pli bone fartis, sed ne povis libere moviĝi, ĉar mi estis ligita al ĉiaj kabloj. Kiam ili liberigis min de mia oksigena masko, mi tuj petis mian telefonon. Mi alvokis mian patron unufoje,

ne havis respondon, reprovigis plurfoje, daŭre sen respondo. Mi tuj angoris, kaj vokis mian edzinon.

4

Finfine, mia edzino sendis al mi tekstmesaĝon. “Karulo, mi kontaktis la administranton de la domo. Li diris al mi, ke via patro stumblis en sia kuirejo. Li ne falis, sed lia telefono rompiĝis. Post la trudizoliĝo, ni aĉetos al li altkvalitan telefonon. La administranto pruntedonis al li sian poŝtelefonon, por ke mi povu vide-alvoki lin kaj nian filon. Ambaŭ tre bone fartas. Ili bezonas nenion, kaj eĉ se estus la kazo, ĉeestas bonvoluloj por ilin helpi. Dabaŭ tre ŝatus vide-paroli kun vi. Mi mensogis al li dirante, ke vi estas tre okupata en la hospitalo. Mi ne kuraĝis diri, ke vi malsaniĝis. Trankviliĝu, karulo! Zorgu pri vi kaj resaniĝu.”

Mi respondis al ŝia tekstmesaĝo: “Konsentite, karulin’. Ankaŭ vi, prizorgu vin. Mi rimarkis hieraŭ, ke vi aspektas elĉerpita kaj denove maldikiĝis. Atentu pri vi mem. Profitu ĉi tiun kvarantenon por bone dormi kaj revigliĝi. Sen vi, viaj kolegoj estas verŝajne tre lacaj!

– Ili ne estas tiom okupitaj, kiom ni estis komence de la epidemio. Miloĵ da kuracistoj kaj flegistinoj venis el la tuta lando por helpi nian provincon. Ne mankas nun medicina personaro.

– Mi vidis en televido, ke multaj aliaj provincoj, eĉ landoj, donacis amason da ekipaĵoj al nia provinco. Kiom bela! Kiam iu flanko suferas, ĉiuj flankoj kunhelpas!

– Laŭ raportoj, dum la tri pasintaj tagoj, pli kaj pli da pacientoj resaniĝas kaj elhospitaliĝas, kaj la nombro de infektoj malpliĝas. Mi deziras al vi resaniĝi tuj.

– Tio ne longe daŭros, karulin’. Mi sopiras rebrakumi vin!

– Perfekte. Ĉiom, kiom vi volos, post via eliro de la hospitalo!”

5

Du semajnojn poste mi tute resaniĝis. Mi volis tuj relabori. Kun tre serioza tono, mia ĉefo ordonis al mi preni tri liberajn tagojn antaŭ la redeĵoro.

Ankaŭ la kvaranteno de mia edzino finiĝis. Tiutage ŝi atendis min je la elirejo de la hospitalo. Vidante min, ŝi ekploris kaj ĉirkaŭbrakis min.

Mi brakumis ŝin, karesis ŝian kapon kaj dolĉe diris al ŝi: “Jen. Finfine finiĝis. Rigardu, via edzo ja staras antaŭ vi. ‘Kio min ne mortigas, tio min fortigas.’ Ambaŭ ni bone fartas, ni povas konsideri nin feliĉaj. Ne ploru. Foriru ni.”

Man-en-mane, ni direktis nin al la hotelo. Ŝi paŝis laŭ la tuta vojo kun klinita kapo. Ŝiaj larmoj faladis senĉese. Mi ne komprenis, kio lamas.

Alveninte en la hotelĉambro, ŝi denove ĵetis sin en miajn brakojn, ploregante.

“Kio okazas?” demandis mi.

“Karulo, fakte... Verfakte, via patro... Li, li...”

La rideto

de Stela Besenyei-Merger

Hungario

– Tiun ĉi libron vi nepre devos legi! – krias mia patrino al mi malgraŭ tio, ke mi staras nur kelkajn paŝojn for. Mi ekatentas, ĉar ĝis nun ŝi sufiĉe neinteresite pakadis la librojn. Mi konstatas, ke ŝi ne ofte rekomendas ion ajn el la hejma biblioteko. Nek aparte ŝi legas tiujn librojn, la tavolo de polvo sur ili pligrandiĝas ĉiujare. Kiam oni havas tiom multe da libroj, kiuj gravas el inter ili? Bretoj kaj bretoj plenplenaj je pluraj vicoj, eĉ pliaj stokitaj sur ili... Mi ne aparte emas tuŝi ilin, ĉar mi movas unu kaj la resto falos sur mian kapon.

Sed nun, finfine alvenis mia tempo! Mia dio, mi estas tiom ege ekscitita, ke ni finfine ordigos la loĝejon. Mi atendis tiun momenton de pli ol du jardekoj. Vidu, mia panjo estas neeltenebla, se temas pri ordigado. Ŝi estas tiom sociema, ke preskaŭ neniam estas hejme. Nun, ke ŝi estas emeritulo, ŝi eĉ malpli hejmas.

– Tiom da eventoj okazas! Kvar samtempe! Kiun mi elektu? Se mi iras al tiu ĉi, mi ankoraŭ povas iri vespere al la alia, kaj malfruiĝante, sed tamen al la tria ankaŭ. Nur por la duono, sed tamen, eblas! Ili estas tiom interesaj, prelegoj, ludo, klubkunveno, teniso. Kial ili okazas ĉiam samtempe? Tiel, mi ne povas ĉion partopreni. – Kaj poste, la sekva tago same havas tri interesajn paralelajn renkontiĝojn.

Sed nun, ŝi devas resti hejme. Kion ŝi kompreneble ne volas akcepti komence. Ŝi sentas tiel, ke estas kvazaŭ iu persona puno. La registaro ne volas, ke ŝi havu socian vivon. – Ha, mi ne timas la viruson, estas nur vi, kiu panikas! Mi iras al miaj amikoj! – Kaj ŝi estas for.

Ĝis kiam ĉiu evento ne estas nuligita, ŝi simple ne restas hejme. Ŝi riproĉas daŭre: ili timas. Ili ne volas renkontiĝi.

– Mi ne komprenas. Preskaŭ ne estas malsanuloj. Pro tiuj kelkdek homoj? Ĝi estas kiel la gripo. Eble iom malpli bone, sed tamen! Kaj tiu

masko, ha, tiom ĝene estas surhavi ĝin. Mi aŭdis, ke ĉiukaze ĝi protektas kontraŭ nenio. – kaj rigardas min kvazaŭ ĉiu freneziĝintus ĉirkaŭ ŝi. Ĉefe mi, ŝia kara filino, kiu volas haltigi ŝin eliri la domon.

Iom post iom, ŝi devas resti hejme, ĉar efektive neniu renkontiĝo okazas plu. Unu post la alia, ili estas nuligitaj. Ŝi tre malfacile akceptas, ke oni ne plu rajtas renkontiĝi en grupoj dum iom da tempo.

Sed ŝi devas moviĝi ien. Do, kompreneble, tiam ĉiutage ŝi devas iri aĉetumi ion. Mi bezonas lakton! Ne estas freŝaj bulkoj! La kato bezonas novan sablon. Ĉu ne *vi* diris, ke elĉerpiĝis la butero? Mia plej ŝatata trinkaĵo estas en la alia vendejo, ne en tiu ĉi proksima.

– Ha, tiu tempolimigo por la maljunuloj estas tiom ĝena, mi ne volas vekigi kaj ekiri tiom frue! Kvazaŭ maljunuloj ne havus vivon, kaj ili volus iri aĉetumi nur matene. Kio pri mi?!

La vendejoj estas malfermitaj inter la 9-a kaj 12-a speciale por la maljunula kategorio.

– Freneze, mi ne estas maljuna! Estas neniu en la vendejo tiam! Pasintfoje, estis nur kvar homoj!

– Ĉu vi ne ŝatas trankvile aĉetumi? – demandas mi. – Ĉu vi scias, ke kiam mi iras, ĉiu estas en la vendejo, ĉar ni atendas, ke vi trankvile aĉetumu en malplena vendejo... Mi envias vin. Vi havas la tutan spaccon por vi!

– Mi havas aliajn aferojn por fari matene, mi devas unue trinki kafon, poste legi miajn tagĵurnalojn, nur poste matenmanĝi kaj doni manĝi al la kato. Mi apenaŭ povas alveni ĉirkaŭ la 11-a kaj duono, kaj poste ne restas tempo aĉetumi, oni jam forsendas nin tagmeze!

– Do jes, ĉiu atendas vin, kaj provas protekti vin, ke vi ne malsaniĝu.

– Sed mi ne malsaniĝos!!!

– Jes, pro tiuj afablaj homoj, kiuj protektas vin, espereble ne. – Mi rigardas ŝin vere ĝenite.

– Kaj tiu masko, mi vere ne ŝatas ĝin, ĝi estas terure malkomforta.

– Jes, prefere tio, ol la malsanulejo. – Mi komencas perdi mian paciencon aŭskultante ŝiajn plendojn...

– Sed mi ne malsaniĝos!!! Nur vi panikas, kaj la aliaj. Mi ne. – daŭre rigardas min nekompreneble, kial mi faras tiom grandan zorgon pri eta gripo.

Alifoje ŝi fanfaronas, ke malgraŭ la specialaj malfermtempoj, la masko helpis kaŝi kiom maljuna ŝi estas, kaj povis eniri la vendejon sen esti rimarkita. Tiel ribelas emerituloj dum la pandemio... konstatas mi.

Tamen mi sekrete tre ĝojas, ke malgraŭ la aĉetumado, ŝi devas resti hejme relative multe da tempo kaj sidi sur sia pugo trankvile. Aŭ fakte, do estas devigite fari ion, se ŝi ne volas freneziĝi... Kaj tiam mi sentas, ke mia tempo alvenis sugesti, ke ni finfine ordigu la loĝejon. La librojn. La problemo estas ĉiam la nekredebla kvanto da libroj, kiujn mia avino, avo, poste patrino akumulis dum la jaroj. Antaŭ 3–4 jardekoj libroj estis malmultkostaj, kaj ofte ni havas 2–3 el la sama eldono, ĉar pluraj aĉetis la samon en la familio. Ili estas sur bretoj, en kestoj, kie teorie devus esti littolaĵoj, en la subo de la enkonstruitaj ŝrankoj, en aliaj skatoloj kaj ĉie, kie estas loko. Vere terure. Nur laŭ mi, kompreneble, ĉar panjon ne ĝenas la afero.

– Kompreneble via ĉambro estas bele ordigita, ĉion, kion vi ne bezonas, vi portas al tiu ĉi ĉambro! – ŝi diras konvinkante sin mem.

– Bela provo, panjo, sed ne. Mia ĉambro enordas, ĉar mi estas kruela kun miaj aĵoj. Mi daŭre elektas, selektas, fordonacas, eligas. Do la ordo restas – diras mi kun fiero en mia voĉo.

Mi ŝatas havi metodon kaj volas ekatiki la loĝejon strategie, do, mi proponas, ke ni faru laŭ la KonMari-metodo. Unue per la vestaĵoj, kaj nur poste daŭrigi per la libroj.

Vidu, mia plano estas preta. Estas nun marto. Ĝis septembro kiam venas la granda forĵetado de aferoj surstraten en Budapeŝto, mi povos esti preta forigi ĉion ne bezonatan el la domo. Mi ekscitiĝas pri la ideo kaj samtempe tuj laciĝas, ĉar mi scias, kian laboregon ofertas tiu 42 kvadratmetra loĝejo kun siaj plurcent libroj kaj aĵoj, kiuj estas malnovaj, toleritaj kaj neuzataj.

Mi ofte ŝercas pri tio: ĉu ni vivas en iu malorda muzeo? Ne tuŝu! Ne forĵetu! Tion ni gardas! Tio estas memoro! Bone, panjo, ni gardu por nia muzeo, ja estas tiom da loko ĉi tie por vivi.

Sed venas la tago, kiam post multege da “Ne hodiaŭ, mi havas alian aferon por fari.”, ni ekkomencas. Kiam ni finas la unuan breton, mi pensas: uf, mi festu tiun grandan atingon de la unua ordiga tago, ĉar eble poste neniam okazos la sekva. Sed je mia surprizo, post kelktaga

ripozado, ni rekomencas. Aliaj du bretoj iĝas puraj, ordigitaj, selektitaj, senpolvaj. Paŭzo. Ek. Ripozado. Ek.

Ni daŭrigas laŭ tre preciza sistemo, kaj verdire, ne multe da libroj devas esti fordonacitaj, ĉar ni komencas per la Esperanta sekcio. Mi eĉ ne unu legis el ili. Sed la titolojn mi konas tre bone, ĉar la bretoj estas super la televidilo, kiun mi rigardis dum horoj kiel infano.

Ni alvenas al la punkto, kiam panjo subite pri plenaj bretoj diras: ne, ne, ne, jam legis, neniam legos tion denove, tiu ĉi estas elstara, sed terure trista, ĉu vi ne havas amikon, kiu studas la rusan nun? Ne, ne, ne, for, tiuj estas ankoraŭ de miaj studoj, neniam relegos ĝin kaj plej verŝajne nek vin interesos. Ĝis subite ŝi deklaras:

– HA! TIUN LIBRON VI NEPRE DEVAS LEGI! La ĉefrolulo estas tre brava virino, ĝi estas krimhistorio, sed vera, tra multaj landoj, kaj vi povas lerni pri politiko, diplomatio kaj historio de Francio ĝis Svedio! Tio tre plaĉus al vi! Vi vere nepre devas legi ĝin.

Hm, interese. Mi subite ekkonscias, ke parte *tio* ĝenis min dum la jaroj. Ne aparte la kvanto de la libroj, ne nur tio ke ili estas malbone ordigitaj, sed la fakto ke mi tute ne sciis, kiuj vere gravis por panjo, kiun ŝi vere rekomendus kaj kiujn tute ne. Ili ĉiuj aspektis same. Do ankaŭ pro tio mi decidis legi nenion el inter ili. Mi elektis librojn alie, neniam vere ĉirkaŭrigardis hejme, krom la hazardaj 3–4, kiujn mi iam prenis de ajna breto en speciale inspirita momento antaŭ jardeko.

Sed nun, finfine, ni ne nur ordigas, sed ŝi ankaŭ rakontas: eĉ pri tiuj, kiujn ŝi fine ne gardas. Nur ŝi diras pri ili, kial ili gravis en iu momento en ŝia vivo, kaj nun ne plu. Ja tio estas la esenco de la KonMari-metodo. Kio alportas ĝojon nun? Kion oni bezonas *nun* por sia vivo, por esti feliĉa?

Ŝi fordonacas serion, kiun ŝi tiom volis havi kiel juna edzino: la tutan serion de Ĉeĥov, ŝi simple kuraĝas diri ne al libroj, kiujn ŝi ne plu volas gardi, ĉar ili jam ne plu gravas. Ŝi diras:

– Ekde nun, mi volas legi nur agrablajn librojn!

Kelkajn vortojn, kiuj forlasas ŝian buŝon, mi verdire apenaŭ povas kredi. Ĉu tiu estas mia panjo? Kiu kredis, ke forigi librojn el la loĝejo estas blafemo? Kiu estis alkroĉita eĉ al la plej negrava papero, ĉar ni devas gardi ĝin. Sed nun. Povas esti, ke ĉar ŝi estas tiom multe hejme, ŝi rimarkas, ke eble ne estus maloportune vivi en iom pli ordigita spaco.

Eĉ havas helpon por fari tiun laboron. La tuta afero ŝajne tamen ne estis tiom malbona ideo. Malgraŭ tio, ke ne venis de ŝi.

Ni daŭrigas, kaj daŭrigas kaj, je unu momento, alvenas la tempo kiam ni povas reordigi la librojn, kiuj restas.

– Ne remetu tien tuj! Vi eĉ ne scias, kiel vi volas ordigi ilin. La ideo estas repensi la aferon! – krias kaj ĝeniĝas mi, ĉar mi vidas, ke ŝi senatente komencas pakadi, ĉar ŝi tiomege volas, ke ni jam finu.

Ni estas plurajn semajnojn post la komenco, jam en majo, kiam ĝustatempe *IKEA* remalfermiĝas, kaj mi iras aĉeti novajn bretojn por la bretaro, kiun mia avo konstruis kun mia patro en 1993 antaŭ ol mi komencis mian unuan jaron en la lernejo. Por ambaŭ, tiu estis la lasta somero de iliaj vivoj. Mia fratino kaj mi bezonis spacon por povi lerni, do tiu nova bretaro bezonatis. Feliĉe, ke oni daŭre produktas tiujn bretojn, ili estas la plej bazaj de la elekto. Praktikaj, simplaj, multifunkciaj kaj plej grave por mi: daŭre aĉeteblaj.

Nun, dudek sep jarojn poste, mi staras pacience en la vico ekster *IKEA*. Estas varme, la vetero bonas. Oni enlasas tre atenteme kaj malmulte da homoj samtempe. Mi ĝuas observi la aĉetantojn, kiuj ne kapablas trankvile atendi. Kelkaj laŭte plendas al siaj partneroj, aliaj senĉese rigardas siajn telefonojn, nur mi spiras profunde sub mia masko kaj ridetas pensante, ke kapitalismo ne atendas: homoj volas elspezi monon kaj senti tiel, ke estas iu normaleco. Se mi ne devus esti tie, mi certe ne atakus la vendejeron fervore. Kvankam povas esti, ke ankaŭ la aliaj envicantoj finfine ordigis siajn hejmojn, kaj nun bezonas kelkajn aferojn por perfektigi sian laboron. Mi eniras, prenas la plej rapidan vojon al la kvar bretoj, kiujn mi bezonas, kaj la planton, kiun mi kompreneble ne bezonas, kaj eliras relative rapide (post dudek minutoj, imagu!) kun multe da ĝojo en mia koro, ke restas malmulte por fari.

Hejme, purigante kaj remetante la malnovajn bretojn, la novaj aspektas iom strange: ili estas tre puraj kaj iom alikoloraj, tamen estas pretaj por trovi sian lokon en la sistemo. Mi unue fuŝe metas la plej supran kaj (kompare al ĝi) denove malbone la suban. Io ne aspektas bone, sed panjo diras nenion. Estas vespero, kaj mi lacas. Kiam mi finfine rimarkas la problemon: ĉiuj libroj jam peze sidas iom klinite. Bone, morgaŭ mi komencos per reordigado.

Panjo kiel militĉefo decidas kaj donas la ordonojn, kion kaj kien mi metu; mi aldonas breton, kaj ni reordigas la librojn. Restas ĉio rilate al vojaĝado, la amuzaj libroj, la plej ŝatataj el sia infanaĝo, tiuj, kiuj bonas por lerni lingvojn, la nunaj plej ŝatataj, mi ankaŭ ekscias, kiuj verkistoj estas la plej bonaj, kaj fine, sube, la plej nova breto pretas por ĉiuj tagĵurnaloj. Ili sidas malantaŭ la seĝo, kie ŝi ĉiutage relegas precize, kio okazis la antaŭan jaron, la antaŭ-antaŭan jaron, reirante en la tempo ĝis 2010: deklarante, ho, tio okazis! Vidu, kiom da aferoj mi faris, kiam mi ne devis resti hejme!

Mi scias, ke la nova breto kun la ĵurnaloj – facile atingebla, ne okupanta per sia turo la mallarĝan fenestrojlon – tre plaĉas al ŝi. Ankaŭ la sento, ke aferoj estas ordigitaj, la spaco sentiĝas pli hele, malpeze. Estas loko por la plantoj, kaj ĉio radias iusencan pacan sferon. Ne, ŝi neniam konfesus, ke tiu ordigado estis bona ideo.

Mi nur rimarkas tiun rideton ĉiumatene, kiam ŝi fiere repakas la libretojn post la legado, antaŭ ol ŝi komencas plendi pri tio, ke baldaŭ fermiĝos la vendejoj denove. Ja estas preskaŭ tagmezo kaj mankas lakto por la morgaŭa matenmanĝo.

Eksterordinaraj tempoj, aŭ Tri promenoj de filino kaj patrino

de Ileana Teterewa

Moldavio

Mateno

– Ĉu vi ankoraŭ ne estas en la necesejo?!

Tiun ĉi demandon, en kiu, se estus necese, oni povus klare aŭskulti intonaciojn de emerita instruistino, Marina direktis al ekzistaĵo, antaŭlonge enskribita en la paĝon de infanoj en ŝia pasporto – kaj en ŝian koron – kiel filino Tamara.

Tamara eĉ ne deturnis la rigardon de la komputilo-ekrano, antaŭ kiu ŝi staris, apoginte unu manon sur la tablo, nur la kurba dorso streĉetis, kaj ŝi respondis nevolonte:

– Vifio ne konektiĝas.

– Ĉu vi vere bezonas vifion tie?

– Mi bezonas iam vivi – malpaceme respondis Tamara, movante la muson.

– Kaj vi malbone vivas, ĉu? – suspire demandis Marina.

– Tr-ro bone! – Elrektiĝinte kaj finfine turninte al la patrino la vizaĝon, malgrandan, rondan kaj obstinan, kiel spitsigno, Tamara diris: – La komputilo liberas – prenis la poŝtelefonon, kuŝantan apud la nigraj kornetoj de la enkursigilo, kaj ekpaŝis al la pordo de la ĉambro.

Post preskaŭ horo, ŝi eliris el la banĉambro kaj, eĉ ne rigardinte la vestaĵojn, kiujn Marina metis sur ŝian liton, iris reen en la komputilĉambron – tie ŝi konektis la telefonon al la komputilo por ŝarĝado kaj sidiĝis.

– Jam estas malfrue! – memorigis al ŝi Marina.

– Mi scias... Sed mi ja devas sekiĝi. Librotenistino al mi diris – nu, ĉu vi memoras, kiel ŝi telefonis, kiam mi estis duŝanta min, kaj mi tuj venis? – ke mi ne devas eliri tuj post la duŝo.

– Vi ja ne iros al la librotenistino hodiaŭ – mallaŭte diris Marina kaj eliris la ĉambron. Tamara graŭletis, sed restariĝis kaj trenis sin en sian ĉambron. Ĝuste tie, ŝin trovis Marina, kiam ŝi mem finis vesti sin. Tamara estis kombanta sin – mallerte, per longaj sendirektaj tirantaj movoj – kaj la subo de ŝia svetero estis enigita en la jupon – kvankam Marina ne estis lasinta por ŝi zonon, ĉiam portatan en tiaj okazoj, kaj kvankam tiu ĉi jupo kaj tiu ĉi svetero neniam estis portita ĉi-maniere.

– Nu kion vi faraĉas! – ekkriis Marina, elŝirante la kombilon el ŝia mano. – Kombilon ja oni tenas tute alie!

– Kaj kia estas la diferenco? – skeptike demandis Tamara, rigardante ilin en la spegulo. – Kion mi faris malĝuste?

– Mi ne povas tion klarigi... Iel... – Marina movis la kombilon. – Mi eĉ ripeti tion ne povas. Iel terure. – Ekzameninte samokaze la hararon, ŝi demandis: – Ili ankoraŭ estas tute puraj, kaj la aranĝo aspektas bele. Ĉu ni eble lavu ilin ne hodiaŭ, sed marde?

– Vi decidu, kiam lavi viajn harojn – ŝultrumis Tamara, dum Marina, fininte kombi, eljupigis ŝian sveteron.

– Ĉio estas via.

– Se ili estus miaj – venĝeme diris Tamara – mi tuj ilin tondigus ĝiskalve...

– Mi ne volas ĉi tion aŭdi! Vi ne povas ne diri ian aĉaĵon – ne elteninte, interrompis Marina, kaj Tamara paŭte eksilentis, sed ne por longe. Baldaŭ ŝi demandis:

– Ĉu mi povas ne ŝminki min hodiaŭ? Ni ja ne en multhomaj lokoj promenos...

– Ne elpensu – respondis Marina, kaj Tamara kolere, sed obeeme elkestigis lipruĝigilon kaj korektilon.

Ankoraŭ dek malrapidaj minutoj, kaj ambaŭ, plene vestitaj, staris antaŭ la granda spegulo en la koridoro.

– Jen kia bela knabino – diris Marina, liginte la zonon de la filina palteto.

– Mi vidas nenian knabinon – ne detenis sin Tamara de ankoraŭ unu “aĉaĵo” – des pli belan. Nur maljunetan malbelan inegon.

– Bela – pacience ripetis Marina – kaj juna. Nur se via vizaĝeto pli ofte estus ridetema...

Tamara faris eĉ pli makabran mienon, kaj ili eliris. La patrino malleĝis per lifto, la filino uzis la ŝtuparon.

Inter la tria kaj dua etaĝoj, Tamara aŭdis ian bruon de malsupre kaj haltis, streĉe aŭskultante ies obtuzajn voĉojn, paŝojn kaj ridojn. La lifto malfermiĝis en la unua etaĝo, la bruo plifortiĝis. Sub la fenestro, ĉe kiu staris Tamara, montriĝis la patrino, haltis, atende rigardante la dompordon. Finfine la lifto fermiĝis kaj zume ekmoviĝis supren, la voĉoj silentiĝis, kaj Tamara malsuprenpaŝis plu.

– Kial vi tiel longe iris – demandis Marina, kiam ŝi eliris – ĉu ree fotadis araneetojn?

Tamara kapneis:

– Tie estis homoj.

– Do, ĉu vi... ĉu vi kaŝis vin de ili?

Tamara ne respondis.

– Ridinda. Homoj vin ne mordos – diris Marina. – Nu, ni iru.

Sed iris sen incidentoj ili nur ĝis la apuda stratkruco, kie Tamara, vidinte virinon, irantan renkonte al ili direkte al la sama pasejo, kiun ili jam proksimiĝis, klinis la kapon, kvazaŭ ŝin iu tiris je alligita al la nazo ŝnuro, post paŝo ĝin ree levetis kaj krucis la straton kun deturnitaj de la virino okuloj – ĉio malgraŭ du aŭ tri kaŝaj pugnopuŝoj kaj manikektiroj de la patrino, penanta interrompi tiujn ĉi agojn. Samtempe Marina kun ĉia ebla afableco deziris bonan tagon al la virino, tiu resalutis. Tamara finfine intermetis mallaŭtan kaj posttempan “Saluton!” kaj ili preteris sin reciproke. Tiam Marina ekflustris, arde kaj dolore:

– Tio ĉi estas terura! Ĉu vere estas tiel malfacile simple diri saluton? Kaj ne klini la kapon – kiu, nu kiu al vi tion lernigis? Neniu tiel faras...

– Mi ja ne estis certa, ĉu ŝi estas konato – provis ion ekspliki Tamara.

– Kaj por kiu, bonvolu diri, povas esti plezure rigardi viajn... riverencojn? Ĉu ŝi vin konus, ĉu ne konus... Ne, mi estas terurita, mi simple estas terurita...

– Vi konas min proksimume kvardek jarojn – bruske respondis Tamara. – Ĉu ne estas tempo ĉesi teruriĝi ĉiun fojon, kiam vi vidas, ke mi estas mi?

Sed Marina daŭre lamentis, mallaŭte, kondamnite, dum ili kunpaŝis brako en brako laŭ la vintra strato.

Tagmezo

Ili kunpaŝis brako en brako laŭ la printempa strato. Tamara estis argumentanta, ke ili ege bezonas desinfektaĵon aldone al ŝprucigado antaŭ vendejoj – por uzi ĝin post kiam ili malfermas la pordojn, aŭ deponas monon per terminalo, aŭ veturas en la aŭto. Marina firme respondadis, ke ŝi neniam aĉetos ion tiom multekostan kaj tiom senutilan, kaj ke se Tamara tiel bezonas plian ŝprucon, ŝi povas peti pri tio la ulojn starantajn antaŭ vendejoj (sed peti mem, ĉar bezonas tion ŝi), tamen ŝia plej nekontestebla, kvankam nevoĉigita argumento estis la fakto, ke la mono estis en ŝia saketo. Tial simpla “ne tedaĉu” sufiĉis por silentigi la filinon. Tiu paŭtis, sed rezignaciis.

Dume, ili estis atingintaj la superbazon.

– Nu, staretu ie ĉi tie – diris Marina, direktante sin al la vosto de la atendovico.

– Ĉu vi ne volas, ke mi kuniru, aŭ iru sola?

– Ne, mi ne volas tiri vin tien. Kaj vi ne sukcesos elekti cepojn. Ankaŭ la maskoj – estas pli facile aĉeti ilin mem ol klarigi al vi, kie ili vendiĝas.

– Ilin vi povus aĉeti antaŭe.

– Mi ne sciis, ke vi ilin tiel postulos.

– Tion ne mi postulas.

Marina ne respondis, surmetante bluetan ĥirurgan maskon. Tamara estis rigardanta ŝin malaprobe, poste demandis:

– Mi ja ĝuste vin komprenas, vi aĉetos reuzeblan, ne tian ĉi?

– Ĝuste, ĝuste. Tiaj ĉi vendiĝas en apotekoj. Neniam plu mi ankoraufoje aĉetos tian ĉi, vi sufiĉe min elturmentis, kiam vi rifuzadis ilin porti.

– Mi ne rifuzadis ilin porti, mi nur rifuzadis ilin porti multfoje. Tio estas nenio, pli malbone ol nenio, vi ja devas kompreni...

– Jes, ĝuste per tio, vi min elturmentis. – Marina subridis. – Vi ricevos reuzeblan maskon.

– Kaj vi...

– Kaj ankaŭ mi.

– Blankan aŭ nigran?
– Ili estas blankaj.
– Ili estas ĉiaj.
– Normalaj estas nur blankaj. Mi ne volas tian, similan al lupa muzelo. Nu, mi devas enviciĝi.

Tamara kapjesis, deiris al la muro, samtempe enoreligante unu aŭskultilon, kaj stariĝis tie kun sia poŝtelefono en la manoj.

– Jen viaj maskoj – Marina tuŝis ŝian brakon, revenigante ŝin en la realan mondon, kaj montris saketon kun io blanka ene.

– Ĉu ili estas jam surmeteblaj? – demandis Tamara. – Ĉu ne endas ilin lavi aŭ ĝladi?

– Jes, ili ja estas en paketo.

– Mi surmetu.

– Ne, poste, antaŭ la oficejo.

Tamara malkontente ŝultrolevis, kapitulacante. Ili ekiris pluen.

– La ulo, kiu mezuras temperaturon, tuŝis mian kolon per la termometro – plendis Marina. – Kaj ĝuste antaŭ mi, iris junulo, mi aŭdis, ke lia temperaturo estis tridek sep kaj unu dekono. Kaj oni tutegale lin enlasis... kaj tuj tuŝis min per la sama termometro.

Tamara vespiris, sed ne respondis.

– Nu, jam eblas ĝin surmeti – diris Marina. – Mi nodu.

– Vi, memkompreneble. Ja viaj manoj estas surŝprucigitaj, ne miaj. Kvankam... vi ja tuŝis la monujon post tio – Tamara denove vespiris. Marina, malatente aŭskultante ŝin, elprenis unu maskon kaj surmetis sur ŝin, ligis sur la nuko; turninte la filinon al si, rigardis la vizaĝon, de kiu restis nur mornaj bluringaj okuloj.

– Se nur iu krom vi maskon portus... Nu, iru. Kiel ni interkonsentis: se oni vin retenos, eliru por momento kaj signalu, ke mi foriru sola.

– Jes, jes...

La neatendita de Tamara maljunulino, sidanta ĉe la pordo, fermetis la okulojn, penante rekoni la veninton, kiu, faliginte ombrelon kaj preminte la sakon inter la genuoj, haste elmetis la manojn.

– Ĉernova – kompreninte la obstaklon, diris Tamara. – Nu, programisto.

Enlasite, ŝi iris laŭ la koridoro, enrigardante en la kabinetojn.

– Ho, Tamara! – La maljuneta personaristino alvokis ŝin geste kaj stariĝis, vakigante la seĝon. – Krom la raporto estas io – dokumento ne registriĝas.

– Neunika numero denove? – Tamara sidiĝis ĉe la komputilon, kutime malfermis tabelon. – Vi povus telefoni, mi tuj ĝustigus. La raporton ĉu printi antaŭ sendo?

– Jes, kara. Parenteze, ĉu vi aŭdis ion pri la defora laboro? – demandis la personaristino. – Ĉu al ni tio minacas?

– Mi nenion aŭdis... Sed, miakomprene, minacas al ni ĝia malesto. Tia programo, kiun mi uzas, senpage funkcias nur dek kvin horojn monate aŭ ĉirkaŭe – por mi, tio sufiĉas, sed por iu ajn alia... Kaj dubinde, ke la estraro por ĝi pagos.

– Ĝuste – suspiris la personaristino kaj, vidinte iun en la koridoro, iris el la kabineto. – Mi tuj revenos, ne foriru.

Tamara senhelpe sekvis ŝin per rigardo, sed la laboro estis finota nur post minuto. Kaj post minuto, la virino ankoraŭ ne revenis. Tamara atendis, tamburante sur la tablo per la ruĝiĝintaj, ofte lavataj manoj. En la angulo balbutis la radiatoricevilo – iu elsendaĵo pri la nova viruso. Ŝi distriĝeme aŭskultis.

Ŝi aŭskultis konsilojn kaj insistajn petojn surporti maskon, longe lavi la manojn, teni sin kiel eble malproksime de homoj, saluti per kapklino. Ŝi aŭskultis, kiel homoj komunikiĝas nur interrete kaj aranĝas hararon tiel, ke ĝi ne tuŝu la vizaĝon. Ŝi aŭskultis...

– Ĉu vi konsciencan havas? – riproĉis Marina, kiam Tamara finfine eliris.

– Ne – respondis tiu senzorge.

– Demetu la maskon.

– Ne – kapneis Tamara. Ŝia rideto ne estis videbla, sed la bluringaj okuloj brilis unuafoje en longa tempo.

Vespero

– Demetu la maskon.

– Ne – Tamara forŝvingis nubeton de dancantaj kuloj kaj celis per la fotilo brulnigriĝintan arbon.

– Ni eliris por spiri freŝan aeron.

– Mi spiras freŝan.

La pado turnis sin de la digo al la urbo. Ĝi estis malplena, nur maloftaj biciklistoj devancadis ilin. En la arbareto kriadis ia birdo.

– Demetu ĝin, estas sufoke.

– Kion malbonan faris al vi ĉi-tieaj homoj? – eksklamaciis Tamara.

– Estas ja neniu.

– Nur ĝis la urbo.

– Sed almenaŭ antaŭ la domo, vi ĝin demetos? – kun malforta espero demandis Marina.

– Kion malbonan al vi faris la najbaroj?

– Mi komprenus, se vi timus infektiĝi mem...

– Mi timas infektiĝi kaj infekti vin. Kaj mi ankaŭ timas infekti iun.

– Vi estas sana.

– Unue, vi ne povas tion scii. Due, mi ja havas nazkataron.

– Kiu ne estas kronviruso.

– Ankaŭ ĝi povas mortigi, se iu infektiĝos je ĝi kaj estos metita en kronvirusan malsanulejon pro tio.

– Kun mi, hejme, vi ĉiaokaze estas sen masko. Do, min vi ne timas “mortigi”, ĉu?

– Ĉu vi permesus surporti ĝin hejme? – tra la dentoj demandis Tamara.

– Ho, ne!

– Do, mi faras kion mi povas – diris ŝi samtiel streĉe.

– Demetu la maskon – insistis Marina. – Havu iom da aero! Tiel bona estas la aero!

– Mi ne demetos.

– Demetu – Marina alproksimiĝis kaj garde ektiris la ligilojn. – Nu?

– Ne-e!

– Demetu – mallaŭte, tenere kaj firme diris Marina, forigante la maskon kaj elsakigante kombilon. – Jen kiel bone. – Ame, ŝi kombetis ŝin kaj rigardis la prilumitan de subiranta suno palan, neŝminkitan, humidan de ŝvito kaj tralikiĝinta nazmuko vizaĝon, misformitan, kva-zaŭ la fingroj de spitgesto malplektiĝis kaj pendiĝis senforte. – Kia bela knabino.

Dum pandemio, verka renkontiĝo kun miaj gepatroj

de Zdravka Metz

Kanado

Antaŭ tridek ok jaroj, mi translokiĝis de Kroatio al Kanado, provinco Kebekio. Post longa loĝado en Montrealo, mi vivas nuntempe kaj lastajn kvin jarojn en Granbeo. Kiam eblis, mi vizitis Kroation, gepatrojn, fratinojn, nian domon; kun miaj infanoj, kvarope familie aŭ mi sola.

Pasintan jaron mi alvenis en printempo, ĉar mi gvidis grupeton de amikoj dum du semajnoj, vizitante interesajn lokojn por birdo-observado. Post la vojaĝo tra Kroatio la geamikoj reiris Kanaden kaj mi restis pasigi tempon ĝis la somero, atendante familiojn de miaj gefiloj en julio. Mi ĝuis kun ili dusemajnan ripozon, sunumadon, banadon ĉe adriatika maro.

Mia patrino mortis antaŭ multaj jaroj; post dudek ses jaroj, ankaŭ mia patro. Ekde tiam, kiam mi alvenas la gepatran domon, ĉiam estas io por ordigi, donaci, post pli ol duonjarcenta vivo sub la sama tegmento. Miaj gepatroj, kiuj travivis la duan mondmiliton, ekkunvivis en tempo de manko de la plej diversaj aĵoj. Kaj nature, kiel multaj aliaj personoj de tiu generacio, anstataŭ fordoni, ili stokis neuzitajn malnovaĵojn. Ili ĉiam pensis: *iam utilis* – vitraj boteloj, malnovaj gazetoj, revuoj, fakaj libroj, neuzataj mebloj, multaj malnovaĵoj. Gardi en la kelo aŭ sub la tegmento signifis eventuale doni al iu, kiu bezonos. Sed tio ne okazis. Certe, nun estas mia tasko: fordoni, malplenigi spacon. Tio estas la unua paŝo, unua preparo de la domo por vendi ĝin, kompreneble kiam montriĝos tia ebleco.

Dum ĉi tiu longa restado pasintjare, mi havis tempon prizorgi la domon, la ĝardenon kaj iom post iom daŭrigi laboron de antaŭaj jaroj. Nun estis la vico ordigi dormĉambrojn kaj ankoraŭ uzatajn meblojn.

Mi komencis malfermadi tirkestojn. En unu, mi trovis leterojn de miaj gepatroj. Mi komencis legi. Ne temis pri amleteroj. Estis komence de majo, jaro 1948. Miaj gepatroj konatiĝis en 1946, kiam mia patro venis labori en tiu agrikultura regiono ĉirkaŭ la urbo Vinkovci, kie vivis mia patrino. Ho, la unua letero havas daton ĵus antaŭ ilia geedziĝo. Ŝi parolas pri ĝi. Mi ne sciis pri tiu familia “trezoro”, kiu priskribas la vivon antaŭ mia naskiĝo.

Mi komencis legi leterojn unu post la alia. Estis interesa enhavo, priskribo de la vivo en tiu fora jaro, la jaro post la dua mondmilito, kaj la jaro, kiam geografiaj mapoj jam havis ŝanĝitajn landlimojn, nomojn de ŝtatoj kaj respublikoj. Eĉ pli grave, ŝanĝiĝis la ekonomia sistemo. En la jaro 1945, la kapitalisman sistemon anstataŭigis komunisma sistemo, kiun oni fakte nomis *socialisma* sistemo. Longe privataj posedaĵoj komencis aparteni al tiuj homoj, kiuj laboris en iu fabriko, iu entrepreno, iu agrikultura kooperativo. Tamen ofte, aparte la ĉefoj, la estroj, ne havis edukadon, konon por gvidi entreprenojn, sed jes, ili estis membroj de la komunisma partio, kiu kontrolis tiele ĉion. La rezulto estis manko de la plej bazaj bezonaĵoj. Kiam oni komencas vivi pare kaj oni bezonas ĉion, de teleroj kaj manĝilaroj ĝis mebloj kaj hakilo por ligno por prepari fajron. Tiel en siaj leteroj, la gepatroj interkonsentadas, rakontas, kiu sukcesis aĉeti kion per karto kun tiel nomataj punktetoj, kiujn oni ricevadis monate por ĉiu membro de la familio. Per tiaj punktetoj oni povis aĉeti certan kvanton da faruno, sukero, graso porka aŭ oleo, foje unu aŭ du metrojn da iu tolaĵo. Tiuj leteroj kvazaŭ montris al mi la “vizaĝon” de la vivo en tiu postmilita tempo. Mi povis imagi bildon, la manieron kiel ili prizorgadis tagajn, semajnajn bezonojn.

Ĉio ŝajnis al mi tre interesa kaj ekscita, kvazaŭ mi estis leganta historian romanon, kies ĉefrolantojn mi bone konas kaj ties manskribon mi tre facile legas. Post kelkaj tiaj leteroj, kiuj rakontas pri la vivo antaŭ mia naskiĝo, ŝajnis al mi, ke tio povus interesi aliulon. Mi estis sola endome. Mi volis dividi tiujn familiajn informojn kun miaj du fratinoj, rakonti al miaj infanoj, al la genepoj. En mia kapo ekaperis ideo, deziro transskribi tiujn leterojn. Ili estos pli facile legeblaj.

Mi pensis pri mia patrino, kiu naskiĝis en 1920. La sekvan jaron, estos cent jarojn post ŝia naskiĝo. Kial ne prepari libron pri mia patrino

por la sekvonta jaro? Pri mia patro mi preparis memorlibron por lia naŭdeka naskiĝtago. Kial ne fari ion pri mia patrino?

Dum mi pensis pri la ideo, entuziasmo kreskis. Sed tiam, mi memoris, ke mi estos okupata en la sekva jaro pro la Universala Kongreso en Montrealo. Jes, mi konsciis, ke mi ne havos eblecon eki la projekton antaŭ kaj dum la kongreso, sed nur en septembro, kiam estus la naskiĝtago de mia patrino. Tiam mi povus komenci. Mi tuj enpakis ĉiujn leterojn, lerneajn diplomojn de mia patrino, fotojn de ŝi, geedziĝdokumentojn de ŝia patro kaj de ŝi, kion mi trovis samloke. Ĉio tio vojaĝos kun mi, kaj samtempe tiu tirkesto restos malplena. Mi estis kontenta.

Ĉi-printempe, en marto 2020, mi finis prepari libron de rakontoj en Esperanto, kaj sendis ĝin al presejo. La saman vesperon, dum la novaĵbulteno, oni anoncis, ke ekde morgaŭ, ĉio ĉesos funkcii kaj preskaŭ ĉiuj ĉesos labori, iri al lernejo. Fermiĝos restoracioj, sportejoj, teatroj, koncertejoj. Oni ordonis, ke ĉiuj restu hejme. Ĉio tio, pro kovimo, la viruso kiu jam montris sian mortigan forton en Azio, en Eŭropo, kaj nun atingis Nordamerikon.

La oftaj, preskaŭ tuttagaj, novaĵoj ekparolis ĉefe pri unu temo, kiu timigadis, malgajigadis, malesperigadis. Ĉiutage ekmortadis maljunuloj en maljunulejoj. Kvazaŭ la itala sperto proksimiĝis al ni, kaj nun ĝi ripetiĝas ĉe ni. Post kelkaj tagoj la homoj sentis sin kaptitaj endome, ploremaj, nenifarantaj. Ili rigardis preskaŭ tuttage nur unu “fenestron de la domo”, la televidon kaj timigajn novaĵojn.

Kelkaj geamikoj, fermitaj en siaj domoj, ekparolis telefone pri malagrablaj sentoj, pri deprimoj, kiu ekpezas al ili.

Kion mi faru en nia domo? Kiel pasigi la tempon, ke la tagoj, semajnoj pasu pli rapide, pli interese?

Mi memoris la alportitajn leterojn de miaj gepatroj, kiuj restis en mia valizo. Kial ne preni ilin kaj komenci realigi la pasintjaran deziron? Oni jam sciis, ke la kongreso ne okazos. Do, mi prenu tempon por tiu projekto – transskribi leterojn de miaj gepatroj – kaj mi eksciui pri ilia vivo.

Mi rapidis kelen, elprenis la leterojn el la valizo, kaj sidiĝis ĉe komputilo. Mi komencis transskribadon de la leteroj, unu post la alia, ĉiam kun la dato. Ĉiutage, la dosiero kreskis je kelkaj paĝoj. Ankaŭ legante,

transskribante, mi travivadis ilian ĉiutagaĵon, kaj ĝi komencis pli kaj pli ŝanĝi mian ĉiutagan, pandemian tempon. Mi sentis ilian mizeron. Ili geedziĝis, sed ili ne povis vivi kune.

En tiu tempo, mia patro, estante juna inĝeniero pri agronomio, havis laboron proksiman al agrikulturistoj kaj ofte devis translokiĝi kaj vivi en malgranda ĉambreto, ofte tre humida kaj havanta nur some-ran kuirejon. Tia kuirejo servis ankaŭ kiel banejo kaj lavĉambro por la vestaĵoj. Kompreneble, necesejo estis lokita ekstere, ie en la korto de la domo. Fluanta akvo endome ne ekzistis. Por havi akvon endome, oni portis ĝin en sitelo. Unue necesis aĉeti sitelon – tio mankis en la vendejoj – poste iri en la korton por pumpi akvon per mana pumpilo, kaj fine porti la sitelon en la kuirejon. Tial, komence de ilia geedza vivo, mia patrino restis vivi kun siaj gepatroj. Jaron poste, ŝi eĉ naskis en la gepatra domo mian fratinton. Mia patro venadis sabate vespere, ĉar sabato estis la sesa labortago.

Ili havis komunan dimanĉon kaj ili estis feliĉaj.

Ilia (hodiaŭ ne akceptebla) vivmaniero montris al mi, ke mi, restante devige hejme, en la varma domo, elirante marŝi unu horon tage por spiri freŝecon de printempo kaj reveni hejmen, ja estas en vera paradizo. Kio mankas al mi? Ĉio, kion mi bezonas por manĝi, nutri nin ambaŭ, estis facile aĉetebla, ĉar manĝaĵvendejoj restis malfermitaj. Ili estis rapide adaptitaj por protekti laborantojn per plastaj protektaĵoj.

Mi ne povas plendi.

Nia filino kun dusemajna bebo, vivante en Montrealo, ĉiutage sendadis al poŝtelefono de mia edzo: *Bonan tagon!*, filmante nian nepinon dum unu minuto, por ke ni bone komencu la tagon. Tiu matena saluto jam feliĉigis nin. Kun la pli grandaj genepoj nia filo organizis regulan skajpumadon. Ni improvizis por ili spektakletojn kun pupoj, rakontante ion al ili. Jes, ni devis prepari ion amuzan, ĉar nur rigardi nin de la alia flanko ne sufiĉis, intereso malaperis. Sed nia filo plenigis bovletojn per io bongusta, ŝatata de ili, kaj ili pacience sidis, aŭskultis, ridis, manĝetis, respondadis.

Ni havis ideon inviti ankaŭ niajn geamikojn babili, rigardante unu la aliajn virtuale, kaj tiele kune trinki bieron, vinon, sukron aŭ teon, kaj tosti je nia sano. Ŝajnis al mi, ke ni vidis ilin eĉ pli ofte ol lastjare.

Ni proponis ankaŭ al la bofamilio renkontiĝi virtuale. Ili estas ses gefratoj kaj ili dise loĝas. De la printempo, tiu agrabla horo ankoraŭ okazas ĉiuvendrede, dum unu horo. Ili fakte neniam komunikis tiel ofte kiel nun, eĉ vidante sin ĉiusemajne. Nun ili ĉiuj estas emeritoj, pli liberaj. Ili daŭrigas tiujn virtualajn kuntrinkadojn, babiladojn, kaj tiu horo foje ŝajnas al ili mallonga.

Mia edzo havas patron 93-jaraĝan. Li loĝas en maljunulejo. En aprilo li ne plu rajtis eliri por aĉeti manĝaĵon – *tro aĝa*, oni diris. De tiam, mia edzo organizis aĉetumadon por sia patro portante ĉiusemajne du sakojn da manĝaĵo, kion patro mendis parolante kun li telefone. En majo estis naskiĝtago de la patro. Ni invitis lin veni suben, en la korton de lia maljunulejo. Du filoj kaj du bofilinoj, ni staris distance kaj kantis. Distance, ni metis ankaŭ sakon kun eta hejma naskiĝtaga kuko. Li feliĉis. En majo komencis esti pli varme, kaj li rajtis viziti nin en la korto kaj resti ekstere. Monatoj pasis, patro anoncis, ke nun li povas iri sola al vendejoj. Foje, li vizitis nin por observi birdojn sidante ĉe la suno.

Du domoj de najbaroj vendiĝis rapide ĉi-somere. Ilia baldaŭa translokiĝo alproksimiĝis. Por saluti ĉiujn forirontajn najbarojn, ni invitis ilin korten, denove distance. Kiel agrable, kiam oni bone rilatas kun najbaroj kaj kiam oni povas adiaŭi kaj deziri sukcesan translokiĝon – simplaj homaj kaj amikaj momentoj por ili kaj same por ni.

Estraranoj de la Universala Esperanto-Asocio havis en printempo la genian ideon organizi virtualan trimonatan festivalon. Ho, kia nova sperto rilati tiel kun esperantistoj! Eĉ mi preparis kelkajn erojn. Mi devis filmi min, sendi al internacia skipo de teknikistoj, kiuj laŭ programo ĝustatempe kontaktis tiun, kies vico estis aperi, paroli sur virtuala scenejo, kaj prezenti sian preparitan programeron.

Nekredeble kiel ĉio funkciis bone, danke al profesiaj teknikistoj, kiuj, jes, parolis Esperanton! Por mi, tio estis unika, nova sperto aŭdi mian voĉon, vidi min per filmita kontribuo, kaj poste rekte diri kelkajn vortojn, eĉ respondi skribajn demandojn, kiujn mi devis legi, por ke ĉiuj aŭdu la demandojn. Estis por mi la unua sperto paroli ne vidante la publikon, kaj sen vidi la reagojn de tiuj ĉeestantoj.

Dum Mondafest' 2020, estis ebleco virtuale renkonti konatojn kaj babili. Mi vidis zagreban klubejon, geamikojn, aktivajn gejunulojn. Kia

plezuro! Mi ne vojaĝis, sed geamikoj eniris virtuale mian domon. Kia neforgesebla sperto.

Mi finis la transskribadon de leteroj ne nur postmilitajn, sed ankaŭ el la tempo, kiam mi havis apenaŭ ses jarojn kaj mia patro havis eblecon profesie specialiĝi en sia fako. Li forvojaĝis kaj vivis dum kvar monatoj en Nederlando kaj pli ol monaton en Svedio. Tiam denove, miaj gepatroj korespondadis. Jes, ili interŝanĝis, skribis leterojn du- aŭ trifoje semajne. Ili ambaŭ sciis, kion faras la alia.

Dum mia patro skribis pri ĉio, kio estas moderna, nova, rapida, kun senlimaj aĉeteblecoj, mia patrino rakontis pri ni, la filinoj, pri la printempo kaj laboroj en la ĝardeno, pri maljuniĝo kaj perdiĝemo de mia avino, kiu tiam vivis kun ni. Tamen antaŭ vojaĝo de mia patrino, la avino mortis. Unuflanke malgaja, sed kun malpli da zorgoj, mia patrino povis viziti Nederlandon kaj mian patron. Dume la geavoj, flanke de mia patro, zorgis pri ni, la filinoj, dum tiuj tri semajnoj de foresto de nia patrino.

Kiam ŝi revenis, sekvis ke ni, la tri filinoj, ekvojaĝu kun nia patrino al la marbordo kaj vizitu nian onklon, fraton de nia patro. Ni restis dum du semajnoj kaj poste revenis en nian domon. La somero preskaŭ pasis, kiam revenis nia patro, kaj ĉiuj estis feliĉaj kune. Unu foto en nia salono restas kaj montras la familian ĝojon esti denove kune.

Post transskribo de leteroj venis nova ideo pri alia ĉapitro – la poemoj. Mia patrino ŝatis poeton, kiu priskribadis kroatian ebenajon kun kverkaj arbaroj kaj senfinaj tritikaj kaj sunfloraj kampoj. La poeto priskribadis kutimojn, sezonojn, tradiciojn de Slavonio, en la plej orienta regiono de Kroatio, kie li naskiĝis, kaj kie ankaŭ mia patrino naskiĝis kaj vivis. Ŝi ŝatis same kantojn. Plia ideo por plia ĉapitro. Tiel ni havos vortojn, se ni volos kanti.

Eble ne ĉiutage sed certe ĉiusemajne, mi havis iun novan temon por la libro. La milito en Slavonio, jes estu la lasta ĉapitro pro diraĵo de mia patrino: *La milito detruis mian junecon*. Tiel ŝi diris al mi, sed mi neniam pridemandis kialojn.

Tiam mi jam vizitis kinejon kun ĉiuj klasoj de nia elementa lernejo. Ni rigardis filmojn pri milito pri ĉiuj ofensivoj en nia lando. Mi vidis malgajajn scenojn, ofte kun sangaj scenoj kaj mi tiam fermadis miajn okulojn. La sola vorto *milito* signifis por mi doloron kaj malgajon.

Mi decidis nun legi kaj esplori tiun historion. Mi volis scii pri la dua mondmilito en ŝia urbo kaj kion mia patrino povis travivi. La milito komenciĝis en aŭtuno de 1939. Ĝuste tiam, ŝi finis mezgradan lernejon kaj enskribiĝis ĉe universitato en Zagrebo. La unuajn tri jarojn ŝi trankvile studis, sed la lastan semestron, en printempo de 1943, ŝi devis forlasi la studojn, reveni hejmen kaj helpi al siaj gepatroj. La milito pli proksimiĝis al Slavonio, al urbo Vinkovci. La urbo estas trajna vojkruĉiĝo inter oriento kaj okcidento, inter la nordo kaj la sudo de la balkana duoninsulo. Ĝi estis ofta celo de bombardado, des pli, ĉar ĝi situas nur sesdek kilometrojn for de Slavonski Brod, kie estas fabriko de maŝinoj kiu, dum milito, estis tiam transformita en la sola armil-fabriko en Kroatio, la ĉefa celo de bomboj.

La patro de mia patrino jam estis blinda kaj senmova, ĉiam kuŝanta en sia lito. Li havis en aŭtuno de 1939 cerbokolapson, kaj li ne plu povis moviĝi. Do, la reveno de mia patrino estis nepre necesa, ĉar dum momentoj, kiam oni aŭdis sirenojn pro ekbombado, mia patrino rapidis kun sia patrino translokigi la patron de lia lito sur rulseĝon, ke ili ĉiuj kaŝiĝu en la kelon, la loko plej sekura. Tiaj timigoj pro bomba falado kaj eksplodado okazis dum du jaroj. Jes, mi komprenis la timon pro aviadiloj, bomboj, eksplodoj, mortoj; detruitaj domoj, urbo, stacidomo... Eĉ ĉe la domo, kie ili loĝis, vitroj rompiĝis kaj unu muro estis tuŝita, damaĝita. Nun mi pli bone komprenas la travivitan grandan timon kaj la dirajon de mia patrino, ke la milito detruis ŝian Junecon. Mi ŝatus, ke ankaŭ miaj infanoj legu ion pri tiu milito kaj pri la travivaĵoj de siaj prauloj.

Somero de 2020. Ĉi-jare estis varmege en junio kaj julio, sed la varmege ne ĝenis min. Mi fidele, ĉiutage kaj apudkomputile sidis, pensis kaj kreis pliajn ĉapitrojn. Nur pensante pri mia patrino, ideoj venis pri nova temo. Mia libro dikiĝadis danke al inspir-momentoj.

Estis septembro, kiam mi petis kelkajn amikinojn tralegi, korekti, doni opinion pri certaj ĉapitroj. Mi dividis kaj sendis ĉapitrojn al ili, por ke la tuto estu pli rapide tralegita. Mi volis, ke la libro havu fotojn, ĉar foje la foto "rakontas" pli ol nur la vortoj. Mi rimarkis grafikajn eraretojn kaj petis amikinson, kiu redaktas kaj havas komputilajn konojn, iom plibonigi. Ŝi pretis helpi. Bonŝanca mi estas, kiom da multaj helpantinoj mi havis por tiu projekto.

Skribante la libron pri mia patrino, fermita endome en Granbeo, ne vojaĝante Kroation, mi havis multfoje la senton esti tie, ankoraŭfoje travivi parton de mia vivo, legante, skribante, kvazaŭ la sentoj regus dum momentoj. Mi mense vojaĝis, kvazaŭ mi estus tie. Jes, estis alia sperto de tiom longa mensa travivado.

Preskaŭ la fino de septembro. Mi kunigis dudek ĉapitrojn. La libro superas ducent paĝojn! Mi sendis la libron al presisto kaj jam senpacience mi atendas ĝin. Tiu libro – memoraĵo pri mia patrino – restas bela rezulto, kaj samtempe ĝi memorigas min pri tiu tempo de *KOVIM-19*, kiel ĝi ŝanĝis nin.

Kion diri pli!

La tempon de tiu unua periodo de pandemio, la devigan izoligon, mi uzis kreative, “konstruante”, preparante la libron. Krome, la malgajon, tristecon, timon, deprimon, kiujn kelkaj sentis, mi transformis en interesan laboron, havante ĝojon pro novaj scioj kaj pro transdonemo de ĉiuj familiaj konoj.

En la tempo de pandemio, mi sentis grandan solidarecon, pretecon helpi unu la alian. Ĉu ĉar la homoj havas pli da tempo? Ĉu pro la distanco, kiu devigas nin vivi pli sole ol grupe? Ĉu ĉar oni preferus kvazaŭ kune “naĝi” kaj helpi naĝadon en tiu nekonata “oceano” nomata pandemio? Tute kompreneble, oni emas helpi al familiano, najbaro, kaj al iu proksimulo aŭ nekonato.

Oni konscias, ke nur kune pli agrablas la ĉiutaga vivo, kaj ke nur kune respektante la regulojn la vivo sen viruso revenos pli rapide. Jes, zorgante ĉiam pri nia sano, ni zorgas pri la sano de niaj karuloj kaj aliuloj.

Mi feliĉos, se iun tagon post la pandemio iu memoros min dirante: “Ĉu vi scias, kiam vi telefonis, aŭ skribis... Vi tiam estis kvazaŭ suno, kiu varmigis mian koron.” Tiam ankaŭ mi povus rakonti, kiom da *sunoj* mi ricevis kaj kiuj estis tiuj sunoj por mi en pandemio.

Kaj nun, kiam mi finis la libron pri mia patrino, alvenas la dua ondo, kaj denove malpermesoj, kiujn oni sekvu, por ke la viruso malfortiĝu, ke ĝi ĉesu, ke ĝi foriru el niaj vivoj.

La demando estas nur: *Kiam?* Tion ĉiuj ŝatus scii.

Estas la preĝo de sankta Francisko el Asizo, kiu multe plaĉas al mi, kaj mi tradukis ĝin por la fino de ĉi neforgesebla pandemio.

Disinjoro, faru de mi instrumenton de Via paco:

Tie, kie estas malamo, ke mi portu la amon.

Tie, kie estas ofendo, ke mi portu la pardonon.

Tie, kie estas malkonkordo, ke mi portu la harmonion.

Tie, kie estas mensogo, ke mi portu la veron.

Tie, kie estas dubo, ke mi portu la kredon.

Tie, kie estas senkonsolo, ke mi portu la esperon.

Tie, kie estas mallumo, ke mi portu la lumon.

Tie, kie estas malĝojo, ke mi portu la gajecon.

...kaj mi mem aldonus pro tiu viruso...

Tie, kie estas malsano, ke mi portu la sanon.

Prezidanto de la Interkultura
Novelo-Konkurso

Francisko Lorrain, Kanado

Honora prezidanto de la Interkultura
Novelo-Konkurso

Claudia Larochelle, Kanado

Sekretario de la Interkultura
Novelo-Konkurso

Nicola Ruggiero, Italio

Ĵurio de la Interkultura Novelo-Konkurso

Yao Afantchao Biakou, Togolando

Heidi Goes, Belgio

Mahugnon Mireille Hounkpe, Francio/Benino

Paulo Moĵajev, Ukrainio

Florent Aimé Ntoto, RD Kongolando

Rogener Pavinski, Brazilo

James Rezende Piton, Brazilo

Anna Striganova, Rusio

Enhavtabelo

Claudia Larochelle bonvenigas vin!.....	5
Francisko Lorrain salutas vin!	7
Fernando Maia invitas vin!	8
La unua kaŝita kazo	10
La komenco de KOVIM-19	12
Neevitebla surteriĝo.....	13
La faruno	14
La longa amrendevuo	15
Mi ne havas horloĝon.....	17
Enuigaj tagoj.....	19
Kafo	21
La fenestro.....	23
La hundeto.....	25
Beno aŭ malbeno	27
Amo kaj <i>EKMO</i>	29
La sekreta recepto <i>Dua premio</i>	31
Domkato.....	33
La ŝiro	35
Antaŭ la truo de kuniklo	38
Tra la fenestro.....	41
Elbo	44
Ĉu ne pli bone hejme? <i>Dua premio</i>	48
Printempo 2020	52
El pandemia taglibro	56
La brakumklubo <i>Tria premio</i>	60
La tricenttrideksepa tago <i>Tria premio</i>	66
Ne estas maskoj por hundoj	72
Amo en la tempo de kovimo <i>Unua premio</i>	78
Trudizoliĝo.....	84
La rideto.....	91
Eksterordinaraj tempoj, aŭ Tri promenoj de filino kaj patrino	97
Dum pandemio, verka renkontiĝo kun miaj gepatroj	104
Ĵurio.....	113

KELKAJ ELDONAĴOJ DE KAVA-PECH

1. Faka literaturo

**Valeria Sipos, Ulrich Schweiger: Ne kredu ĉion, kion vi pensas
Instrukcio por sana kaj feliĉa vivo**



La cerbo estas la plej granda mirindaĵo, kiun la homa korpo povas prezenti. Ĝi estas ekstreme utila ilo. Sed se vi tro naivkrede uzas ĝin, ekestas danĝeroj kaj riskoj. La informriĉa kaj profunda faklibro priskribas en distra stilo, kiamaniere per ĝusta kompreno de la riskoj kaj kromefikoj de la cerbo vi povas efike apogi vian psikan sanon. Kun multaj kazoekzemploj. Tradukis Alois Eder.

304 paĝoj



18 EUR

Petr Chrdle: Sen laco por paco – Vivo kaj verko de Bertha von Suttner

Atesto pri la vivo kaj verko de la unua virino, kiu famiĝis kiel verkistino (la plej fama estas ŝia kontraŭmilita amromano *For la batalilojn!*), porpaca aganto en internacia skalo, sed ankaŭ batalantino kontraŭ antisemitismo kaj por la virinaj rajtoj. Kiel la unua virino ŝi ricevis en la jaro 1905 la Nobel-premion pri paco.

159 paĝoj

15,90 EUR



**Petr Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj
specifaj trajtoj**

Spertoj de la aŭtoro el profesia uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj samrajte kun la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj, ĉefe en la branĉoj de turismo kaj eldonado; sed li priskribas ankaŭ specifajojn en la internacia komerco. Tria novprilaborita eldono.

97 paĝoj

10,90 EUR



2. Lingva literaturo

Bent Jensenius: Bonvenon en nia mondo

Legolibro skribita en simpla Esperanto estas konvena precipe por komencintoj kaj progresantoj en lernado de Esperanto. Sed ĝi povas esti utila ankaŭ por spertaj esperantistoj, ĉar ĝi prezentas trarigardon tra la Esperanto-movado en la mondo. Dua, aktualigita eldono.

127 paĝoj,

13,20 EUR



Sabine Fiedler – Pavel Rak: Ilustrita frazeologio

Esperanto-frazeologio kun klarigoj de unuopaj proverboj akompanataj per spritaj desegnaĵoj de Pavel Rak kaj ekvivalentoj en kelkaj naciaj lingvoj. La dua eldono. Temas certe pri libro, kiun devus konsulti ĉiu esperantisto, kiu volas pli profunde ekkoni la riĉecon de la internacia lingvo.

144 paĝoj

13,50 EUR

Miroslav Malovec: Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro

Nova, ĝis nun la plej ampleksa eldono de Ĉeĥa-Esperanta Vortaro, kiu enhavas proksimume 24 000 terminojn kaj proks. 23 000 derivaĵojn, do entute proks. 47 000 vortojn, sed ankaŭ klarigojn de signifonuancoj kaj sinonimaj esprimoj.

703 paĝoj

24 EUR




3. Beletro

Bertha von Suttner: For la batalilojn!


Kontraŭmilita romano, ĉefverko de la Nobel-premiito, konsiderata biblio por pacistoj kaj ĉiuj pacamaj homoj. Ĝi estas verkita fine de la 19a jarcento, sed perdis nenion el sia aktualeco. Ĝi estas envicigita en la serion „Oriento-Okcidento“ kiel ties 57a numero.

472 paĝoj

39 EUR



Martin Stuppig: Home en senhomeco



Rememoroj de la aŭtoro pri la milito, kiam li estis devigita batali por la venko de la Tria Imperio. La unua parto priskribas liajn travivaĵojn en la kruela batalo ĉe Monte Cassino, la dua liajn aventurojn en angla militkaptitejo en Afriko. El la germana tradukis Jozefo Horvath. Aldonaĵojn pri la bataloj ĉe Monte Cassino, militkaptitejoj en Afriko kaj pri la aŭtoro verkis Petro Chrdle. Tria solide bindita eldono.

Dua eldono, 205 paĝoj


17,70 EUR

Sabine Dittrich: Heredantoj de silentado

Romano, respegulanta komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj post la dua mondmilito. Junan judan germaninon, kiu volas ekscii ion pri siaj antaŭuloj, gvidas ŝia esploro al Prago. Tie ŝi ne nur renkontas amon al simpatia ĉeĥa instruisto, sed ankaŭ ekkonas la malnovajn historiajn vundojn kaj la restantajn gutojn de malamo. Aldonita konciza historio de la rilatoj inter germanoj kaj ĉeĥoj sur la teritorio de Ĉeĥio. El la germana tradukis Aleksandro Montanesko. Solide bindita.

144 paĝoj

15 EUR



4. Porinfana literaturo

Gabriela Kopcová: Kosmofabeloj por bona nokto Fabeloj pri planedoj

Dek kvar mallongaj fabeloj, kiuj rakontas pri infana Fabelkosmo kaj ĝiaj misteraj planedoj kaj iliaj strangaj enloĝantoj. Tamen ne mankas tie ankaŭ reĝidoj, drakoj kaj aliaj figuroj el niaj konataj fabeloj. Ĝin abunde kaj ĉarme plibeligis per koloraj ilustraĵoj la aŭtorino mem. El la ĉeĥa ĝin tradukis Miroslav Malovec. Solide bindita.

96 paĝoj

12 EUR



Eva Vychodilová: Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul

Triopo de amikoj dum ludado erariras, ĝis ili perdiĝas en arbaro. Post travivo de timoplena aventuro ili ekscias, ke ne ĉiu malbono estas nur malbona, sed eĉ ĝi povas esti por io bona. Ĉarmaj koloraj ilustraĵoj de Miroslava Zezulová, tradukis Petro Chrdle.

12 paĝoj


6 EUR

Leif Nordenstorm: Arne, la ĉefido

Aventura historia rakonto el la vikinga epoko. La avo de Arne estas vikingo. En la vilaĝo aperas du fremduloj. Kiuj estas la viroj? Ĉu povas libera homo kaj sklavo ligi amikecon? La facile legebla libro taŭgas por junuloj, sed ankaŭ por ĉiuaĝuloj. Solide bindita.

119 paĝoj

15 EUR



Kompletan oferton vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz>

AMO, TUSO KAJ FORPASO

Homoj kaj kovimo

Ĉefredaktoro: François Bolduc

Provlegis: Philippe Bérizzi, Stela Besenyei-Merger,

Reinhard Fössmeier kaj Pavol Petrik

Kovrilo: Anna Lobo de Carvalho

Fotoj: Bong Sou

Enpaĝigo: Luděk Neužil

Eldonis KAVA-PECH kiel sian 241-an eldonaĵon, la 98-an en Esperanto

Unua eldono, 2022

Homoj kaj kovimo. Homoj kun kovimo. Homoj kontraŭ kovimo. Aŭtoroj, tradukistoj, ĵurianoj, redaktantoj kaj organizantoj de la Interkultura Novelo-Konkurso: pli ol cent homoj kunlaboris por krei ĉi tiun novelaron: trideko da noveloj el ses kontinentoj. Sama pandemio, malsimilaj spertoj, diversaj fikciaj rakontoj. Ĉu ni reagis same al la viruso? La respondo estas en tiu ĉi novelaro.

Ĵenja Amis
Tatjana Auderskaja
Stela Besenyei-Merger
James Bridge
Anne Frances Calceta
Seth Carter
Tamagotchi de Chasteigner
Nicole Else
Sten Johansson
Midori Mamija
Eveline Ménard

Zdravka Metz
Kejti Neilson
Jorge Rafael Nogueras
Valentina Panova
Martin Rue
Keyhan Sayadpour Zanjani
Brandon Sowers
Maria Rosaria Spanò
Bashandy Tadros
Ileana Tetereva
Paulo Sergio Viana
Yin Jiaxin



ISBN 978-80-88326-31-1



9 788088 326311 >